
EL Popola ĈINIO

N-ro 4 JULIO–AŬGUSTO 1966



Verkoj de Maŭ Zedong

Pri Praktiko

28p. *13 × 18.5 cm.*

Pri Kontraŭdiro

68p. *13 × 18.5 cm.*

La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio

70p. *9.5 × 14.5 cm.*

Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an

52p. *13 × 18.5 cm.*

Servu al la Popolo

16p. *9.5 × 14.5 cm.*

Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo

12p. *9.5 × 14.5 cm.*

La Aktuala Situacio kaj Nia Politiko post la Venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito

36p. *9.5 × 14.5 cm.*

Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong

20p. *13 × 18.5 cm.*

La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj

48p. *13 × 18.5 cm.*

Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio

32p. *13 × 18.5 cm.*

Pri Popol-demokratia Diktaturo

28p. *13 × 18.5 cm.*

Komentarioj pri la Blanka Libro

64p. *13 × 18.5 cm.*

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo

70p. *13 × 18.5 cm.*

Mendebla ĉe la perantoj de EPĈ aŭ la Libro-servo de ĈEL (P. O. Kesto 313, Pekino)



Prezidanto Maŭ Zedong, la Granda Gvidanto de la Ĉina Popolo

Alte Tenu la Grandan Ruĝan Flagon Aktive Partoprenu en la Granda

Ĉefartikolo de la Ĵurnalo

(18-a aprilo

Prezidanto Maŭ instruas al ni, ke en socialisma socio ankoraŭ ekzistas klasoj kaj klasbatalo. Li diris, ke en nia lando "la klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro, la klasbatalo inter diversaj politikaj fortoj kaj la klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro en ideologia kampo estas ankoraŭ longdaŭraj, zigzagaj kaj iam eĉ tre akraj". La batalo por starigi la proletan ideologion kaj elradiki la burĝan ideologion sur la kultura fronto estas grava flanko de la klasbatalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du ideologioj de la proletaro kaj la burĝaro kaj de socialismo kaj kapitalismo. La proletaro klopodas transformi la mondon laŭ sia mondkoncepto, ankaŭ la burĝaro klopodas tion fari laŭ la sia. La socialisma kulturo devas servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, al la politiko de la proletaro, al la firmigo kaj disvolvo de la socialisma sistemo kaj al ties paŝo-post-paŝa transiro al komunismo. La burĝa kaj reviziisma kulturo servas al la burĝaro kaj al la bienuloj, riĉ-kamparanoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj kaj dekstruloj pretigante la vojon por la restarigo de kapitalismo. Se la proletaro ne okupas la kulturan batalpozicion, ĝin nepre okupos la burĝaro. Tio estas akra klasbatalo. Pro tio ke en nia lando la restantaj fortoj de la burĝaro estas ankoraŭ relative grandaj, la nombro de burĝaj intelektuloj estas ankoraŭ konsiderinde multa, la influo de burĝaj ideoj estas ankoraŭ relative forta, kaj iliaj rimedoj de batalo kontraŭ ni fariĝas ĉiam pli insidaj, ruzaj, kaŝitaj kaj zigzagaj, ni ne povas facile rimarki ilin kaj povas esti trafitaj de iliaj sukertegitaj obusoj kaj eĉ perdi nian pozicion, se ni iomete malstreĉas niajn atenton kaj singardemon. En tiu ĉi rilato, restas ankoraŭ nesolvita la problemo — kiu venkos kiun — inter socialismo kaj kapitalismo. La batalo estas neevitebla. Se ni malbone kondukos la batalon, naskiĝos reviziismo.

Ni Popola Liberiga Armeo estas popola armeo, kreita kaj gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, kaj estas la plej obeema ilo de la Partio kaj la popolo kaj grava subtenilo de la proleta diktaturo. Ĝi ĉiam ludas gravan rolon en la revolucia afero de la proletaro, kaj ĝi devas ludi gravan rolon ankaŭ en la granda socialisma kultura revolucio. Ni devas pli bone koni la situacion de la klasbatalo en la ideologia kampo kaj, alte tenante la grandan ruĝan flagon de la penso de Maŭ Zedong, decideme konduki la socialisman kulturan revolucion ĝis la fino, kune kun la tutlanda popolo, por ke la literatura kaj arta laboroj de nia armeo ludu grandegan rolon en reliefigo de politiko kaj akcelo de la revoluciigo de homoj.



de la Penso de Maŭ Zedong, Socialisma Kultura Revolucio

Liberiga Armeo (Jiefangjun Bao)
1966)

AKRA KLASBATALO EKZISTAS SUR LA KULTURA FRONTO


De 16 jaroj iras akra klasbatalo sur la kultura fronto.

En la du etapoj de nia revolucio, tio estas, en la nov-demokratia etapo kaj en la socialisma etapo, ekzistas batalo inter du klasoj kaj inter du linioj sur la kultura fronto, tio estas, batalo inter la proletaro kaj burĝaro pri gvidanteco sur la kultura fronto. En la historio de nia Partio la batalo kontraŭ la "maldekstra" kaj dekstra oportunismo ankaŭ inkluzivis la batalon inter tiuj du linioj sur la kultura fronto.

La linio de Vang Ming estis burĝa ideologia fluo, kiu iam inundis nian Partion. En la kampanjo por reĝustigo de stilo komencita en 1942, Prezidanto Maŭ faris ĝisfundan teorian kritikon unue pri la politika, milita kaj organiza linioj de Vang Ming, kaj tuj poste, pri la kultura linio reprezentata de li. La verkoj de Prezidanto Maŭ *Pri Nov-demokratio* kaj *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* estas la plej kompleta, plej plenampleksa kaj plej sistema historia resumo pri la batalo inter tiuj du linioj sur la kultura fronto; ili estas heredo kaj disvolvo de la mondkoncepto kaj la teorio de literaturo kaj arto de marksism-leninismo.

Post kiam nia revolucio eniris en la socialisman etapon, serio da gravaj bataloj sur nia kultura fronto, ekzemple, kritiko pri la filmo *La Vivo de Vu Hjun* kaj pri *Studo pri la Romano "Sonĝo de Buduaro"*, batalo kontraŭ la kontraŭrevolucia kliko de Hu Feng, batalo kontraŭ la dekstruloj, la granda socialisma kultura revolucio de la lastaj tri jaroj ktp, estis farita sub la rekta gvido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ. La du verkoj de Prezidanto Maŭ, *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo* kaj *Parolado en la Tutlanda Konferenco pri Propaganda Laboro de la Komunista Partio de Ĉinio* estas la plej nova resumo de la historiaj spertoj de la revoluciaj ideologiaj movadoj kaj la literaturaj kaj artaj movadoj en Ĉinio kaj aliaj landoj kaj reprezentas novan disvolviĝon de la mondkoncepto kaj teorio de literaturo kaj arto de marksism-leninismo.

Ĉi tiuj kvar brilaj verkoj de Prezidanto Maŭ konsistigas gravan parton de la granda penso de Maŭ Zedong, kaj estas la kulmino de la nunaj marksism-leninismaj mondkoncepto kaj teorio de literaturo kaj arto, kaj la plej alta instrukcio por nia literatura kaj arta laboro; ili povas esti uzataj kiel orientilo de ni proletaro por longa tempo.



De la lastaj pli ol dek jaroj post la fondiĝo de nia Popola Respubliko, en nia literatura kaj arta rondo troviĝas kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma nigra linio kontraŭstaranta la penson de Maŭ Zedong. Tiu ĉi nigra linio estas kombino de la literaturaj kaj artaj pensoj de la burĝaro kaj moderna reviziismo kun la tiel nomataj literaturo kaj arto de la tridekaj jaroj. Iliajn argumentojn reprezentas la teorioj de "skribo de la vero", "la larĝa vojo de realismo", "profundiĝo de realismo", kontraŭstaro al "subjekto kiel decida faktoro," "mezaj personoj", kontraŭstaro al "pulvodoro", "kuniĝo de diversaj tendencoj kiel la spirito de la epoko" ktp. La plejparto de tiuj ĉi ideoj estis kritikita antaŭlonge en la verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an.* En la rondo de filmlaborantoj iuj elmetis la tiel nomatan teorion de "forlaso de la klasikaĵo kaj ribelo kontraŭ la ortodoksaĵo", t. e., forlasi la "klasikaĵon" de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong kaj ribeli kontraŭ la ortodoksaĵo de la popola revolucia milito. Sub la influo aŭ kontrolo de tiu kontraŭfluo de literatura kaj arta penso de burĝaro kaj moderna reviziismo, kvankam inter la verkoj pri la popola milito, la popola armeo kaj aliaj militaj subjektoj de la lastaj pli ol dek jaroj, sintrovas iuj bonaj aŭ fundamente bonaj verkoj, kiuj vere prikantas revoluciajn heroojn, servas al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al socialismo, tamen ilia kvanto estas negranda; dum nemalmultaj estas verkoj en meza stato, kaj iuj aliaj estas kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj venenaj herboj. Iuj verkoj kripligas historiajn faktojn, kaj spegulas nur erarajn liniojn, sed ne la ĝustajn. Iuj verkoj priskribas heroajn figurojn sed de tiuj kiuj malobeis disciplinon, aŭ kreas heroojn, sed igas ilin morti en artefarita tragedia fino. En iuj verkoj, anstataŭ heroojn la verkistoj prezentas nur mezajn personojn, kiuj fakte estas postiĝintaj personoj, kaj malbeligas per tio la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn. Priskribante malamikojn, ili ne malkaŝas la klasan naturon de la malamikoj kiel de eksploatantoj kaj subpremantoj al la popolo, sed eĉ klopodas beligi ilin. Troviĝas ankaŭ verkoj, kiuj dediĉis sin nur al amo kaj romaneco kun malaltaj gustoj, pretendante ke "amo" kaj "morto" estas eternaj temoj. Ĉio ĉi tio estas io burĝa kaj reviziisma kontraŭ kio oni devas decideme oponi.

La batalo inter la du vojoj sur la literatura kaj arta fronto en la socio neeviteble speguliĝas en la interno de nia armeo, ĉar la armeo ne vivas en vakuo kaj ne povas esti escepto. Nia armeo estas la ĉefa ilo de la proleta diktaturo. Sen la popola armeo gvidata de la Partio ne povus esti la venko de la revolucio, nek la proleta diktaturo kaj socialismo kaj ĉio de la popolo. Sekve, la malamikoj certe provas subfosi de ĉiuj flankoj nian armeon per ĉiuj rimedoj, kaj ili certe provas korupti nian armeon per la armilo de literaturo kaj arto. Kontraŭ tio ni devas teni nin en alta singardemo. Sed iuj personoj ne tiel rigardas la aferon, asertante ke la problemo pri la direkto de literaturo kaj arto en la armeo jam estas solvita, kaj kio restas, estas ĉefe la problemo pri levado de la arta nivelo. Ĉi tiu vidpunkto estas erara kaj tre malutila kaj ne estas bazita sur konkreta analizo. Fakto estas, ke parto de la literaturo kaj arto de nia armeo prenas la ĝustan direkton kaj havas artan nivelon relative pli altan; parto prenas la ĝustan direkton, sed la arta nivelo estas malalta; parto havas gravajn mankojn aŭ erarojn ambaŭ en la politika direkto kaj arta nivelo; ankaŭ sin trovas parto, kiu estas kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj venenaj herboj. Dum la lastaj pli ol dek jaroj, en la granda uragano de klasbatalo sur la literatura kaj arta fronto, kelkaj el la armeaj literaturaj kaj artaj laborantoj ne povis elteni la provon kaj faris grandajn aŭ malgrandajn erarojn. Tio montras, ke ankaŭ la literatura kaj arta laboro en la armeo estas influita de la kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma nigra linio en malsamaj gradoj. Ni devas, laŭ la instrukcio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, aktive partopreni la grandan socialisman revolucion sur la kultura fronto, plene elradiki tiun ĉi nigran linion kaj plene forigi ĝian influon en la armeo. Post la elradiko de tiu ĉi nigra linio, naskiĝos eble ankoraŭ iuj novaj, kaj denove ni devos komenci la batalon. Tio estas peniga, komplika kaj longdaŭra batalo, kiu bezonas klopodadon dum dekoj aŭ eĉ centoj da jaroj. Persiste konduki tiun ĉi grandan socialisman kulturan revolucion ĝis la fino estas grava afero, kiu

koncernas la revoluciigan konstruon de nia armeo, la estontecon de la revolucio de nia lando kaj ankaŭ ĉa estontecon de la monda revolucio.


NOVA SITUACIO EN LA GRANDA KULTURA REVOLUCIO

Ekde septembro 1962, kiam Prezidanto Maŭ en la Deka Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio alvokis la tutan Partion kaj la tutlandan popolon neniam forgesi klasojn kaj klasan batalon, la batalo por starigi la proletan ideologion kaj plene elimini la burĝan ideologion sur la kultura fronto plue disvastiĝas.

En la lastaj tri jaroj aperis nova situacio en la granda socialisma kultura revolucio. La plej elstara ekzemplo estas la apero de pekinaj operoj kun revoluciaj kaj nuntempaj temoj. La literaturistoj kaj artistoj, kiuj sin okupas pri la reformo de pekinaj operoj sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, kun marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong kiel armilo, lanĉis heroan kaj malcedeman ofensivon kontraŭ la literaturo kaj arto de la feŭda klaso, burĝaro kaj moderna reviziismo. Tiu ĉi atako radikale revoluciigis pekinan operon, la plej obstinan fortikaĵon, tiel en ideologia enhavo kiel en arta formo, kaj tio alportis revolucian ŝanĝon al la literaturaj kaj artaj rondoj. Pekinaj operoj kun revoluciaj kaj nuntempaj temoj kiel *La Ruĝa Signal-lanterno*, *Ŝagiabang*, *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*, *Surprizatako kontraŭ la Blank-Tigra Regimento*, la baledo *Ruĝa Virina Taĉmento*, la simfonio *Ŝagiabang* kaj la argilaj skulptaĵoj *Farmpaga Kolektejo* k. a. ricevis la sankcion de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj estis entuziasme aklamitaj de ĉinaj kaj eksterlandaj spektantoj. Tiu iniciato havos profundan kaj longdaŭran influon sur la socialisma kultura revolucio. Tio efike pruvas, ke eĉ la plej obstina fortikaĵo, pekina opero, povas esti konkerita kaj revoluciigita; ke eksterlandaj klasikaj artaj formoj kiel baledo, simfonio kaj skulpt-arto povas ankaŭ esti reformitaj por servi al nia celo; kaj tio devas doni al ni pli grandan fidon por revoluciigi aliajn branĉojn de arto. Samtempe, tiuj sukcesoj donis fortan rebaton al diversaj konservativuloj kaj tiuj vidpunktoj kiel la teorio de "bilet-vendeja valoro", la teorio de "fremdvaluta valoro", la teorio, ke "revoluciaj verkoj ne povas iri eksterlanden" k. a.

Alia elstara ekzemplo de la granda socialisma kultura revolucio dum la lastaj tri jaroj estas la vasta amasa aktivado de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sur ideologia kaj literatura kaj arta frontoj. El la plumo de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj senĉese aperis multe da bonaj filozofiaj artikoloj kiuj bone esprimas la penson de Maŭ Zedong elirante de praktiko; samtempe ankaŭ senĉese aperis multaj bonegaj verkoj de literaturo kaj arto por laŭdi la grandan venkon en nia socialisma revolucio, la antaŭensaltegon sur diversaj frontoj de nia socialisma konstruado, niajn novajn heroajn personojn kaj la brilegan gvidadon de nia granda Partio kaj nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Precipe notindaj estas la multegaj poemoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj aperigitaj en murgazetoj kaj nigratabulaj gazetoj. Tiuj poemoj reprezentas tute novan epokon tiel en enhavo kiel en formo.

En tiuj ĉi jaroj ankaŭ aperis bonega situacio en la kultura laboro de nia armeo. De kiam kamarado Lin Biaŭ komencis estri la Komisionon pri Militaj Aferoj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, li dediĉas grandan atenton al literatura kaj arta laboro kaj donis al ni multajn gravajn instrukciojn. *La Rezolucio pri Plifortigo de Politika kaj Ideologia Laboro en la Armeo* farita de la plivastigita kunveno de la Komisiono pri Militaj Aferoj en 1960, klare difinas, ke la literatura kaj arta laboro en la armeo "devas esti strikte ligita kun la taskoj kaj ideologia stato de la armeo por servi al la starigo de la proleta ideologio kaj plena elimino de la burĝa ideologio kaj al la plifirmigo kaj plialtigo de batalkapablo." La plejmulto de la literaturaj kaj artaj laborantoj en la armeo reliefigas la politikon, kreive studas kaj aplikas la verkojn de Prezidanto Maŭ, enprofundiĝas en la rotojn



aŭ en la kamparon kaj fabrikojn, aktive partoprenas en la socialisma eduka movado, kunligas sin kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, plue hardas sin kaj remuldas sian ideologion, kaj plialtigas sian proletan konscion. Rezulte de tio ili produktis bonajn teatraĵojn kiel *Gardistoj sub la Neonaj Lampoj*, bonajn romanojn kiel *Kanto pri Oŭjang Haj*, kaj iujn kompare bonajn raport-verkojn, poemojn de batalantoj, muzikaĵojn, dancojn kaj belartajn verkojn. Samtempe aperis aro da multpromesaj verkistoj.

Certe, tiuj estas nur la unuaj fruktoj de la socialisma kultura revolucio, la unua paŝo en la longa marŝo de dekmil lioj. Por protekti kaj disvolvi tiun atingon kaj por daŭrigi la socialisman kulturan revolucion ĝis la fino, ni ankoraŭ devas fari longtempan, malfacilan penadon. La literaturaj kaj artaj laborantoj de nia armeo devas fari energian penadon kaj indan kontribuon.

PREZENTI LA NOVON DE SOCIALISMO, STARIGI LA DISTINGAĴON DE LA PROLETARO KAJ PRODUKTI BONAJN MODELOJN

Por krei novajn socialismajn literaturon kaj arton, ni devas produkti bonajn modelojn, kaj la gvidantaj kamaradoj devas mem zorgi pri tio. Nur kiam ni havas bonajn modelojn kaj sukcesan sperton en tiu rilato, niaj argumentoj estos konvinkaj, kaj ni povos firme okupi la pozicion.

Ni devas havi la kuraĝon prezenti novon kaj starigi distingaĵon, t. e. la novon de socialismo kaj la distingaĵon de la proletaro. La fundamenta tasko de la socialismaj literaturo kaj arto estas klopodi por krei heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong. Prezidanto Maŭ montris: "Se vi estas burĝa literaturisto aŭ artisto, vi prikantas ne la proletaron sed la burĝaron; se vi estas proleta literaturisto aŭ aritisto, vi prikantas ne la burĝaron sed la proletaron kaj la laborantan popolon: unu el la du kazoj devas esti." Sekve, la klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro sur la literatura kaj arta fronto fokusiĝas en tio, kiu klaso estas prikantata, de kiu klaso heroaj personoj estas priskribataj, kaj personoj de kiu klaso okupas la regantan pozicion en literaturaj kaj artaj verkoj. Kaj tio estas dividlinio por distingi la literaturon kaj arton de unu klaso disde tiuj de aliaj.

La bonaj kvalitoj de la heroaj personoj, kiuj aperas inter la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj nutrataj de la penso de Maŭ Zedong, estas koncentrita esprimo de la proleta klasa karaktero. Ni devas, kun plena entuziasmo, krei heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ni devas krei tipojn kaj ne esti limigitaj de realaj personoj kaj realaj eventoj. Prezidanto Maŭ diris: "La vivo spegulita en literaturaj kaj artaj verkoj, kompare kun la ordinara reala vivo, povas kaj devas esti pli alta, pli intensa, pli koncentrita, pli tipa, pli ideala kaj sekve kun pli da universaleco." Tio signifas, ke niaj verkistoj devas koncentri kaj resumi materialojn el vivo akumulitajn dum longa periodo por krei diversajn tipajn personojn.

Por sukcese krei heroajn personojn ni devas nepre adopti la metodon kombini revolucian realismon kun revolucia romantikismo, sed absolute ne la metodojn de kritika realismo kaj romantikismo de la burĝaro.

Verkistoj en la armeo devas preni kiel sian gloran taskon la priskribon de revoluciaj militoj, la propagandon de la penso de Prezidanto Maŭ pri la popola milito, kaj la kreadon de heroaj personoj en revoluciaj militoj. Kiam ni priskribas revolucian militon, ni devas unue igi klara la naturon de la milito — ni estas sur la justa flanko, dum la malamiko sur la maljusta. Niaj verkoj nepre devas montri niajn pen-plenan lukton kaj heroan oferon, sed ankaŭ revolucian heroismon kaj revolucian optimismon. En priskribado de la krueleco de milito, ni ne devas reliefigi ĝian terurecon. En priskribado de la malfacileco de la revolucia batalo, ni ne devas reliefigi la suferojn. La krueleco

de revolucia milito kaj revolucia heroismo, la malfacileco de revolucia batalo kaj revolucia optimismo estas unuiĝo de kontraŭaĵoj, sed ni nepre devas scii, kiu estas la ĉefa flanko de la kontraŭdiro; alie, se ni erare metas la emfazon, la tendenco de burĝa pacifismo povas aperi. En priskribado de la popola revolucia milito, ĉu ĝi estas en la periodo ĉefe de gerila milito kun helpo de movada milito, ĉu ĝi estas en la periodo ĉefe de movada milito, ni devas korekte montri la rilaton inter la regula armeo, gerilanoj kaj milicanoj, kaj la rilaton inter la armita popolamaso kaj la nearmita popolamaso sub la gvido de la Partio.


Ne estas facile produkti bonajn modelojn de proletaj literaturo kaj arto. Strategie ni nepre devas malestimi tiun ĉi taskon, sed taktike ni nepre devas alte taksi ĝin. Krei bonan verkon estas pen-plena procezo, kaj la kamaradoj gvidantaj la laboron neniam devas preni burokratan aŭ malatentan sintenon, sed devas fari verajn klopodojn kaj partopreni la ĝojon kaj penadon de la verkistoj. Ili devas fari ĉion eblan por akiri materialojn unua-manajn. Ili ne devas timi malsukceson aŭ eraron. Ili devas permesi al aliaj malsukcesi kaj erari kaj plie permesi al ili korekti sian eraron. Ili devas apogi sin al la amasoj, akiri iliajn opiniojn kaj resendi al ili post koncentrado por fari provadon, kaj fari la verkon ĉiam pli bona tra ripetada praktikado dum longa periodo, klopodante kunigi revolucian politikan enhavon kun la plejeble perfekta artformo. En la daŭro de praktikado ili devas resumi sian sperton en ĝusta tempo kaj ekscipovi paŝon post paŝo la leĝojn de diversaj formoj de arto. Alie ili ne sukcesos produkti bonajn modelojn.

Ekzistas multaj gravaj revoluciaj historiaj temoj kaj aktualaj temoj, kiuj urĝe bezonas nin organizi verkadon laŭplane kaj sisteme. Kaj pere de tiu agado ni eledukos kernan trupon de vere proletaj verkistoj kaj artistoj.

LIBERIGI LA PENSON KAJ DISROMPI LA SUPERSTIĈOJN

En la socialisma kultura revolucio estas necese disrompi certajn objektojn kaj starigi aliajn. Sen ĝisfunda disrompo ne povas esti vera starigo. Por konduki la socialisman kulturan revolucion kaj krei novajn socialismajn literaturon kaj arton, ni devas liberigi nian penson kaj disrompi la superstiĉojn.

Estas necese forigi la blindan kredon al la tiel nomataj literaturo kaj arto de la tridekaj jaroj. En tiu tempo la literatura kaj arta movado de la maldekstra alo sekvis politike la "maldekstran" oportunisman linion de Vang Ming kaj organize fermita-pordismon kaj sektismon, kaj ĝia literatura kaj arta ideologio fakte estis tiu de la rusaj burĝaj literaturaj kaj artaj kritikistoj kiaj Belinskij, Ĉerniševskij kaj Dobroljubov. Ili estis burĝaj demokratoj de la rusa cara epoko, kaj iliaj ideoj ne estis marksismaj, sed burĝaj. La burĝa demokratia revolucio estas revolucio de unu ekspluatanta klaso kontraŭ alia ekspluatanta klaso, kaj nur la proleta socialisma revolucio estas la revolucio kiu fine eliminos ĉiujn ekspluatantajn klasojn. Tial, ni absolute ne povas preni la ideojn de iu ajn burĝa revoluciulo kiel la gvidan principon en nia proleta ideologia aŭ literatura kaj arta movado. En la tridekaj jaroj ankaŭ ekzistis bona ekzemplo. Tio estis la maldekstra batalanta literatura kaj arta movado estrata de Lusin. En la lasta periodo de la tridekaj jaroj, iuj gvidantoj de la maldekstra alo, sub la influo de la dekstra kapitulacisma linio de Vang Ming, forlasis la klasan vidpunkton de marksism-leninismo kaj elmetis la sloganon "literaturo de nacia defendo". Tio estis burĝa slogano, sed la proleta slogano "amasa literaturo de la nacia revolucia milito" estis elmetita nur de Lusin. Parto de la maldekstraj laborantoj de literaturo kaj arto, precipe Lusin, ankaŭ elmetis la sloganon, ke literaturo kaj arto devas servi al la laboristoj kaj kamparanoj, kaj la lastaj devas mem krei siajn proprajn literaturon kaj arton. Sed ili ne sisteme solvis la bazan problemon de kunigo de literaturo kaj arto kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, ĉar la plejparto de ili estis burĝaj



naciistoj-demokratoj. Unuj el ili ne eltenis la provon de la demokratia revolucio, kaj alia ne bone sukcesis en la socialisma provo.

Necesas forigi superstiĉon pri la klasika literaturo en- kaj ekster-landa. La klasikaj literaturoj kaj artoj de Ĉinio kaj Eŭropo (inkluzive de Rusio) havas grandan influon al la literatura kaj arta rondoj de nia lando. Iuj rigardis ilin kiel sanktan klasikaĵon kaj akceptis ilin en plena kompleto. Prezidanto Maŭ instruas al ni: "Tute senkritikaj transpreno kaj imitado de antikvuloj kaj fremduloj en literaturo kaj arto estas la plej sentaŭgaj kaj malutilaj literatura dogmismo kaj arta dogmismo." Estas necese studi verkojn de la antikvuloj aŭ fremduloj, kaj rifuzi ilin studi estas erare, sed ni nepre devas studi ilin kritike kaj ĝi la antikvajn servi al la nuna tempo kaj la fremdajn servi al Ĉinio.

Koncerne la kompare pli bonajn revoluciajn literaturaĵojn kaj artaĵojn de Sovetunio, aperintajn post la Oktobra Revolucio, ni ankaŭ devas analizi ilin, sed ne blinde adori ilin, des pli ne blinde imiti ilin. Blinda imito ne povas fariĝi arto. Literaturo kaj arto devenas nur de la vivo, kiu estas ilia sola fonto. Tion atestas la tuta historia procezo de antikvaj, nuntempaj, en- kaj ekster-landaj literaturo ka arto.

PRAKTIKI DEMOKRATIAN CENTRALIZISMON KAJ AMASAN LINION

En la literatura kaj arta laboro, ĉiuj, ĉu gvidantoj ĉu verkistoj, devas praktiki demokratian centralizismon kaj subteni la praktikadon de "permeso al la amaso eldiri siajn opiniojn", sed kontraŭi la praktikadon de tio, ke "nur mi decidas". Ni devas sekvi la amasan linion kaj zorgi ke la politiko estu reliefigita. En la pasinteco iuj produktis verkojn, kaj anstataŭ aŭskulti la opiniojn de la amaso ili devigis la gvidantojn sankcii iliajn verkojn. Tiu ag-maniero estas tre malbona. La kadroj, kiuj respondecas pri la gvido de verkado, devas ĉiam memori jenajn du punktojn rilate al literaturaj kaj artaj verkoj: Unue, ili sciu bone aŭskulti la opiniojn de la vasta amaso; due, ili sciu bone analizi tiujn opiniojn kaj akceptu la korektajn, sed rifuzu la erarajn. Ne ekzistas verko tute sendifekta. Se iu verko estas fundamente bona, ni devas montri ĝiajn mankojn kaj erarojn por ke ili estu korektitaj. Malbonaj verkoj ne devas esti kaŝitaj, sed prezentataj al la amasoj por ricevi recenzon. Ni ne devas timi la amasojn, sed devas firme fidi al ili, ĉar ili povas doni al ni multajn valorajn opiniojn. Tio povas ankaŭ helpi tiujn, kiuj havas konfuzajn ideojn, altigi sian distingan kapablon.

DISVASTIGI REVOLUCIAN BATALANTAN AMASAN KRITIKON DE LITERATURO KAJ ARTO

Estas necese disvastigi revolucian batalantan amasan kritikon de literaturo kaj arto kaj likvidi la monopolon de kritiko de literaturo kaj arto de la malmultaj tiel nomataj "kritikistoj" (kiuj estas eraraj en direkto kaj kies argumentoj estas malfortaj). Ni devas meti la armilon de literatura kaj arta kritiko en la manojn de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj tiel kunigi la profesiajn kritikistojn kun tiuj el la amasoj. Ni devas plifortigi la batalspiriton en la kritiko kaj oponi senprincipan banalan laŭdadon. Ni devas reformi nian stilon de verkado, kuraĝigi skribon de pli da mallongaj popularaj artikoloj, transformi la literaturan kaj artan kritikon en ponardon kaj mangrenadon kaj lerni uzi ilin lerte en 200-metra proksima batalo. Kompreneble, ni ankaŭ devas skribi pli longajn artikolojn, kiuj estas sistemaj kaj kun pli granda teoria profundeco. Ni devas prezenti faktojn kaj rezoni logike, sed ne imponi aliajn per fakaj terminoj. Nur en tiu ĉi maniero ni povas malarmi la tiel nomatajn "kritikistojn de literaturo kaj arto". Recenzante literaturon kaj arton, ni devas varme subteni la bonajn aŭ fundamente bonajn verkojn kaj ankaŭ bonintence montri iliajn mankojn; dum al la malbonaj ni devas fari principan kritikon. En la kampo de literatura kaj


arta teorio la tipaj eraraj argumentoj devas esti laŭplane kaj ĝisfunde kritikataj. Ni ne devas timi la insulton pri "svingo de bastono". Kiam iuj homoj opinias nin krudaj kaj maldelikataj, ni devas fari analizon. Parto el niaj kritikoj estas fundamente korektaj, sed ne estas tiom konvinkaj, ĉar en ili mankas sufiĉa analizo kaj sufiĉa pruvado. Tio ĉi devas esti plibonigita. Iuj komence opinias nin krudaj kaj maldelikataj, sed poste, kiam ili pli bone komprenas la aferon, ili ne plu ripetas. Ni devas nepre resti firmaj kontraŭ la malamikoj, kiuj kondamnas niajn korektajn kritikojn kiel krudajn kaj maldelikatajn. La literatura kaj arta kritiko devas fariĝi regula laboro kaj grava metodo por disvolvi literaturan kaj artan lukton, kaj ĝi estas ankaŭ grava metodo por la Partio en la gvidado de literatura kaj arta laboro. Sen korekta literatura kaj arta kritiko, ni ne povas firme teni korektan direkton en literaturo kaj arto kaj prosperigi verkadon.

UZI LA PENSON DE MAŬ ZEDONG POR REEDUKI LA LITERATURAJN KAJ ARTAJN KADROJN KAJ REORGANIZI LA VICOJN DE VERKISTOJ KAJ ARTISTOJ

Por konduki ĝisfunde la socialisman kulturan revolucion, necesas reeduki la literaturajn kaj artajn kadrojn kaj reorganizi la vicojn de literaturaj kaj artaj laborantoj. Antaŭ longe, dum la periodo de batalo sur Ginggang-montaro, sub la rekta gvido de Prezidanto Maŭ kaj la brila lumo de "Rezolucio de Gutian-konferenco", la Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo starigis ruĝajn vicojn de literaturaj kaj artaj laborantoj. Dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, kun la disvolviĝo de la politika kaj milita forto de niaj Partio kaj armeo ankaŭ la vicoj de literaturaj kaj artaj laborantoj multe plivastiĝis. En la bazregionoj kaj en la armeo, ni elbakis certan nombron da revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj. Precipe post la publikigo de *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, ili firme sekvis la ĝustan direkton kaj la vojon de kuniĝo kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj ludis pozitivan rolon en la revolucia procezo. Sed post la Liberiĝo de la tuta lando, enirinte en grandajn urbojn, iuj el ili ne sukcesis rezisti la koruptan influon de la burĝa ideologio kaj postiĝis dum nia antaŭenmarŝo. La literaturaj kaj artaj laborantoj, kiuj nove aliĝis al la armeo, kunportis kun si la influon de diversaj burĝaj literaturaj kaj artaj ideoj. Estas ankoraŭ malmultaj homoj kiuj tute ne sin reformis kaj persiste restas je la burĝa starpunkto.

Niaj literaturo kaj arto estas la literaturo kaj arto de la proletaro kaj la Partio. La principo de la partieco de la proletaro estas la plej evidenta signo, kiu distingas nin de aliaj klasoj. Ni devas scii, ke la reprezentantoj de aliaj klasoj ankaŭ havas sian principon de partieco, cetere tre obstinan. Ni devas ĉiam insisti je la principo de la partieco de la proletaro kaj oponi kontraŭ la koruptado de la burĝa ideologio, ĉu en gvid-principoj pri verkado, ĉu en organiza linio, ĉu en laborstilo. Ni devas nepre streki klaran limlinion inter ni kaj la burĝa ideologio, kaj nepre ne devas pace kunekzisti kun ĝi.

Sin trovas diversaj problemoj inter la literaturaj kaj artaj laborantoj de nia armeo, sed por la plejparto de tiuj la problemoj estas ĝustigi la penson, profundigi la komprenon, ricevi edukadon kaj levi sin al pli alta nivelo. Ni nepre devas rigardi la verkojn de Prezidanto Maŭ kiel la plej altan instrukcion, serioze studi kaj kompreni liajn literaturajn kaj artajn pensojn kaj meti ekstreme grandan atenton sur la praktikadon de tiuj pensoj. Ni devas kreive studi kaj kreive praktiki liajn pensojn en intima ligo kun niaj propraj pensoj kaj kun la realeco, por ke ni vere posedu la penson de Maŭ Zedong. Ni devas, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, "iri por longa tempo, senrezerve kaj tutkore, inter la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, en la ardajn batalojn, en la solan plej vastan kaj plej riĉan fonton", kuniĝi kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, reformi nian penson, altigi nian politikan konscion kaj servi tutkore kaj tutanime al la ĉina popolo kaj la popoloj de la tuta mon-



do, pensante nek pri famo nek pri profito kaj timante nek suferon nek morton. Dum la tuta vivo ni devas studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, labori por la revolucio kaj reformi niajn pensojn. Nur tiamaniere, ni povos esti vere kapablaj, kiel instrukciis kamarado Lin Biaŭ, elteni ĉian ajn provon en nia penso, nia vivo kaj nia profesia lerteco. Kaj nia literatura kaj arta laboro povos pli bone servi al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, al socialismo kaj al la firmigo kaj altigo de la batalforto de la armeo.

Nun jam aperis alttajdo de la granda socialisma kultura revolucio, kaj leviĝas amasa movado de granda socialisma kultura revolucio. Tiu ĉi granda revolucia tajdo neeviteble forlavos ĉiajn malpuraĵojn de diversaj malnovaj burĝaj ideoj pri literaturo kaj arto, kaj enkondukos novan eraon de socialismaj, proletaj literaturo kaj arto. Antaŭ tiu bonega revolucia situacio ni devas esti fieraj kiel ĝisfundaj revoluciistoj. Nia socialisma revolucio estas revolucio por fine likvidi la ekspluatantajn klasojn kaj ekspluatantajn sistemojn, kaj elradiki ĉiajn ideologiojn de la ekspluatantaj klasoj, venenantajn la popolamason. Ni devas havi memfidon kaj kuraĝon aŭdace entrepreni kion la antaŭuloj ne faris. Sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio, Prezidanto Maŭ kaj la Komisiono pri Militaj Aferoj, ni devas pli alte teni la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, aktive partopreni en la granda socialisma kultura revolucio, firme konduki tiun ĉi revolucion ĝis la fino kaj strebi al kreado de novaj socialismaj literaturo kaj arto indaj al nia granda lando, nia granda Partio, nia granda popolo kaj nia granda armeo.

NOTOJ

La Vivo de Vu Hjun: Malbona filmo, kiu kalumnias la revolucian tradicion de la ĉina popolo kaj distrumpetas burĝajn reformismon kaj kapitulacismon. Vu Hjun vivis en King-dinastio kaj estis sklavulaĉo de la bienularo, sed la filmo prezentas lin kiel "grandan homon", kiu volonte oferis sin por havigi al la infanoj de malriĉaj kamparanoj ŝancon de edukiĝo. *Renmin Ribao* (*Popola Ĵurnalo*) publikigis ĉefartikolon je la 20-a de majo 1951, por serioze montri la reakciecon de la filmo *La Vivo de Vu Hjun* kaj alvokis la tutan landon fari kritikon kontraŭ ĝi. Tio estis la unua grandskala kritiko kontraŭ la burĝa reakcia ideologio post la fondiĝo de la nova Ĉinio.

Studo pri la Romano "Sonĝo de Buduaro": Verko de Ju Pingbo, kiu faris studon pri *Sonĝo de Buduaro* laŭ la vidpunkto de burĝa ideismo kaj per skolastika metodo. En septembro de 1954 disvolviĝis tra la tuta lando kritikado pri tiu ĉi verko. Tio estis batalo de la proletaj ideoj kontraŭ la burĝaj ideoj en la sfero de ideologio kaj estis batalo kontraŭ la burĝa ideismo.

Kontraŭrevolucia Kliko de Hu Feng: Hu Feng estas renegato, kiu poste reenmiksiĝis en la vicojn de revoluciuloj. Post la Liberiĝo li organizis bandaĉon por fari kontraŭrevoluciajn agadojn en la literaturaj kaj artaj rondoj. En 1954 li prezentis 300,000-vortan "proponskribon" al la Centra Komitato de la Partio kaj malice atakis la politikon de la Partio kaj la penson de Maŭ Zedong pri literaturo kaj arto. En majo kaj junio de 1955 *Renmin Ribao* publikigis sinsekve tri kolektojn da materialo pri la kontraŭrevolucia kliko de Hu Feng kaj ĝisfunde malkaŝis kaj frakasis la kontraŭrevolucian konspiron de tiu kliko.

Teorio de "Skribo de la Vero": Ĝi estas reviziisma teorio pri verkado. La kontraŭrevoluciulo Hu Feng pledis por "skribo de la vero", kaj la samon faris ankaŭ Feng Hjuefeng k. a. Ili emfazis tion kun kaŝita celo; sub la slogano de "skribo de la vero" ili klopodis kontraŭstari la klasan karakteron kaj tendencon de socialismaj literaturo kaj arto kaj la edukadon de la popolo en la socialisma spirito pere de literaturo kaj arto. Ili volis serĉi ekskluzive malhelan angulon kaj historian rubon en la reala vivo de socialismo, kaj ili distrumpetis "skribon de la vero" celante bildigi la lum-plenan socialisman socion kiel dense malluman.

Teorio de la "Larĝa Vojo de Realismo": Iuj kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj elementoj en la literaturaj kaj artaj rondoj kontraŭstaris la *Paroladojn ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ, dirante ke la eldiroj jam elmodiĝis, kaj ke oni devas aparte malfermi ian alian larĝan vojon. Ĝuste tia estas

la teorio de la "larĝa vojo de realismo", proponita de Kin Ĝaŭjang kiel reprezentanto. La proponantoj de tiu teorio opiniis, ke la plej ĝusta kaj plej larĝa vojo de servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas tro mallarĝa kaj estas "rigida, ŝtoniĝinta dogmo", kiu "desegnis al la homoj fikse nemoveblan vojeton". Ili distrumpetis, ke la verkistoj estu permesitaj libere skribi, laŭ "la malsameco de siaj viv-sperto, edukiteco kaj temperamento, arta individueco kaj ceteraj kondiĉoj", kion ili ŝatas, kaj ke estu permesite devii de la direkto de servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj por serĉi ian "senlime larĝan regionon por disvolvi sian kreemon".

Teorio de "Profundiĝo de Realismo": Kiam Ŝaŭ Kjuanlin distrumpetis pri "priskribo de mezaj personoj", li samtempe elmetis la teorion de "profundiĝo de realismo". Tiu teorio postulis la verkiston priskribi la "malnovajn objektojn" troviĝantajn ĉe la popolamaso, resumi la "spiritan ŝarĝon kiun la individuaj kamparanoj heredis de jarmiloj" kaj krei figurojn de "mezaj personoj" kun komplika, kompleksa karaktero. Ĝi postulis, ke la verkisto priskribu "banalajn" aferojn por realigi la celon "vidi la grandan pere de la malgranda" kaj "observi la senliman universon pere de grajno de rizo". Laŭ li literatura verko estas realeca, nur kiam ĝi priskribas "mezajn personojn" kun koro plena de kontraŭdiroj, resumas la "spiritan ŝarĝon kiun la individuaj kamparanoj heredis de jarmiloj" kaj priskribas la "vojon plenan de malfaciloj kaj suferoj", kiun ili sekvas de individua ekonomio al kolektiva ekonomio; kaj nur rezulte de tio "profundiĝas" realismo. Kontraŭe, prikantado pri la revolucia heroismo de la popolamaso kaj priskribo de la heroaj figuroj de la popolamaso estas neveraj kaj nerealaj. La teorio de "profundiĝo de realismo" estas varo venigita rekte el la magazeno de burĝa kritika realismo kaj estas eksterordinare reakcia teorio de literaturo kaj arto.

Teorio de Kontraŭstaro al "Subjekto Kiel Decida Faktoro": La teorio de kontraŭstaro al "subjekto kiel decida faktoro" estas literatura kaj arta ideo kontraŭsocialisma. Tian Han, Hia Jan kaj aliaj estis aktivaj propagandantoj de tiu teorio. Kiam proletaj verkistoj elektas subjektojn por skribi, ili unue konsideras, ĉu tiuj subjektoj utilos al la popolo. La elekto kaj priskribo de certa subjekto celas senescepte starigi la proletajn ideojn kaj forigi la burĝajn ideojn kaj instigi la amason iri senŝanceliĝe la vojon de socialismo. Tiuj, kiuj oponas kontraŭ "subjekto kiel decida faktoro", opinias ke tiuj korektaj opinioj estas sensencaj reguloj kaj ke "estas necese ĝisfunde forigi ilin". Sub la preteksto de plivastigo de subjektoj, ili pledis por la ideo forlasi la "klasikaĵon de revolucio" kaj perfidi la "ortodoksaĵon de milito". Ili diris, ke en niaj filmoj estas tro multe da priskribo pri revolucio kaj armita batalo, kaj ke filmoj de novaj specoj ne povas aperi sen forlaso de la "klasikaĵo" kaj perfido al la "ortodoksaĵo". Aliaj propagandis, ke oni devas priskribi "homecon", "homaran amon", "malgrandajn personojn", "malgrandajn aferojn" ktp. Tiuj opinioj fakte celas flankenigi literaturon kaj arton de la vojo de servo al la proleta politiko.

Teorio de "Mezaj Personoj": La ĉefa iniciatinto de la erara ideo de "priskribo de mezaj personoj" estas Ŝaŭ Kjuanlin, iama vicprezidanto de Ligo de Ĉinaj Verkistoj. De la vintro de 1960 ĝis la somero de 1962, li fojon post fojo propagandis tiun ĉi ideon. Li kalumniis la plejmulton de niaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj kiel homojn, kiuj ŝanceliĝas inter socialismo kaj kapitalismo kaj sin trovas en la "meza stato", kaj li insistis, ke literaturo kaj arto devas pli multe priskribi tiajn "mezajn personojn". Li celis, pere de "priskribo de mezaj personoj", dissemi dubemon kaj ŝanceliĝemon al socialismo kaj bojkoti kaj kontraŭstari la priskribadon pri la herooj de la socialisma epoko en literaturaj kaj artaj verkoj.

Teorio de Kontraŭstaro al "Pulvodoro": La literaturo de moderna reviziismo bombaste priskribas la terurecon de milito, propagandas la "filozofion de vivkonservo" kaj kapitulacismon kaj subfosas la batal-volon de la popolo, metante sin en servo al imperiismo. Dum la lastaj jaroj aperis ankaŭ en nia lando tiaj homoj, kiuj kriadas, ke niaj literaturaj verkoj tro odoras je pulvo kaj aperas sur nia scenejo tro multe da pafiloj, tiel ke malaperis artismo. Ili postulas, ke la verkistoj forlasu la "klasikaĵon de revolucio" kaj ribelu kontraŭ la "ortodoksaĵo de milito". La teorio de kontraŭstaro al "pulvodoro" esence estas reflekto de la reviziismaj literaturaj kaj artaj ideoj en la literatura kaj arta rondo de nia lando.

Teorio de "Kuniĝo de Diversaj Tendencoj Kiel la Spirito de la Epoko": Ĝi estas erara teorio kontraŭmarksism-leninisma, elmetita de Ĝoŭ Guĉeng kiel reprezentanto. Li ne rekonis, ke la spirito de la epoko estas tiu, kiu puŝas la epokon antaŭen, kaj ke la reprezentanto de la spirito de la epoko estas la progresinta klaso kiu puŝas la epokon antaŭen. Li diris, ke nur la "kuniĝo" de la "malsamaj ideologioj de malsamaj klasoj" povas esti nomata la spirito de la epoko, kiu inkluzivas ĉiujn spiritojn "pseŭdrevolucian, nerevolucian, eĉ kontraŭrevolucian k. a." La teorio de "kuniĝo de diversaj tendencoj kiel la spirito de la epoko" estas centprocente teorio de klasa paciĝo ĝisoste reakcia.

Belinskij (1811 - 1848): Rusa demokrato, literatura kritikisto, filozofo kaj beletristo. Pere de agado en literatura kaj arta kritiko li kontraŭstaris la servutulan sistemon kaj aŭtokration de la cara epoko.

Ĉerniševskij (1828 - 1889): Rusa demokrato, kritikisto kaj verkisto. Li persistis ĉe revoluciaj demokratiaj ideoj kaj kontraŭstaris la caron kaj servutulan sistemon.

Dobroljubov (1836 - 1861): Rusa demokrato kaj literatura kaj arta kritikisto. Li okupis sin pri agado kontraŭ la cara reĝimo kaj servutula sistemo.

Nepre Ne Forg

Ĉefartikolo de la Ĵurnalo

(4-a majo

La publikigo de nia ĉefartikolo "Alte Tenu la Grandan Ruĝan Flagon de la Penso de Maŭ Zedong, Aktive Partoprenu en la Granda Socialisma Kultura Revolucio" elvokis fortan resonon en kaj ekster la Armeo. Kun alta revolucia fervoro vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj vasta revolucia kadraro amase sendas al la redakcio leterojn kaj artikolojn, aktive partoprenas en la batalo kaj montras grandegan indignon kontraŭ la nigra linio kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma en la kultura kampo. Ili konstatas, ke la granda debato, nun disvolviĝanta sur la kultura fronto, absolute ne estas sole problemo pri kelkaj artikoloj, kelkaj dramoj kaj kelkaj kinofilmoj, nek nur akademia diskutado, sed ekstreme akra klasbatalo, batalo pri principa praveco kaj principa malpraveco por gardi la penson de Maŭ Zedong, batalo intensa kaj longtempa kiu decidos inter la proletaro kaj burĝaro pri la demando — kiu venkos kiun — en la ideologia kampo. Ni devas energie starigi la proletan ideologion kaj plene elimini la burĝan ideologion en la sciencaj, edukaj, ĵurnalismaj, literaturaj, artaj kaj aliaj kulturaj rondoj. Tio estas la ŝlosila problemo en pliprofunda disvolviĝo de la socialisma revolucio en nia lando je la nuna etapo, ĝi estas problemo, kiu koncernas la tuton, ĝi estas afero kun unuaranga graveco, kiu koncernas la sorton kaj estontecon de niaj Partio kaj ŝtato, kaj ankaŭ la revolucion de la tuta mondo. Ĉiu el ni revoluciaj batalantoj ne povas ne zorgi pri tiu batalo kaj ne povas ne partopreni en ĝi. Ni nepre devas leviĝi responde al la alvoko de nia Partio, alte teni la grandan ruĝan flagon de la penso de Maŭ Zedong, aktive partopreni en tiu ĉi klasbatalo kaj firme konduki la grandan socialisman kulturan revolucion ĝis la fino.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: En socialisma socio ankoraŭ ekzistas klasoj kaj klasbatalo, kaj ekzistas batalo inter la du vojoj de socialismo kaj kapitalismo. Socialisma revolucio sola sur la ekonomia fronto (en la posedsistemo de produktaj rimedoj) estas nesufiĉa kaj ne povas esti solida. Devas esti ankaŭ ĝisfunda socialisma revolucio sur la politika kaj ideologia frontoj. En la politika kaj ideologia sferoj, tre longan tempon bezonas la batalo inter socialismo kaj kapitalismo por decidi, kiu venkos kiun. Dekoj da jaroj ne sufiĉas; por atingi la sukceson estas necesaj cent ĝis kelkcent jaroj. Fakto montriĝas ĝuste tia, kiel Prezidanto Maŭ montris. Dum la 16 jaroj post la Liberiĝo, en kiu jaro, en kiu monato kaj en kiu tago ĉesis klasbatalo sur la kultura fronto? Ekzemple, la kritiko pri la filmo *La Vivo de Vu Hjun* en 1951; la kritiko pri la *Studo pri la Romano "Songo de Buduaro"* en 1954 kaj poste la kritiko pri la reakciaj ideoj de Hu Ŝi; la kritiko pri Hu Feng kaj batalo kontraŭ la kontraŭrevolucia kliko de Hu Feng en 1955; la rebato kontraŭ la furioza ofensivo de dekstraj fortoj de la burĝaro sur kultura fronto en 1957; depost 1959, la apero de multego da burĝaj kaj reviziismaj venenaj herboj en la kampoj de filmo, teatraĵo, literaturo k. a. kaj nia batalo kontraŭ ili; la kritiko pri la tezo de Jang Hiangen "kuniĝo de du en unu" en 1964 kaj la nun profunden progresanta granda polemiko komencita per kritiko pri la dramo *Deoficigo de Haj Ĵuj* skribita de Vu Han, ktp. ktp. Unu batalo sekvas alian, kaj ĉiu batalo ĉiam pli profundiĝas ol la antaŭa. Post forigo de tiu ĉi nigra linio, aperos ankoraŭ nova nigra linio kaj oni devos ankoraŭ denove batali. Tio montras, ke klasbatalo ne dependas de homa volo kaj estas neevitebla. La burĝa klasa naturo de la kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj elementoj ĉiam obstine penas sin esprimi per ĉiaj metodoj. Estas ne eble postuli, ke ili ne spegulu kaj esprimu sin. Tiuj homoj subtenas socialismon buŝe, sed fakte sopiras al kapitalismo, mortfirme ĉirkaŭpremante la kadavron de burĝaro kaj nevolan-

Liberiga Armeo (Jiefangjun Bao)
1966)

te ĝin forlasi. Ili havas malamikan humoron kontraŭ la proleta diktaturo kaj en iliaj koroj estas enpremitaj malamo kaj kontraŭsento kontraŭ la Partio kaj socialismo, kiuj eliĝas tuj en konvena vetero, kaj ili amase elvenas ĉe ĉiu eta blovado. De post ili estis ripete malkovritaj, kritikitaj kaj draŝitaj de la vastaj amasoj, ili komencis adopti metodojn pli kaŝitajn, pli ruzajn, pli ĉirkaŭirajn kaj pli malrektajn por daŭre ataki kontraŭ la Partio kaj socialismo.

Aparte notinda estas tio, ke en la nova klasbatala situacio la atako de la plenmano da nunaj kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj elementoj kontraŭ ni havas novajn karakterizaĵojn. Tiuj homoj levas "ruĝan flagon" antaŭ si por ataki ruĝan flagon kaj portas la surtuton de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong por ataki marksism-leninismon kaj la penson de Maŭ Zedong. Utiligante la oficojn kaj povojn donitajn al ili de la Partio kaj registaro, ili tenis monopole por si iujn sekciojn aŭ instituciojn, rezistis kontraŭ la gvidado de la Partio kaj entreprenis kontraŭpartiajn kaj kontraŭsocialismajn krimagojn pere de la aparatoj, kiujn ili disponis. Ili plejparte estas tiel nomataj "aŭtoritatuloj", havantaj ian "famon" en la socio, kaj iuj, kiuj ne scias la veron, havas eĉ certan blindan kredon al ili. Ili mem kredas, ke ili havas ankoraŭ kapitalon por provi la forton kun la proletaro, kaj per ĉiuj fortoj defendas la obstinan fortikaĵon de burĝa ideologio. Iliaj kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj agadoj ne estas izolaj kaj hazardaj fenomenoj. Internacie ili interrespondas kun la kontraŭĉina ĥoro de imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj, kaj enlande ili spiras per la samaj naztruoj kun la sinrestarigaj agadoj de la renversitaj reakciaj klasoj kaj kunordiĝas kun la kontraŭpartiaj agadoj de la dekstraj oportunistoj en-partiaj. Iliaj kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj agadoj havas certan trompecon kaj seriozan danĝerecon. Nia batalo kontraŭ ili estas vivmorta. Pri tio ni devas havi sufiĉan komprenon kaj altan singardemon. Estas fakto ke iuj kamaradoj ankaŭ skribis iujn malbonajn verkojn, sed ili havas la saman koron kun la Partio kaj socialismo, kaj iliaj eraroj kaj mankoj povas esti korektitaj en praktikado. Ni devas rigore diferencigi tiujn kamaradojn de la plenmano da kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj elementoj.

Antaŭ nia venko tra la tuta lando, Prezidanto Maŭ jam admonis nin:

Post la elimino de la malamikoj kun pafiloj, restos ankoraŭ la malamikoj sen pafiloj, kiuj nepre faros vivmortan batalon kontraŭ ni, kaj ni ne devas subtaksi ilin. Se ni ne tiel prezentas kaj ne tiel komprenas la demandon nun, ni faros grandegajn erarojn.

Restarigo de kapitalismo ĉiam prenas formon de perforto aŭ formon de "paca evoluo", aŭ ambaŭ formojn kunordigitajn. La usona imperiismo kaj aliaj klasaj malamikoj en- kaj ekster-landaj ne nur intencas renversi nin per fortoj, sed ankaŭ intencas konkeri nin per metodo de "paca evoluo" kaj per "sukertegitaj obusoj". Ili ĉiamaniere disvastigas reakciajn politikajn kaj ideologiajn venenaĵojn kaj burĝan vivmanieron, por korupti kaj dissolvi la komunistojn, proletaron kaj aliajn revoluciajn popolanojn, por ke inter niaj vicoj tiuj, kiuj havas malfortan volon, degeneru en burĝajn elementojn, kaj ke socialismo degeneru iom post iom en kapitalismon. Grandega instruo estas la fakto, ke sub la kontrolo kaj monopoligo de plenmano da reviziistoj kiuj uzurpis la gvidon de la Partio kaj registaro, en Sovetunio — la unua granda socialisma lando kreita de Lenin kaj naskita en la kanonado de la Oktobra Revolucio, jam komenciĝis kaj daŭre kontinuas la procedo de "paca

evoluo" al la vojo de restarigo de kapitalismo. Prezidanto Maŭ instruas al ni:

Klasbatalo, porprodukta batalo kaj scienca eksperimentado estas la tri grandaj revoluciaj movadoj por konstrui potencan socialisman landon. Tiuj movadoj estas solida garantio por tio, ke komunistoj sin liberigu de burokratismo, iĝu imunaj kontraŭ reviziismo kaj dogmismo, kaj restu por ĉiam nevenkeblaj. Ili estas fidinda garantio por tio, ke la proletaro povu sin unuigi kun la vastaj laborantaj amasoj por realigi la demokratian diktaturon. Se, pro manko de tiuj movadoj, la bienuloj, riĉkamparanoj, kontraŭrevoluciuloj, malbonaj elementoj kaj diversspecaj demonoj amase aperus, dum niaj funkciuloj fermus siajn okulojn al ĉio ĉi tio kaj multaj eĉ ne distingus inter la malamikoj kaj niaj propraj homoj, sed kunlaborus kun la malamikoj kaj fariĝus koruptitaj kaj senmoraligitaj, dispartigitaj kaj trenitaj en la malamikan tendaron aŭ la malamikoj enŝteliĝus en niajn vicojn, kaj multaj el niaj laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj fariĝus sendefendaj kontraŭ la samo antaŭ la samtempe praktikataj molaj kaj malmolaj taktikoj de la malamikoj, do antaŭ ol pasos longa tempo, eble nur kelkaj aŭ dekkelkaj jaroj, maksimume, kelkaj jardekoj neeviteble okazos kontraŭrevolucia restariĝo tra la tuta lando, la marksism-len'nisma Partio sendube fariĝos reviziisma aŭ faŝisma partio, kaj la tuta Ĉinio ŝanĝos sian koloron.

Ni nepre memoru la instrukcion de Prezidanto Maŭ, ke la klasbatalo en la periodo de socialismo nepre ne devas esti forgesita kaj la batalo kontraŭ malamikoj sen pafiloj absolute ne devas esti ignorata.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: "Certa kulturo (kulturo kiel ideologio) estas spegulIiĝo de la politiko kaj ekonomio de certa socio, kaj samtempe donas grandajn influon kaj efikon al la politiko kaj ekonomio de tiu socio." "Kultura revolucio spegulas ideologie la politikan kaj ekonomian revoluciojn kaj servas al ili." Prezidanto Maŭ ankaŭ instruas al ni: "...Ni rekonas, ke en la ĝenerala historia disvolviĝo la materia determinas la spiritan, socia ekzisto determinas socian konscion; sed samtempe ni ankaŭ rekonas kaj devas rekoni la reefikon de spirito, la reefikon de socia konscio al socia ekzisto kaj la reefikon de superstrukturo al ekonomia bazo." Dum la 16 jaroj post la Liberiĝo, en nia lando la socialisma ekonomia bazo kaj la regpotenco de la proleta diktaturo jam stariĝis kaj ĉiam pli firmiĝas tagon post tago, la socialisma revolucio sur la ekonomia kaj politika frontoj jam akiris grandan venkon. Sed, la politikaj vidpunktoj kaj ideologio de la renversitaj burĝa kaj aliaj ekspluataj klasoj ankoraŭ havas tre grandan influon. Ili ne nur malhelpas la disvolviĝon de la socialisma ekonomia bazo, sed ankaŭ energie klopodas trabati vojon al restarigo de kapitalismo per la burĝa kaj reviziisma kulturo. La problemo — kiu venkos kiun — en la sfero de ideologio ankoraŭ restas fore de solviĝo. Ni nepre devas priatenti la reefikon de superstrukturo al ekonomia bazo kaj la klasbatalon en la sfero de ideologio. Sen la venko de socialisma revolucio en la sfero de ideologio ne povas esti fortikigita ankaŭ la socialisma revolucio sur la ekonomia kaj politika frontoj.

Ni nepre ne pensu, ke la senbrida atako kontraŭ ni fare de plenmano da reviziismaj kaj burĝaj elementoj estas nur "ribelo de librovermoj", kiu povos atingi nenion gravan. Ni nepre ne pensu, ke la lukto inter ni kaj ili estas nur "skermo per plumoj", kiu ne koncernas la tutan situacion de nia afero. Fakte, ĉiu ajn restarigo de kontraŭrevolucio komenciĝas unue en la sferoj de spirito, kiaj ideologio, superstrukturo, teorio, sciencoj, literaturo, arto kaj aliaj, por krei publikan opinion favoran por si. En tiu maniero la Ĥruŝĉov-reviziismo uzurpis la gvidantecon de la Komunista Partio de Sovetunio. Simile, en la hungara kontraŭrevolucia perforta tumulto de la jaro 1956, aro da reviziismaj, burĝaj literaturistoj, artistoj kaj intelektuloj ludis la rolon de pioniroj sin organizinte en la klubo Petofi. La nuntempa furioza atako kontraŭ la Partio kaj socialismo fare de la plenmano da reviziismaj kaj burĝaj elementoj en nia lando celas ĝuste ankaŭ efektivigi sian belan sonĝon de restarigo de kapitalismo. Se ni perdus singardemon kontraŭ tiuj malamikoj sen pafiloj, ne decideme rebatus ilin, sed permesus la burĝan ideologion libere inundi kaj ilian intrigon sukcesi, do estiĝus

danĝero, ke la murbazo de socialismo estos subfosita kaj nia lando ŝanĝos sian koloron.

Nia Ĉina Popola Liberiga Armeo estas armeo de laboristoj kaj kamparanoj, kreita kaj gvidata de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, ĝi estas la ĉefa kolono de la proleta diktaturo kaj defendanto de la socialisma afero. Unuflanke, ni devas per akra vido observi la agadojn de la malamikoj kun pafiloj kaj esti ĉiam pretaj venki la armitajn atakojn fare de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, aliflanke, ni ankaŭ devas viglege gardi nin kontraŭ la malamikoj senpafilaj kaj decideme frakasi ĉiujn kontraŭpartiajn kaj kontraŭsocialismajn krimajn intrigojn de la burĝaro. Niaj kadroj kaj batalantoj devas montri sin ne nur bravaj sturmantoj sur la batalkampo, kie interkruciĝas veraj pafiloj kaj kugloj, sed ankaŭ proletoj kun malmolaj ostoj kontraŭ "sukertegitaj obusoj" sur la politika-ideologia fronto. Ni nepre devas sekvi la instruon de Prezidanto Maŭ kaj plene koni la longdaŭrecon, zigzagecon kaj komplikecon de la klasbatalo dum la periodo de socialismo kaj neniam forgesi la klasbatalon en ĉiu ajn okazo. Ni nepre devas armi nian kapon per la penso de Maŭ Zedong kaj observi, analizi kaj trakti ĉion per vidpunkto de klasbatalo kaj metodo de klasanalizo. Kritiku ĉiun trovitan eraraĵon, elradiku ĉiun viditan venenan herbon kaj faligu ĉiun renkontitan demonon aŭ diablon, neniam permesu al ili libere krimi kaj malordon krei.

La instrukcio de k-do Lin Biaŭ pri elstarigo de politiko estas bazita ĝuste sur la teorio de Prezidanto Maŭ, ke en la socialisma socio ankoraŭ ekzistas klasoj kaj klasbatalo. Politiko estas lukto de klaso kontraŭ klaso. Nia elstarigo de politiko estas nenio alia ol elstarigi la proletan politikon kaj lukti, kun la penso de Maŭ Zedong kiel orientilo kaj klasbatalo kiel akso, por starigi la proletan ideologion kaj elimini la burĝan ideologion. Nia armeo ne vivas en vakuo. Klasbatalo en la socio neeviteble speguliĝas en la armeo kaj la penso de ĉiu el ni pere de diversaj kanaloj. Ni nepre ne devas subtaksi la influon kiun donas al ni klasbatalo en la sfero de ideologio. Bonaj verkoj de literaturo kaj arto kaj bonaj artikoloj povas altigi nian politikan konscion kaj inspiri al ni batalvolon. Dum de malbonaj filmoj, teatraĵoj, noveloj, romanoj kaj artikoloj — se ni ne distingas ilin, bojkotas ilin kaj kritikas ilin — nia penso veneniĝos, iom post iom ŝanĝiĝos kaj direktiĝos al malĝusta vojo. La historia sperto atestas, ke ĉiuj malamikoj, kiel ajn kruelaj ili estas kaj kian ajn artifikon ili faras, estas ne timindaj. Timindaj estas niaj propraj perdo de singardemo kaj sinmalarmo en ideologio. La nuna granda socialisma kultura revolucio estas eduko de klasbatalo plej viva kaj plej praktika, kaj ankaŭ provo al ĉiu el niaj kadroj kaj batalantoj en politiko kaj ideologio. Ĉiu el niaj kamaradoj devas, kun alta politika devsento kaj grandega revolucia fervoro, atenteme observi kaj prizorgi la situacion de la nuna granda kultura revolucio, kaj aktive sin ĵeti en tiun grandan lukton por ke ĉiu estu hardata, edukata kaj reformata kaj altigu sian politikan konscion en ĝi.

La epoko de Maŭ Zedong estas epoko, dum kiu la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj posedas teorion. En tiu granda socialisma kultura revolucio, la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj montras sin kiel rolanto de ĉefa forto. Kvankam la tiel nomataj "instruituloj", "specialistoj" kaj "profesoroj", kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj, sin kovras per diverskoloraj surtutoj, impone afektas kaj intence artifikas, sed ili sukcesos nek timigi nin, nek trompi nin. Ni havas la penson de Maŭ Zedong kiel nevenkeblan batalilon kaj ardan koron fidelan al la Partio, al socialismo kaj al la penso de Maŭ Zedong. La vero estas en niaj manoj. Niaj kadroj kaj batalantoj havas firman starpunkton kaj portas klaran standardon, flaras kaj vidas akre, ili povas klare distingi nin mem disde la malamikoj kaj pravon disde malpravo. Se ni nur penas kreive studi kaj apliki la verkojn de Prezidanto Maŭ, armas nian kapon per la penso de Maŭ Zedong, kuraĝas malestimi la tiel nomatajn "aŭtoritatulojn" de reviziistoj kaj burĝaj elementoj kaj frakasi la blindan kredon al ili, ni certe povas travidi kaj malkaŝi la veran vizaĝon de tiuj demonoj kaj diabloj, kaj eksponi ilin sub la sunlumo. Ni pli alte tenu la grandan ruĝan flagon de la penso de Maŭ Zedong, decideme forigu la kontraŭpartian kaj kontraŭsocialisman nigran linion de la burĝaro kaj reviziismo, kaj konduku la grandan socialisman kulturan revolucion ĝis la fino.

JAŬ VENJUAN:

Pri "Trifam

— La Reakcia Esenco de *Noktaj Babiloj*

Je la 16-a de aprilo, la gazeto *La Fronto* kaj *Pekina Ĵurnalo* publikigis materialojn sub la titolo "Kritiko pri 'Trifamilia Vilaĝo' kaj *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan*" kun vortoj de la redaktoroj. La "vortoj de la redaktoroj" diris: "Antaŭe niaj gazeto kaj ĵurnalo publikigis ĉi tiujn artikolojn, sed ne ĝusttempe ilin kritikis. Tio estas eraro. La kaŭzo estas tio, ke ni en praktiko ne metis proletan politikon en komando, kaj krome en niaj kapoj estas influoj de la burĝaj kaj feŭdklasaj pensoj. Tial ni perdis la starpunkton aŭ singardemon en tiu ĉi serioza batalado." Tio estas granda mensogo. La aŭtoro de *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* estas Deng Tuo, kaj *Notoj de Trifamilia Vilaĝo* estas nigra gastejo funkciigita de la trio Deng Tuo, Liaŭ Moŝa kaj Vu Han. Deng Tuo estas ĉefredaktoro de *La Fronto* kaj enmanigis al si kaj monopolis ankaŭ la gvidan postenon pri ideologiaj, kulturaj laboroj de Pekino. Li kaj liaj kunuloj de la "Trifamilia Vilaĝo" faris *La Fronton*, *Pekinan Ĵurnalon*, *Pekinan Vesperĵurnalon*... instrumentoj kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj, kaj per ili praktikis senbride dekstran oportunisman linion kontraŭpartian kaj kontraŭsocialisman, t. e. reviziisman, kaj rolis kiel parolantoj de la reakciaj klasoj kaj dekstraj oportunistoj en atako kontraŭ la Partio. Ĉu tio povus esti nur "perdi singardemon" kaj "ne ĝusttempe kritiki"? Tiom multe da venenaj herbegoj kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj ili ellasis, ĉu nur pro tio, ke en iliaj kapoj troviĝis nur iom da "influoj" de la burĝaj pensoj? Estas necese ĝisfunde malkaŝi tiun grandan trompon.

Oni ankoraŭ memoras, ke ĵus kiam komenciĝis la kritikado al *Deoficigo de Haj Ĵuj*, Deng Tuo sin montris kun sinteno de pravulo. Post intensa planado kaj intrigado li sub la pseŭdonimo Hiang Jangŝeng verkis longan artikolon "De *Deoficigo de Haj Ĵuj* al la 'Teorio de Heredo de Moralo' " kaj ĝin publikigis samtempe sur *Pekina Ĵurnalo* kaj *La Fronto*. Ĝi estas artikolo por savi Vu Han per "kritika" gesto kaj estas granda venenherbo kontraŭpartia kaj kontraŭmarksisma de la kapo ĝis la piedoj. Tiun artikolon aperigis samtempe kaj trumpete *Pekina Ĵurnalo* kaj *La Fronto*, ĉu tio povus esti nur "perdi singardemon"? aŭ nur "malatenti la klasbatalon sur la kultura kaj akademia fronto"? Ne, tute ne. Ilia "singardemo" estas tre akra. Ili tre atentas sian entreprenon de "klasbatalo" kontraŭ la Partio kaj popolo. Vidante tiam, ke la agado de Vu Han ne plu estas kaŝebla, ili ludis urĝeme pseŭdan "kritikon" pere de Deng Tuo. Longe ludinte rolon negativan, li neniel povis bone ludi la rolon pozitivan, kiam li tion deziris. Tial multloke li sin perfidis. Nun vidante, ke ankaŭ Deng Tuo ne plu estas sekura, ili denove ludis urĝeme pseŭdan kritikon sub la nomo de la redakcioj por obstine rezisti kaj malhelpi plian profundiĝon de la batalo. Sed ĉifoje ili ludis des pli fuŝe kaj des pli multe sin perfidis. La vortoj kiaj "ne meti proletan politikon en komando" aŭ "ne ĝusttempe kritiki", ĉio ĉi estas trompo. La celo estas nenio alia ol ŝajnigi sin stari ĉe la prava flanko per la ŝildo de "kritiko" al Deng Tuo kaj "Trifamilia Vilaĝo" por trompi la legantojn kaj la Partion.

Kun tia sinteno kiel ili povus igi klara la aferon? kaj "disvolvi seriozan kritikadon"? Ili diris en la vortoj de la redaktoroj, ke Vu Han "foje kaj refoje" "pledis por la eksigitaj dekstraj oportun-

ilia Vilaĝo"

ĉe Jansan kaj *Notoj de Trifamilia Vilaĝo*

istoj". Tiun fakton ili iam volis kaŝi, sed jam de longe ne povis, tial devigite nun ili povis nur tion konfesi. En la vortoj de la redaktoroj ili diris ankaŭ, ke Liaŭ Moŝa estas "ĉefgeneralo konscie kontraŭpartia, kontraŭsocialisma kaj oponanta la penson de Maŭ Zedong", sed fine pri Deng Tuo, ili diris nur, ke li "laŭdis mortintojn, obstine rekomendis lernadon de mortintoj", "grandamase propagandis la ideojn de feŭda kaj burĝa klasoj, oponis marksism-leninismon kaj la penson de Maŭ Zedong", sen iu ajn vorto pri lia agado kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma. Tio estas vere nekredebla. Ĉu multaj venenherboj en la pli ol 150 artikoloj de *Noktaj Babiloj ĉe Jansan* kaj en *Notoj de Trifamilia Vilaĝo* nur rekomendis "lernadon de mortintoj", nur propagandis la ideojn feŭdajn kaj burĝajn, kaj nur estis ideologia eraro sed ne politika problemo? El la "Trifamilia Vilaĝo" jam du familioj estas kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj, sed la alia familio skribinta plej multe da verkoj nur "rekomendis lernadon de mortintoj". Ĉu tio estas logika? Levi alte, faligi malpeze, kritiki en ŝajno, ebligi forglitiĝon en efektiveco — la celo estas nenio alia ol ludi ludon de "kritiko" al la publiko por rezisti la instrukciojn de la Centra Komitato de la Partio. Ĉu tio ne estas tre evidenta?

La artikolo "Kion Propagandis *Noktaj Babiloj ĉe Jansan*?" redaktita konforme al la vortoj de la redaktoroj same kaŝis la akran politikan demandon, kvankam ĝi longas je du plenaj paĝoj de la ĵurnalo. La ĉapitrotitoloj de la artikolo estas "Distordo de la Partia Politiko de 'Kune Floru Cent Floroj kaj Voĉojn Donu Cent Skoloj' kaj Pledo por Inundo de Burĝa Ideologio", "Beligi Ĉiuflanke la Feŭdan Socisistemon", "Per Kadavroj de Feŭdaj Antikvuloj Revivigi la Burĝan Animon", "Propagando de la Dekadenca Filozofio de Vivo de la Ekspluatantaj Klasoj" kaj "Sarkasmo al la Nuno per Antikvaĵoj kaj Ĉirkaŭaj Kaŝatakoj". Tiuj ĉapitrotitoloj manifestis la inklinon kaj juĝon de la redaktoroj. Tia redaktado ja aludis al la legantoj, ke *Noktaj Babiloj ĉe Jansan* ja enhavas nenion aŭ nur tre malmulton, kio oponas la Centran Komitaton de la Partio kaj Prezidanton Maŭ aŭ subtenas la dekstrajn oportunistojn, kaj ĝi estas en karaktero tute malsama kun *Deoficigo de Haj Ĵuj.* Meti la materialojn pri distordo de la politiko "kune floru cent floroj kaj voĉojn donu cent skoloj" okulfrape en la unua parto kaj tiujn de "sarkasmo al la nuno per antikvaĵoj" en la plej lasta parto. Kaj tie ili per kelkaj vortoj kaj kun malgrava priskribo kontraŭvole kolektis du paragrafojn kiel ornamaĵojn. Por la akrevidantoj la malfacila elpensado de la redaktoroj estas tuj rimarkebla.

Ni kontrolis la originalajn materialojn kaj trovis, ke la fakto estas tute alia. Grandamaso da pripolitikaj diroj, kiuj malice kalumnias la Centran Komitaton de la Partio kaj Prezidanton Maŭ, subtenas dekstrajn oportunistojn kaj atakas la Ĝeneralan Linion kaj la socialisman aferon, ne estas kolektitaj aŭ estas detranĉitaj en la artikolo; vortoj, kiuj evidente plej malice satiris la nunon per antikvaĵoj por oponi la Partion kaj socialismon, estas intence envicigitaj en aliaj partoj por minimumigi ilian gravecon; rilate la malbonan influon de *Noktaj Babiloj ĉe Jansan* tra la tuta lando, la artikolo tute silentis. Kontraŭe, al malgravaĵoj ĝi gravamiene trumpetis kun la intenco malgravigi la gravan kaj

trapasi en la konfuzo. Ĝi kaŝis precipe tiun fakton, ke grandamaso da verkoj atakantaj la Partion kiujn skribis Deng Tuo, Vu Han kaj Liaŭ Moŝa en tiu tempo, ne estas "izolaj laboroj" senrilataj, sed estas komandite, planite kaj okulfrape kunordigite publikigitaj de la kompanio de la "Trifamilia Vilaĝo". Vu Han estis en la fronto, lin sekvis tuj Liaŭ Moŝa, kaj la vera "ĉefgeneralo" el la trio, t. e. la direktoro kaj ĉefa administranto de la nigra gastejo de "Trifamilia Vilaĝo", ja estas Deng Tuo.

Kamarado Maŭ Zedong tiel nin instruis: "Ni nepre devas firme teni la veron, kaj la vero postulas klaran standardon." (*Parolo al la Laborantoj de la Redakcio de la "Ginsuj-ĵurnalo"*) En akra kaj kompleksa klasbatalo aperas sendube diversaj ŝajnaj fenomenoj. Nur tiuj, kiuj klare kaj alte levas la revolucian standardon de la penso de Maŭ Zedong, firme tenas la principon kaj la veron, malkaŝas sen ia malklareco kaj sen ia necerteco la esencon de la faktoj, povas sin liberigi de la trompo de la ŝajnaj fenomenoj. Ĉar *La Fronto* kaj *Pekina Ĵurnalo* subite elmetis la demandon de *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* kaj *Notoj de Trifamilia Vilaĝo* kaj kaŝis la veron, do estas la devo de ĉiuj revoluciuloj malkaŝi ĝisfunde ilian reakcian fizionomion. Kvankam la enhavoj de *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* kaj *Notoj de Trifamilia Vilaĝo* estas ege fuŝmiksaj, sed per iom da analizado oni povas rimarki, ke tra ili kuras unu nigra linio kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma. Tiu ĉi nigra linio estas la kontinuo mem de tiu en "Haj Ĵuj Insultas la Imperiestron" kaj *Deoficigo de Haj Ĵuj*, kaj en la politika vetero de Ĉinio en la lastaj jaroj ĝi estigis amason de nigraj nuboj. Nun venas la tempo plue malkovri la internan intrigon de la granda nigra gastejo de "Trifamilia Vilaĝo"!

KIEL KOMENCIĜIS "NOKTAJ BABILOJ ĈE JANŜAN" KAJ "NOTOJ DE TRIFAMILIA VILAĜO"?

Noktaj Babiloj ĉe Janŝan kaj *Notoj de Trifamilia Vilaĝo* estas komencitaj tuj post *Deoficigo de Haj Ĵuj*. Tio estas zorge planita, celoklara, laŭprojekta kaj organizita grandskala atako kontraŭ la Partio kaj socialismo. Tre profundan impreson oni povas tuj ricevi, se nur li ĵetas ekrigardon al la tagtabelo.

En januaro de 1961, en la gazeto *Pekina Literaturo-Arto* aperis *Deoficigo de Haj Ĵuj*. La reakcia esenco de ĉi tiu dramo nun estas pli kaj pli klara. Ĝi rekte celis la Luŝan-Kunvenon kaj la Centran Komitaton de la Partio estratan de kamarado Maŭ Zedong kaj ĝi intencas renversi la decidon de la Luŝan-Kunveno. En la dramo la verkinto kriis, ke la "deoficigo" de "La Plej Justa Moŝto Haj", t. e. la dekstraj oportunistoj, estas "nejusta", kaj ke la dekstraj oportunistoj devas reveni kaj direkti la "kortegajn aferojn" kaj efektivigi sian reviziisman programon. Subteni relevigon kaj reokupon de sia loko de la dekstraj oportunistoj sur la politika sceno por efektivigi restarigon de kapitalismo, jen la urĝa deziro de la aŭtoro de la dramo. Kaj tio estas la komuna animstato ankaŭ de la "fratoj" de la "Trifamilia Vilaĝo" en tiu tempo.

La dramo ricevis de iuj personoj aplaŭdojn kaj subtenon tuj post sia publikigo. Opiniante, ke la avangardo venkis, la fratoj de la "Trifamilia Vilaĝo" tute ekstazis kaj falis en staton ekster si de ĝojo. Je la 2-a de januaro, 1961, Liaŭ Moŝa diris batalprete sur *Pekina Vesperĵurnalo*: "Ektondras la jarfina tamburo, ekburĝonas la printempaj herboj", kaj "komenciĝos la granda laboro en la printempo". Jen la fruprintempa vetero de la "Trifamilia Vilaĝo". Tuj sekve je la 16-a de februaro Liaŭ Moŝa aperigis publikan leteron al Vu Han por esprimi "gratulon" al lia "rompo de la pordo kaj eliro", "por instigi la energion" kaj proponis, ke " 'historio' kaj 'dramo' devas dividi laboron inter si kaj kunlabori". Je la 18-a de februaro, Vu Han diris kiel avangardo en sia respondo al sia "frato": "Mi ankaŭ proponas la samon al vi, mia frato, kial vi ne eliras rompante la pordon?" Li tiam respondis bravageste: "Vi diris, ke mi eliras rompante la pordon. Viaj vortoj estas trafaj. Mi ja volas eliri rompante la pordon. La pordo devas esti nepre rompita." Kia gesto de atakado! Kia aroganta sinteno! Kaj vere kun la maniero sinriske ĉionspita. Tiam li opiniis, ke alvenas jam

la ŝanco de atakado. Post publikigo de *Deoficigo de Haj Ĵuj*, t. e. ektondro de la jarfina tamburo, ili, la kliko, volis komenci "grandan laboron"!

Je la 25-a de februaro, 1961, t. e. unu semajnon post la kriego: "La pordo devas esti nepre rompita", Vu Han laŭte alvokis en sia artikolo "'Fea Kunsido' kaj 'Voĉojn Donu Cent Skoloj'" ke "organiziĝu fea kunsido en diversaj gradoj, t. e. de la supera tavolo ĝis la baza", "ĉar membroj de la baza organizo vivas en praktika laboro, ili kontaktas la realon kaj iliaj problemoj estas pli konkretaj, pli elstaraj kaj pli koncentrigitaj". Li laŭte vokis al tiuj, kiuj "nutras nepublikeblajn intencojn" en la baza organizo, ke ili ekagadu. Li kriis, ke oni devas "forbalai la baron sur la vojo de donado de voĉoj de cent skoloj", kaj fanfaronis memkontente: "Studinte pli ol 40 jarojn, instruinte preskaŭ 20 jarojn en universitatoj kaj verkinte kelkajn librojn, mi verŝajne povus esti kalkulata kiel intelektulo." Tio montris, ke li konsideras sin havanta kapitalon kaj subtenata de la mastro postkulisa, kaj ke nun estas tempo por ili, la kontraŭkomunismaj burĝaj intelektuloj, elveni kaj manovri sian potencon.

Ĝuste en tia intensa komencanonca tamburado kaj "arda" atmosfero en la nigra vento kaj deviiga nebulo estigitaj de *Deoficigo de Haj Ĵuj*, kaj tuj post kiam Vu Han "balaadis" per bastono por "purigi la vojon", en marto de 1961 la ĉefgeneralo sursceniĝis. "Rompante la pordon eliris" *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* "laŭ propono de la amikoj". Deng Tuo diris, ke li "estis devigita surĉevaliĝi". Li eraris. La vorton "devigita" oni devas legi "invitita". La avangardo elhakis la vojon, la "frato" servas kun vipo, ĉu ne estas la tempo por la ĉefgeneralo surĉevaliĝi?

La sinmontro de *Notoj de Trifamilia Vilaĝo* tuj sekvis tiun de la antaŭparolo de *Deoficigo de Haj Ĵuj*. Aŭgusto de 1961 estis tempo de intensa atakado fare de enlandaj reakciaj klasoj. Tiam Vu Han en la antaŭparolo de la dramo speciale montris: "Tiu ĉi dramo emfaze priskribas pri Haj Ĵuj liajn neflekseblecon, nesubigeblecon antaŭ perfortoj, netimigeblecon ĉe malvenkoj kaj la firman volon rekomenci la batalon post malvenko", per kio li fervore kuraĝigis kaj subtenis la "deoficigitajn" dekstrajn oportunistojn rekomenci la atakadon kontraŭ la Partio. En la antaŭparolo li mem kontente rakontis, kiel liaj "amikoj" kombinis por li planojn, kaj deklaris, ke "ĵetante brikojn por elvenigi jadojn" li intencas "elvenigi" grandamason da venenherboj. Sekve de tio je la 5-a de oktobro, 1961, en la rubriko *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* aperis artikolo "Ĉion Prizorgi". Tiu citis versparon: "En la oreloj aŭdiĝas ĉiuj sonoj de vento, pluvo kaj legado; la koro prizorgas ĉion de la hejmo, la lando kaj la mondo" kaj ekscitiĝe klarigis, ke tio "plene montris la politikan ambicion de la tiama Donglin-partio" kaj ke "la signifo de tiu ĉi versparo estas ja sufiĉe profunda". Donglin-partio estis "opoziciantaro" interne de la bienula klaso de Ming-dinastio. Deng Tuo tiom alte taksis "la politikan ambicion de Donglin-partio", ĉar la "opoziciantaro" elvokis kunsenton el lia korfundo. Evidente, tiam Deng Tuo sentis, ke kun "sonoj de vento kaj pluvo", hereza blovado kaj nigra pluvo, nun estas vera tumulto kaj oni devas pluapaŝe efektivigi la "politikan ambicion", "ĉion prizorgi" kaj pli publike ataki la Partion kaj socialismon! Kelkajn tagojn poste, je la 10-a de oktobro 1961, en *La Fronto*, kies ĉefredaktoro estas Deng Tuo, estis publike elpendita la komerceja ŝildo "Trifamilia Vilaĝo", kaj la sekreta subtera fabriko fariĝis publika kompanio. La municioj de la tri familioj estis centrigitaj. En la unuaj numeroj jam estis elpafitaj la obusoj kiaj "Grandiozaj Vantaj Paroloj" ktp., tre malice atakantaj la gvidadon de la Centra Komitato de la Partio.

La publikigo de *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* kaj *Notoj de Trifamilia Vilaĝo* montris, ke tio estas daŭra atako laŭpaŝa, organizita kaj gvidata kontraŭ la Partio post la publikigo de *Deoficigo de Haj Ĵuj*. Nur per strikta interligo de la verkoj de tiuj "tri familioj", ni povas ĝisfunde malkovri la internan intrigon de la nigra gastejo.

UNU NIGRA LINIO KAJ KELKAJ EKBLOVOJ DE HEREZAJ VENTOJ

Deng Tuo mem diris ke la temoj de *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* devenis tiamaniere: "Ofte mi ion pensis, vidis aŭ aŭdis, kaj trovis ke estas demando, tiam venis al mi temo". Deng Tuo okupas gvi-

dan postenon, kion li "vidis" kaj kies vortojn li "aŭdis"? Jen li malkaŝis ke *Noktaj Babiloj ĉe Jansan* estis skribitaj ĝuste cele al aktualaj "demandoj" en la reala vivo, pri kiuj li estis malkontenta, kaj ke iuj malicaj kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj enhavoj de liaj artikoloj estis redaktitaj de li post la "aŭdo". La elirpunkto kaj temoj de la artikoloj koncernas senescepte gravajn problemojn en la nuntempa politika vivo. Ili havas fortan aktualecon, sed ne estas ia ordinara "beligo de antikvuloj". Laŭ la aludita spuro de la aŭtoro, ni povas vidi klare ke en *Noktaj Babiloj ĉe Jansan* kaj *Notoj de Trifamilia Vilaĝo*, trakuras la sama kontraŭpartia, kontraŭpopola kaj kontraŭsocialisma nigra linio daŭrigita ekde "Haj Ĵuj Insultas la Imperiestron" kaj *Deoficigo de Haj Ĵuj*, t. e. la nigra linio, kiu kalumnias kaj atakas la Centran Komitaton de la Partio estratan de kamarado Maŭ Zedong, atakas la Ĝeneralan Linion de la Partio, energie subtenas la atakon por verdikto-renverso fare de la "deoficigitaj" dekstraj oportunistoj kaj subtenas la feŭdismajn kaj kapitalismajn fortojn en iliaj senbridaj atakoj. Tiu ĉi nigra linio, laŭ la ŝanĝiĝo de la en- kaj ekster-landa klasbatala situacio, levis unu post alia nigrajn ondegojn kaj estigis blovadojn de herezaj ventoj, "kunlabore kaj kun labordivido", interrespondante kaj kunordigite ĉiuflanke, elektante malsamajn atakdirektojn laŭ malsamaj "demandoj", "pensitaj, viditaj aŭ aŭditaj".

En januaro de 1961, la Centra Komitato de la Partio okazigis la 9-an Plenan Sesion de la 8-a Centra Komitato. La Sesio montris: "La grandaj sukcesoj, kiujn nia lando atingis en la pasintaj tri jaroj, pruvis ke la Ĝenerala Linio de Socialisma Konstruado de la Partio, Antaŭensaltego kaj Popola Komunumo estas konformaj al la reala situacio de Ĉinio." "Konsiderante ke la agrokultura produktado suferis dum du sinsekvaj jaroj gravajn naturajn katastrofojn, en 1961 la tuta lando devas koncentri la fortojn por plifortigi la fronton de agrokulturo". En sia komuniko la Sesio akre montris: "....tre malgranda nombro da bienulaj kaj burĝaj elementoj, kiuj okupas nur kelkajn elcentojn de la tuta loĝantaro kaj ne estas bone reformitaj.... ĉiam intencas restarigon de sia potenco kaj entreprenas subfosadon profitante la malfacilojn kaŭzitajn de la naturaj katastrofoj kaj iujn mankojn en laboroj de bazaj organizoj." (*Komuniko de la 9-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio*) Ili estigis kontraŭpartian, kontraŭsocialisman nigran venton, plenforte kalumniis kaj klaĉis kontraŭ la socialisma afero de la Partio kaj popolo, malbenis la Centran Komitaton de la Partio, kaj arogante revis nuligi la Ĝeneralan Linion de la Partio. En servo al la politikaj bezonoj de la elementoj de la burĝa kaj bienula klasoj kiuj intencas restarigon de sia potenco, *Noktaj Babiloj ĉe Jansan* komencita tuj post la Plena Sesio, profitante iujn ekonomiajn malfacilojn kaŭzitajn de la seriozaj naturaj katastrofoj, koncentre estigis herezan venton atakantan la Ĝeneralan Linion kaj subtenantan la restarigan agadon de la bienula kaj burĝa klasoj.

La 26-an de marto, 1961, Deng Tuo elmetis sian sloganon "Bonveno al 'Diversscia Skolo' ". Kio estas homoj de tiu "diversscia skolo"? Laŭ li, ili estas personoj kiuj "havas vastan scion", "ampleksantan ĉiajn diversaĵojn". Li plue diris: "Ĉiuj famaj kleruloj de la malnovaj tempoj povas esti nomataj en malsamaj gradoj diverssciuloj". Li avertis la Partion dirante: "Estos por ni granda perdo, se ni nun ne rekonas la gravan signifon de la vasta scio de la tiel nomataj 'diverssciuloj' al diversaj gvidaj laboroj kaj la laboroj de scienca esplorado." Bonvolu atenti pri la vortoj "gvidaj laboroj". Jen la kerno. Estas tute klare, ke laŭ la supre menciitaj vortoj de Deng Tuo, tiuj "diverssciuloj" estas neniuj aliaj ol la ne bone reformitaj elementoj el burĝaro, bienularo kaj iliaj intelektuloj, t. e. areto da personoj kies politikaj fizionomioj estas ne klaraj, reakciaj uloj kiaj "instruituloj" k. s. de la bienula kaj burĝa klasoj. La "diversaj" mortintoj, nome, imperiestroj, reĝoj, generaloj, ĉefministroj, sociaj feĉoj, feŭdismaj obstinuloj ĝis tombej-fiksistoj k. c., kiujn Deng Tuo prezentis en siaj verkoj kiel grandajn idolojn, estas ĉiuj kulto-tabuloj en la prapatra templo de "diverssciuloj". Prenante siajn "sciojn" kiel kapitalon, ili tutforte penadas enpenetri en la revolucian vicon aŭ surrampi al pli alta posteno por uzurpe kapti diversnivelajn gvidpostenojn, ŝanĝi la naturon de la proleta diktaturo. Deng Tuo postulas ke ni alte taksu la "gravan signifon" de "diverssciuloj" por "gvidaj

laboroj", t. e. li postulas ke la Partio malfermu la pordon al ili, lasu tiujn "diverssciulojn", kiuj iras laŭ la kapitalisma vojo, kapti la gvidpovon de "ĉiaj gvidaj laboroj" kaj samtempe la gvidpovon de la "laboroj de scienca esplorado", t. e. de la sciencaj kaj ideologiaj rondoj, por prepari la publikan opinion por restarigo de kapitalismo. Li mem ja sin rigardis kiel "diverssciulon" n-ro 1. Ĉu tiam ne estis burĝaj elementoj kiuj senpacience deziris ke la "gvidantoj" "alte taksu" ilian "vastan scion" uzatan por fari kapitalisman ekspluatadon? Ĉu ili ne intencis per tia "scio" sia ŝanĝi socialismajn entreprenojn en la kapitalismajn? La slogano "Bonvenon al Diversscia Skolo" estis elmetita de la "Trifamilia Vilaĝo" por subteni la elementojn de la ekspluatantaj klasoj uzurpe ekkapti gvidpovon. Oni ne devas ĝin konsideri nur kiel vantan parolon. Ĉu la "diverssciuloj" el la "Trifamilia Vilaĝo" ne efektive monopole tenas en siaj manoj serion da "gvidaj laboroj"?

La 13-an de aprilo, 1961, en sia artikolo "Anstataŭ Ŝtopi Prefere Konduki", Deng Tuo refoje postulis ke oni devas "ĉion" "aktive konduki por ke ĝi glate disvolviĝu", kaj ke "malsukceso estas destinita", se oni "ŝtopas la vojon de movado kaj disvolviĝo de aferoj". Bonvolu atenti tie ĉi pri "ĉio", t. e. inkluzive de tiuj kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj reakciaj mallumaj aferoj. Se ni volas persisti ĉe la vojo de socialismo, ni do nepre devas ŝtopi la vojon de restarigo de kapitalismo; se ni volas subteni ĉiujn revoluciajn aferojn nove naskitajn, ni do nepre devas doni batojn al la kontraŭrevoluciaj putraj aferoj. "Sen detruo ne estas konstruo, sen ŝtopo ne estas fluo, sen halto ne estas irado." Tial, por malfermi vojon al la torento de revolucio, oni devas ŝtopi la kontraŭfluon de reakcio. Sed Deng Tuo postulis ke ni "ĉion" ne "ŝtopu", inkluzive de kontraŭsocialismaj aferoj, kaj lasu ĉion "glate disvolviĝi". Ĉu tio ne estas evidente ke li postulis nin realigi burĝan liberaligon kaj kapitulaci al la tiam leviĝantaj ventoj de "individua mastrumado", la plivastigo de parceloj por privata uzo kaj de liberaj merkatoj, la pliigo de etaj entreprenoj mem respondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj, kaj la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado...? "Konduki" signifas malfermi vojon, ili ja memtitolis sin "vojon malfermantaj pioniroj" de la kapitalismaj fortoj. La "Trifamilia Vilaĝo" kalkulis ke la socialismo "malsukcesos", kaj la nigra vento por kapitalisma restarigo "certe venkos", kaj ke ili povas publike ĵeti sin inter la brakojn de la reakciaj fortoj kiuj "disvolvas" kapitalismon!

La 30-an de aprilo, 1961, en sia artikolo "Teorio de Zorgado pri Laborfortoj", Deng Tuo senkaŝe atakis nin pri tio ke ni ne "zorgis pri laborfortoj". Komparante la diktaturon de la proletaro kun tiu de bienula klaso en la sama rango, li diris ke "jam en la tempoj de kaj ĉirkaŭ Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj", la ekspluatanta klaso, "pere de sia sperto de regado", "malkovris iujn objektivajn leĝojn pri kresko kaj malkresko de laborfortoj" kaj determinis la maksimumon de "laborfortoj uzeblaj por diversspeca fundamenta konstruo". Deng Tuo postulis ke "ni devas ricevi novan inspiron el la sperto de antikvuloj kaj pli multe atenti en ĉiuj flankoj por prizorgi la laborfortojn". Ĉiuj scias ke ni plej multe zorgas pri laborfortoj. En ĉiuj siaj laboroj la Komunista Partio de Ĉinio ja eliras de la fundamentaj interesoj de la vasta popolo kaj tutkore servas al la popolo. Dume ĉiuj klasoj de sklavo- kaj ter-posedantoj en la historio sciis fari nur nesatigeblan kaj ĉiam senĉesan kruelan ekspluatadon kontraŭ la laboranta popolo, kaj tiel vekis grandajn leviĝojn unu post alia ĉe la sklavoj kaj kamparanoj. Kiel tiuj ekspluatantaj klasoj povus koni iajn "objektivajn leĝojn" pri "kresko kaj malkresko de laborfortoj"? Tio estas nenio alia ol utiligi niajn provizorajn malfacilojn kaŭzitajn de la tiamaj naturaj katastrofoj por kalumnii la Ĝeneralan Linion kaj Antaŭensaltegon kiel ne "zorgi pri laborfortoj" kaj postuli nin forlasi la Ĝeneralan Linion streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie, forlasi la grandan entreprenon de agrokulturo kaj forlasi la revolucian principon strebi al prosperiĝo kaj sinapogi sur la propraj fortoj, kaj disfaligi la proletan diktaturon per la tiel nomata "sperto de regado" de la bienula klaso. Tio signifas: Por vi estas "ekster la kapablo" kaj "apenaŭ efektivigeble" sinapogi sur la

propraj fortoj, tuj ĉesu, tuj tion forlasu kaj konduku aferojn prefere laŭ la malnovaj rimedoj de la "diverssciuloj" de la bienula klaso! Ĉu tio ne estas malica atako okulfrape kunordigita kun la usona imperiismo kaj la moderna reviziismo? Se ni agus laŭ tiu ĉi linio, ni ne nur ne havus Daking kaj Daĝaj, nek havus la atombombojn, sed nia lando reduktiĝus al kolonio de imperiismo!

Tute ne estas hazarde, ke antaŭ kaj post la apero de tiu ĉi artikolo, Deng Tuo energie rekomendis lerni de Ĥruŝĉov-reviziisma kliko. En sia artikolo "Pri la Vojo de Interamikiĝo kaj Akcepto de Gastoj", li argumentis ke ni devas "lerni" de kaj "solidariĝi" kun lando "pli alte evoluinta ol nia propra" kaj ke ni "devas bonvenigi, ke amiko estas pli supera ol ni mem". Kaj en alia artikolo "De Tri al Dekmil" li kondamnis ke, "se oni konsideras sin neordinara kaj forbatas piede sian instruiston, vidante ke la aboco estas tre facila, li do nenion ellernos." Tio estis malica atako al nia batalo kontraŭ moderna reviziismo kaj postulo ke ni invitu al ni la reviziismon, t. e. konduki lupon en nian domon. Ni deziras lerni ĉiujn spertojn kaj instruojn de la mondo kiuj estas utilaj por la socialisma konstruado, sed absolute ne devas lerni reviziismon. Ni varme bonvenigas grandan progreson de ĉiuj revoluciaj aferoj, sed absolute ne reviziismon. Kun tute sama tono kiel la dekstraj oportunistoj, en sia serio da malrektaj akuzoj Deng Tuo kalumniis, ke la partia linio por la socialisma konstruado estas "apenaŭ efektivigebla", kaj ke oni trovos "elirejon" nur en la "lernado" de la reviziisma kliko de Sovetunio kaj praktikado de reviziismo en Ĉinio.

Levante tiun ĉi herezan venton, "Trifamilia Vilaĝo" unuflanke aklamis per plena voĉo la aperon de diversspecaj diabloj kaj demonoj, elhakis plenforte vojon por ili, kaj kunagis de interne kun la fortoj eksteraj; kaj aliflanke kunordigite kun la en- kaj ekster-landaj reakciuloj kaj modernaj reviziistoj, malice atakis la Ĝeneralan Linion de Socialisma Konstruado de la Partio, Antaŭensaltegon kaj Popolan Komunumon, kaj ŝminkis la modernan reviziismon, revante krei publikan opinion favoran por denova surscenigo de la dekstraj oportunistoj.

En junio kaj julio de 1961, "Trifamilia Vilaĝo" refoje estigis herezan ventegon. La 1-a de julio estis la kvardeka datreveno de la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio. En la akra batalo kontraŭ en- kaj ekster-landaj reakciuloj kaj batalo kontraŭ la seriozaj naturaj katastrofoj, la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio kun kamarado Maŭ Zedong ĉe la kapo, alte tenante la ruĝflagon de la Ĝenerala Linio, kondukis la ĉinan popolon daŭre marŝi antaŭen de venko al venko sur la vojo de socialismo. Tiutempe, la enlandaj reakciaj fortoj kaj la dekstraj oportunistoj, kiuj estis "deoficigitaj" sed ne volontis rekoni sian malsukceson, levis plue la "venton de verdiktorenverso" kun intenco neigi la kritikon al ili faritan de Luŝan-Kunveno kaj neigi la fruktojn akiritajn de la gravaj politikaj bataloj post la Liberiĝo. La "fratoj" de la "Trifamilia Vilaĝo" tiam pafis densajn venenajn sagojn al la Centra Komitato de la Partio por subteni la dekstrajn oportunistojn.

La 7-an de junio, 1961, en sia insida artikolo verkita sub la preteksto rememorigi Ju Kian, Vu Han plie elmetis alian proceson de "senbaza akuzo". Tie li ŝvelparole laŭdis la "deoficigitan" Ju Kian, dirante ke tiu havis "karakteron neflekseblan", "naturon modestan", kaj ke li estas "eterne senmorta". Li menciis precipe tion ke Ju Kian "estis rehonorigita" kaj "liaj politikaj malamikoj malsukcesis unu post alia", kaj aldone notis ke li estis nomita kiel "Ministro de Milito (Ministro de Nacia Defendo)". "Rehonorigi" estas nia lingvo nuntempa, tian dirmanieron la imperiestro tute ne sciis. Per tio Vu Han volis nur malkaŝi sian koron, ke la proletaj revoluciuloj "malsukcesos unu post alia", kaj ke tre baldaŭ oni "rehonorigos" la dekstrajn oportunistojn!

La 22-an de junio, 1961, tuj post kiam Vu Han elmetis la proceson de Ju Kian, Deng Tuo publikigis plie la verkon "La Proceso de Ĉen Giang kaj Vang Geng". Tiu ĉi artikolo estis tiel malica kaj malkaŝa ke la aŭtoro pro timo tute ne kuraĝis enmeti ĝin en la kolekton de *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan*. Ni trovis ĝin sur *Pekina Vesperjurnalo* kie aperis la *Noktaj Babiloj*. La aŭtoro rimarkigis ke tiu ĉi "rakonteto" estas "pensvigliga", tial li elprenis ĝin el malnovaj libroj. La artikolo alude rakontas "proceson" "intence troigitan kaj elpensitan", sed la revelacio de la artikolo kuŝas en la lasta

parto: "La politiko de la registaro de Song-dinastio dum la regado de la imperiestropatrino Mingsu jam pli kaj pli putriĝis. Supere en la kortego, mankis inteligenta kaj kapabla ĉefministro kun siaj seriozaj kaj respondecemaj helpantoj por zorgi pri enoficigoj kaj ŝtata administrado; malsupere, la lokaj oficistoj faris libere ekzakte kion ili volis". Tial rezultiĝis la "trovastigo kaj malsimpligo" de "la proceso". Tio estas malica kalumnio kontraŭ nia Partio per la kontraŭrevolucia lingvo de la bienuloj, riĉkamparanoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj kaj dekstruloj; pretekstante ataki la "imperiestropatrinon Mingsu" kaj "ĉefministron", ili malice blasfemis la Centran Komitaton de nia Partio; per la vortoj "malsuperaj oficistoj" kiuj "faris libere ekzakte kion ili volis", ili akre insultis la diversnivelajn funkciulojn de la Partio; per ĉio ĉi ili plendis pri la "maljusteco" kontraŭ la dekstraj oportunistoj kaj aliaj kontraŭpartiaj elementoj. Eĉ tian modernan esprimon kia "trovastigo" ili eldiris! Kian "penson" ili volis "vigligi"? Ĉu ne estis la "penso" de "verdiktorenverso" por la dekstraj oportunistoj kaj aliaj kontraŭpartiaj elementoj? Ĉu ne estis la "penso" de diversaj diabloj kaj demonoj por ataki socialismon kaj la proletan diktaturon? Precipe pripensinde estas ke Deng Tuo metis la esperon de "verdiktorenverso" sur iun "inteligentan kaj kapablan ĉefministron", kiu elpaŝos kaj ekprenos la gvidadon. Kian rolulon li vokis al la sceno, akrevidantoj tuj komprenas je unua rigardo. Jen la vera voĉo de la ĉefgeneralo de la "Trifamilia Vilaĝo". Ke li ne enmetis tiun artikolon en la libron, tio des pli altiris atenton. "Ju pli ion oni provas kaŝi, des pli konata tio fariĝas."

Samtempe, en la artikolo "Prosperiĝo kaj Malprosperiĝo de Du Temploj", Deng Tuo multe elverŝis siajn sentojn pri la sorto de du temploj, el kiuj "unu prosperiĝas kaj la alia malprosperiĝas". La prospera templo estas multe incensata, "bone konata proksime kaj malproksime"; sed la alia estas en "malprospero" kaj "de neniu prizorgata". Timante ke oni ne komprenas la signifon, li speciale instigis nin kompari tion kun "aliaj similaj aferoj". Tio ja aludis ke ni estas tro malvarmaj al la dekstraj oportunistoj, kaj ke neniu al ili incense adoras. Al la sorto de tiuj "de neniu prizorgataj" kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj argilaj idoloj, kiuj falis de sur la politika scenejo, kaj tiuj dekstraj oportunistoj kaj aliaj kontraŭpartiaj elementoj tute forĵetitaj de la Partio kaj la popolo, Deng Tuo esprimis fortan malkontenton. Li volis, ke la Partio denove ilin "alte taksu" kaj denove kultu la "faligitajn" idolojn!

Tuj poste, en la antaŭparolo al *Deoficigo de Haj Ĵuj*, Vu Han eĉ pli malkaŝe kriis ke "Haj Ĵuj perdis sian oficon, sed li ne subiĝis kaj ne deprimiĝis", kaj ke oni devas posedi "firman volon por esti ne timigita de malvenko kaj agi denove post malsukceso"! Tio estis la komuna alvoko de la "Trifamilia Vilaĝo" en tiu tempo kaj ne estis afero izola. Ili ne nur instigis la dekstrajn oportunistojn "agi denove", sed ankaŭ ili mem "agis" pli energie!

La 25-an de julio, 1962, la "Trifamilia Vilaĝo" elpaŝis kun ekstreme malica kontraŭkomunisma artikolo "Speciala Kuracado por 'Forgesema Malsano' ". Ĝi malice kalumniis ke la respondecaj kamaradoj de la Partio suferas de "forgesema malsano", ke ili "tuj forgesas kion ili vidis kaj diris", ĉiam "rompas siajn vortojn, kiujn ili donis", "estas nefidelaj al siaj vortoj", kaj fariĝis "kapricaj en ĝojo kaj kolero", kaj ke estas necese "bati per speciale farita bastono la kapon de la malsanulo por ke tiu ĉi 'svenu' ". Ili ne nur uzis la saman lingvon per kiu la dekstraj oportunistoj esprimis sian malamon kontraŭ la Centra Komitato de la Partio kaj ĝin kalumniis, sed ankaŭ volis simple mortigi la revoluciajn batalantojn de la proletaro per unu bato. Kiom malicaj kaj venenaj! Ĉu ili ne deziregis mortigi aŭ svenigi la revoluciulojn kaj lasi la reviziismon sursceniĝi? Tiu ĉi artikolo komplete malkovris ilian mortan klasan malamon kontraŭ la Partio, kaj ke ili staras tute sur la starpunkto de la bienuloj, riĉkamparanoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj kaj dekstruloj en sia atako kontraŭ nia Partio!

La tuta serio da faktoj supre menciitaj pruvas tutcerte, ke *Deoficigo de Haj Ĵuj* ne nur reprezentis la personan politikan sintenon de Vu Han, sed estis preludo de la kontraŭpartia, kontraŭsocialisma politika agado de la kliko de "Trifamilia Vilaĝo" en sia subteno al la "deoficigitaj" dekstraj oportunistoj. Plenmano da personoj de tiu kliko, kiuj metis sian esperon sur ekprenon de la potenco de la

Partio kaj ŝtato fare de la kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj elementoj, estigis kontraŭfluon. Sed kiel diras la proverbo "Efemeroj provas skui grandan arbon, jen ridinda mank' de memkonscio", la kalumnioj kaj atakoj de tiu areto da kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj elementoj povis neniom damaĝi la grandan brilon de la Partio, sed nur malkaŝi ilian kriman vizaĝon, veki indignon de la popolo kaj finiĝi per ilia forĵetiĝo de la Partio kaj popolo.

Ekde la apero de la *Notoj de Trifamilia Vilaĝo* ĝis marto de 1962, kiam okazis la Tria Kunsido de la Dua Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj, la atako de la "Trifamilia Vilaĝo", oni povas diri, atingis la gradon de frenezeco. Tiutempe, antaŭ ĉio, la imperiistoj, ĉiulandaj reakciuloj kaj modernaj reviziistoj plie intensigis internacie grandan kontraŭĉinan ĥoron, kiu portempe faris bruegon. En la 22-a Kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio okazinta en oktobro, 1961, la gvidantoj de KPSU sistemigis sian reviziisman linion, kiun ili disvolvis iom post iom ekde la 20-a Kongreso de KPSU, kaj pluapaŝe efektivigis sian reviziisman politikan linion por splitigi la internacian komunisman movadon kaj restarigi kapitalismon. Kaj enlande, la reakciaj klasoj kaj iliaj politikaj agentoj celantaj reprenon de potenco, profitis la seriozajn naturajn katastrofojn, kiujn ni suferis en tri sinsekvaj jaroj, por fari pli furiozan ĉiuflankan atakon en la kampoj de politiko, ekonomio kaj kulturo, intencante renversi la gvidon de la Partio kaj la proletan diktaturon, dum ni plenumis la politikon de "reĝustigo, firmigo, plenigo kaj altigo".

Du artikoloj plej tipe prezentas, kiel la "Trifamilia Vilaĝó" taksis la situacion en tiu periodo. Unu estas "Pri Ondoj" de Vu Han, publikigita 1-an de januaro, 1962. Kun neretenebla entuziasmo, li aklamis al la "ondoj" kiuj "en pli ol duonjaro" frapis kontraŭ la socio, ĝoje kriante ke "vere grandaj estas la ondoj". Konsiderante la kontraŭfluon kiu atakis la partian gvidon kaj la proletan diktaturon kiel sukceson de la "ondoj", li energie ĝin propagandis. Lia takso pri la venonta situacio estas ke la "ondoj" "fariĝos pli kaj pli grandaj". Perdinta prudenton pro la ambicio, Vu Han opiniis, ke ilia kliko sukcesos, kaj ke la kontraŭfluo de reviziismo baldaŭ fariĝos la ĉefa fluo. Post nelonge, je la 4-a de februaro, en sia artikolo "La Printempa Festo Ĉijara" kiun li ne kuraĝis kolekti en la libron, Deng Tuo pli malkaŝe diris: "Baldaŭ finiĝos la frosta sezono kiun la norda vento alportis, ĝin anstataŭos varma orienta vento kaj venos baldaŭ degeliĝo sur la tero." Ĉu "degeliĝo" ne estas vorto centprocente kontraŭrevolucia, kiun Ĥruŝĉov-reviziisma kliko uzis dum la tempo kontraŭ Stalin? Perdinta prudenton pro ambicio, tiu kliko taksis, ke en la jaro 1962, la socialisma nova Ĉinio "venos al sia fino", la proleta diktaturo estos faligita de la kontraŭsocialismaj "ondoj", kaj "ĝin anstataŭos" la regno de la dekstraj oportunistoj, t. e. de la reviziistoj, la personoj de la "Trifamilia Vilaĝo" gajnos pli grandan superecon, kaj povos libere fari kion ili volos. Kamaradoj, bonvolu vidi: Kiom forte esperas la "Trifamilia Vilaĝo" ke en Ĉinio aperos reviziisma "degeliĝo"!

Surbaze de tia takso de la situacio, "Trifamilia Vilaĝo" freneze komencis ĉiuflankan atakadon:

La 10-an de novembro, 1961, en *Notoj de Trifamilia Vilaĝo*, Deng Tuo publikigis sian artikolon "Grandiozaj Vantaj Paroloj". Sub la masko kritiki versaĵon de iu knabo, li parabole insultis, ke la versoj "La orienta vento estas nia favoranto, kaj la okcidenta vento estas nia malamiko" estas "vanta parolo", "stereotipa skribaĵo", "banalaj esprimoj" kaj "fiimponeco". Tio estas malkaŝa insulto ke la marksism-leninisma scienca aserto, "la orienta vento superas la okcidentan", estas "vanta parolo". Deng Tuo diris: "Tia grandioza vanta parolo estas neevitebla en iuj specialaj okazoj", tio aludis al legantoj ke li ne malbenas la versaĵon de la knabo, sed la ideologian armilon kiun nia Partio uzas por fari lukton kaj eduki la popolamason en "specialaj okazoj", t. e. en klasa batalo en kaj ekster la lando. Kion Deng Tuo celas? Li celas akre kalumnii la grandan penson de Maŭ Zedong kiu nin kondukas en antaŭen-marŝado, kiel "vantan parolon"; li volas ke ni forviŝu en la politika vivo la penson de Maŭ Zedong, kaj forlasu la linion de marksism-leninismo. Li eĉ postulas arogante ke nia Partio "malmulte parolu kaj iru ripozi ekdezirante paroli". Ĉu la penso de reviziismo ne povus vaste inundi, se la penso de Maŭ Zedong "ripozus"? Ilia freneza malbenado

ne povas difekti eĉ hareton de la penso de Maŭ Zedong, sed male, montras pli klare ke ĝi estas ideologia armilo kiu tremigas ĉiujn diablojn kaj demonojn kaj havas senliman revolucian potencon!

Tute kunordigite kun tiu ĉi artikolo, en "Trifamilia Vilaĝo" publikiĝis sinsekve nombro da artikoloj atakantaj la penson de Maŭ Zedong kaj klaĉantaj kontraŭ la revoluciuloj. *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* elklaĉis la babilon de "Solida Tero Tuj post Forlaso", kies ĉefa ideo aludas ke la Partio "forlasu" la Ĝeneralan Linion de Socialisma Konstruado. Ĝi mokas ke tiuj, kiuj ne forlasas sian alkroĉitaĵon, estas "blinduloj"kaj "mem serĉas embarason". Li postulas ke la Partio "kuraĝe kaj senskrupule forlasu kion ĝi tenas", kaj lasu sin fali, fali sur la tiel nomatan "solidan teron", t. e. la teron de kapitalismo. La 25-an de novembro, Liaŭ Moŝa publikigis samtempe du artikolojn: "En Kio Kuŝas la 'Supereco de Konfucio'?" Kaj "'Delikata Ŝerco' pri Timo al Fantomoj". La unua artikolo diris en la formo de laŭdado al Konfucio: "Konfucio ja havis 'demokratian' penson, kaj bonvenigis kritikojn donitajn de la aliaj al lia doktrino". Li ja postulis per tiu aludo, ke la Partio disvolvu la burĝan "demokration" kaj lasu la reakciulojn ekataki la penson de Maŭ Zedong. Kaj la dua artikolo per malamaj vortoj kalumnias la penson de Maŭ Zedong kaj la revoluciajn marksistleninistojn, ke ili "parolas grandajn vortojn", ke ili "fanfaronas sin sentimaj kontraŭ fantomoj sed fakte terure timas fantomojn", kaj ke oni devas fari ilin "skandalitaj je ĉiuj iliaj fuŝaĵoj". Ĉiuj scias ke la granda Komunista Partio de Ĉinio kaj la granda ĉina popolo edukitaj de la penso de Maŭ Zedong ne nur maltimas ĉiujn demonojn kaj fantomojn, sed ankaŭ decidas frakasi ĉiujn demonojn kaj fantomojn en la mondo. "*Nur heroo tigrojn pelas, neniu bravulo ursojn timas*". Jen du versoj priskribantaj resume la sentiman heroan fizionomion de la granda ĉina popolo. Tia heroeco povas superforti ĉiun herezan venton. Liaŭ Moŝa eĉ intencis kompili libron de *Rakontoj pri Fantom-timantoj*! Ĉu tio ne estas evidenta kunago kun la en- kaj ekster-landaj reakciuloj kaj modernaj reviziistoj por nigrigi la ĉinan popolon kiu ne timas fantomojn, nigrigi la Partion, kaj nigrigi la revoluciulojn kiuj persistas ĉe la penso de Maŭ Zedong?

La sekvan tagon post la publikigo de tiuj du artikoloj, en *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* aperis "Du Eksterlandaj Fabloj", por ataki pluapaŝe la tiel nomatan "grandan parolon", dirante ke "ĝis nun tiajn fanfaronantojn oni povas ankoraŭ renkonti ĉiam kaj ĉie." Li malice kriis: "Oni neniel lasos liberaj senatente la fanfaronantajn trompantojn". Ĉu vi volas revolucii? Ĉu vi volas teni la patrolandon en la koro kaj direkti la okulojn al la tuta mondo? Ĉu vi volas sinapogi sur la propraj fortoj kaj venki malfacilojn? Ĉio ĉi estas "granda parolo" kaj "fanfarono", kaj "Trifamilia Vilaĝo" reguligos kun vi la konton. Kiam la verkinto kolektis tiun ĉi artikolon en sian libron, li forstrekis jenan frazon: "La malfaciloj ne nur restas nevenkeblaj, sed estos pli kaj pli multaj, kaj fariĝos ĉiam pli gravaj". Vidu, kiom malice ili mokridas je la politiko "sinapogi sur la propraj fortoj" kiun nia Partio alprenis por venki la malfacilojn! Ili eĉ opinias ke malfaciloj estos "pli kaj pli multaj". Post nelonge, Vu Han nin refoje instruis parabole per "Ĝaŭ Kuo kaj Ma Su" en kiu estis cititaj du antikvaj rakontoj pri la t. n. "favorgajno de la publiko per grandaj paroloj" kaj "fanfaronado per belaj vortoj" aludante, ke ni devas "rememori hodiaŭ" la tiel nomatajn "sperton de malsukcesoj" kaj la "lecionon pri malutilo al si mem, al la aliaj kaj misgvido de la ŝtato". Vu Han evidente revas, ke la granda ĉina popolo "falis teren", la Ĝenerala Linio jam "malsukcesis" kaj la dekstraj oportunistoj baldaŭ sursceniĝos. Tiu nigra ventego komencita de la "grandiozaj vantaj paroloj" de Deng Tuo estis tute interligita kun la alvoko por sursceniĝo de la dekstraj oportunistoj. Relegado de tiuj artikoloj hodiaŭ, kiam socialisma konstruado de nia lando prospere eniras novan fluson, konigas al ni nur tion, ke tiuj kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj "bravuloj" neniam povas vidi la grandan forton de la popolamaso! Ili estas pli blindaj ol blinduloj en taksado pri la politika situacio!

Kamaradoj kaj amikoj, vidu! Ĉu estas eble, ke tiuj kalumnioj kaj atakoj, kiuj, kun la artikoloj de Deng Tuo kiel la kerno, estis tiel centrigitaj en mallonga tempo sur la samaj celaĵoj kaj uzis tiel identajn lingvaĵojn, ne estis laŭplane organizitaj kaj kunordigitaj? Kiom freneza estas ilia agado

kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma! Kiel ni povas ne esti incititaj al forta indigno! Kiel ni povas ne frakasi ilin komplete!

Serio da artikoloj kiuj tuj sekve "eliris rompante la pordon", pli malkaŝe direktis la lancopinton kontraŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de kamarado Maŭ Zedong, kaj turnis la ĉefan atakpunkton de politikaj problemoj al la organizaj. Iliaj maliceco kaj frenezeco estas maloftaj.

La 22-an de februaro, 1962, en sia artikolo "Ĉu Saĝeco Estas Fidinda?" Deng Tuo parolis pri tio ke "imperiestroj" devis "serĉi konsilojn de ĉiuj flankoj". Li emfazis precipe tion ke "oni ne bezonas plani ĉion per si mem", kaj fiintence diris: "Kiam oni mem ĉion planas, do flatoj trovas ŝancon prezentiĝi." Per tio ĉi li tute ne volas diri ke gvidantaj funkciuloj aŭskultu humile opiniojn de subuloj, sed volas, ke la Centra Komitato de la Partio akceptu tiun de ili subtenatan reviziismanlinion. Ili arogante avertis la Partion dirante: Se "oni ĉiam volas decidi ĉion per si mem, esperante akiri venkon per siaj propraj originalaĵoj", sed ne akceptas "bonan opinion" de la "subuloj" t. e. de la "Trifamilia Vilaĝo", "fine grandan malsukceson li suferos iam". Tio signifas malkaŝe postuli, ke oni faru la "artifikon" por restarigi kapitalismon linio de la Partio, kaj akre malbeni kontraŭ la Centra Komitato de la Partio. Ilia "bona opinio" estas praktikado de reviziismo, restarigo de kapitalismo, kaj ĵeti pli ol 90% de la popolo en la tuta lando denove en doloran, malluman kaj subprematan situacion. Tio estas la plej malbona konsilo. Same kiel pri aromaj floroj kaj venenaj herbaĉoj, la revolucia popolo kaj manpleno da kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj elementoj estas diametre kontraŭaj en siaj opinioj pri distingo de "bonaj" kaj "malbonaj", kaj inter ili ne ekzistas komuna lingvo.

La 25-an de februaro, post nur tri tagoj, aperis alia artikolo "Reĝa Vojo kaj Tirana Vojo". La marksisma teorio pri la ŝtato diras al ni, ĉu "reĝa vojo", ĉu "tirana vojo", ambaŭ estas senescepte diktaturo de la bienula klaso kaj perforto kontraŭrevolucia. Ĉia regado de la bienula klaso kun aspekto de "reĝa vojo" esence estas vojo tirana. La tiel nomata "bonvola regado" k. s. estas nenio alia ol figfolio por sanga perforto kontraŭrevolucia. Lusin trafe montris iam: "La reĝa vojo en Ĉinio ŝajnas esti kontraŭa al la tirana vojo, fakte, ili tamen estas fratoj, antaŭ kaj post ĝi nepre alkuras la tirana vojo." (*Plena Verkaro de Lusin*, vol. 6, p. 10) Sed Deng Tuo multe pledis por la "reĝa vojo" dirante ke "eĉ en la antikveco, la reĝa vojo estas finfine multe pli bona ol la tirana". Por kio estis tia ekstreme absurda laŭdo pri la diktaturo de la bienula klaso? Tio celis ke "ni" akceptu la "spertojn kaj instruojn" kiujn Deng Tuo elpensis, kiaj: "Tio ebligas, ke oni komprenas ĉe ekrigardo ke tiutempe la ambiciuloj por hegemonio ĉie havigis al si malamikojn, kaj estis kiom malbonvenigitaj de la popolo!" La verkinto speciale ĝin interpretis en "nian lingvon" (t. e. lingvo de la "Trifamilia Vilaĝo") dirante ke "la tiel nomata tirana vojo,.... estas aroganta, subjektiva kaj arbitra pens- kaj ag-maniero de tiu, kiu agas ekskluzive laŭ sia propra volo". Ĉu ne multfoje tiun tonon ni aŭdis? La modernaj reviziistoj laŭdis la usonan imperiismon, kiu arogante revas starigi sian hegemonion super la mondo, kiel anĝelon de paco, kaj malice kalumniis Ĉinion, kiu firme oponas kontraŭ la usona imperiismo, kiel landon "militeman" kaj "hegemoniisman". La enlandaj reakciaj klasoj aktive distrumpetis pri "tri pacoj kaj unu malmulto" — t. e. "paco" kun imperiismo, "paco" kun ĉiulandaj reakciuloj, "paco" kun moderna reviziismo, kaj malmulto da subteno al la revoluciaj bataloj de diverslandaj popoloj — kaj atakis nin ke ni estas "izolitaj", kaj "ĉie havigas al ni malamikojn". Se oni nur faras komparon, oni povas klare vidi, ke la malicaj atakoj de *Noktaj Babiloj ĉe Jansan*, kiaj "ambiciuloj por hegemonio", "havigas ĉie al ni malamikojn", "malbonvenigitaj de la popolo" kaj "agas ekskluzive laŭ sia propra volo", ja celis precize nian revolucian linion de la proleta diktaturo. *Noktaj Babiloj ĉe Jansan* ja papage ripetis la atakojn de la en- kaj ekster-landaj reakciuloj! Sed tute ne estis nura "beligo al la feŭda socisistemo", kiel diris la artikolo de la *Pekina Ĵurnalo*!

La 29-an de marto, aperis artikolo "Pledi por Li Sancaj". La titolo mem estas stranga. En nia tempo, neniu atakis Li Sancaj, kiu vivis antaŭ kvarcent jaroj. Por kio necesas laŭtvoĉe "pledi por

Li Sancaj"? Laŭ la artikolo, Li Sancaj "estis pozitiva homo en la historio" kaj granda heroo kiu "atakis la feŭdisman malluman politikon". Sed kiam oni rigardas en la *Historion de Ming-dinastio*, oni trovas tion malvera. Li ja estis ekzekutisto en sanga subpremado al la leviĝoj de kamparanoj, kiel skribite, "ĉiujn grandajn kanajlojn kaj longjarajn rabistojn li arestis kaj pereigis per diversaj planoj". Dum lia tuta vivo, maron da sango li ŝuldis al la popolo. Li estis lakeo de la bienula klaso tutkore servanta la "feŭdisman malluman politikon"; foje kaj refoje li peticiis al la kortego por komplete sufoki kaj ekstermi la de li nomatajn "ribelojn" kaj "grandajn rabistojn" por "konservi por ĉiam" la regpovon de la bienula klaso. Kio estis la vera intenco de la "pledo" por tia homo?

Li Sancaj ja estis karieristo kun ambicio rampi en la reĝan kabineton. Ĉar inter li kaj la tiama reganta sektoro de la bienula klaso troviĝis kontraŭdiro, kiel "opozicianto" li senĉese atakis la regantan partion uzante la sloganon "por la bono de la popolo" en sia peticio al la kortego. Kaj li estis "deoficigita" en la interna kontraŭdiro inter la reciproke mordantaj hundoj. Deng Tuo laŭdegis tiun "deoficigitan" "opozicianton" kaj false faris lin granda heroo, ĉar Deng Tuo ja intencis uzi tiun mortinton por "pledi" por la dekstraj oportunistoj. Li koncentris sian skribon sur la parton post lia "deoficigo": "Eĉ post kiam Li Sancaj fine reiris en sian naskiĝlokon, oni ankoraŭ kulpigis lin pri 'ŝtelo de lignoj de la imperiestro por konstruigi sian privatan loĝdomon' ktp." "Li Sancaj ripete prezentis peticion, ...sed la kortego de Vanli ne kuraĝis ĝisfunde enketi la fakton." La tiel diritaj vortoj "ne kuraĝis ĝisfunde enketi la fakton" estas falsigo elpensita por aludi ion alian. En la historio ja estas klare skribite, ke grupo da ŝtatoficistoj "iris enketi". Deng Tuo nur volis per tio laŭdegi energie la tiamajn "deoficigitajn" dekstrajn oportunistojn, malhelpi la batalon de la revoluciuloj por daŭre enketi ĝis klareco la krimagojn de la dekstraj oportunistoj, renversi per ĉiuj fortoj la verdikton por la dekstraj oportunistoj kaj energie subteni ilin fari refoje furiozan atakon kontraŭ la Partio per "prezento de peticio" post sia "deoficigo".

"Pledi por Li Sancaj" estis daŭriga verko de *Deoficigo de Haj Ĵuj*, kaj "Li Sancaj" estis "La Justa Moŝto Haj" deoficigita. "Ĉu tio ne estas tute klara?"

Estas tro multe da verkoj per kiuj la "Trifamilia Vilaĝo" rekte atakis la Centran Komitaton de la Partio, Prezidanton Maŭ kaj la Ĝeneralan Linion. Kaj ne estas eble citi ilin ĉiujn. Nur el parto de la artikoloj aperintaj kune kun la herezaj ventoj post la publikigo de la *Deoficigo de Haj Ĵuj*, oni jam povas vidi kiom surprizaj estas la nigraj intrigoj en la "Trifamilia Vilaĝo", kiom forta estas la klasa malamo kiun havas tiu plenmano da personoj kontraŭ la Partio kaj socialisma afero, kaj kiel ili, ŝparante neniun rimedon, laŭdegis kaj subtenis la dekstrajn oportunistojn, t. e. la revizioistojn. Ili esperis ke Ĉinio ŝanĝos sian koloron, t. e. la ruĝa Ĉinio transformiĝos en la nigran. Tiu ĉi nigra gastejo estas grava nesto por restarigo de kapitalismo, kie kaŝiĝas venenaj serpentoj; oni devas nepre ĝin ĝisfunde malkaŝi kaj detrui! Ekagu ni ĉiuj por detrui la "Trifamilian Vilaĝon" kaj daŭrigi la revolucion ĝis la fino. Tio estas nia batala tasko en nuntempo!

ĈIEN PENETRI KAJ ĈIU-RIMEDE EFEKTIVIGI LA "PACAN EVOLUON"

Krom la artikoloj, kiuj estas evidente kontraŭpartiaj, kontraŭpopolaj kaj kontraŭsocialismaj, en *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* kaj *Notoj de Trifamilia Vilaĝo* troviĝas ankoraŭ aro da grandaj venenherboj aperantaj en la formoj de la t. n. "akademia diskutado", "esploro de historiaj materialoj" kaj "ripozo". Sub la ŝirmilo de la t. n. "prikoni utilajn antikvajn kaj modernajn sciojn", ili lanĉis atakon al socialismo de ĉiuj flankoj. Ili ne simple "beligis la feŭdan socisistemon" kaj "distrumpetis por mortintoj" ĝenerale, sed havas en si aktualan politikan celon: Unuflanke, en kunordigo kun la nigra linio okulfrape kontraŭpartia, kontraŭpopola kaj kontraŭsocialisma, ili, sub la ŝirmilo de "historio",

"instruoj" kaj "intereso", paralizas la revolucian singardemon de homoj kaj trompas pli multe da legantoj por plivastigi la influon; aliflanke, ja ili mem, per la rimedo "tranĉi kapon per mola tranĉilo", kontraŭas ĉiuflanke la proletan linion firme praktikatan de la Partio kaj kamarado Maŭ Zedong en ĉiu sfero, ĉiuflanke degenerigas la revoluciajn funkciulojn kaj popolanojn per la bienul-burĝa penso por praktiki la "pacan evoluon". Ĉiu ajn, kiu sorbiĝis pri tio aŭ estas ravita, degeneros en novan burĝan elementon. Akra venena sago kaj multkolora sukertegita obuso jen estas du rimedoj uzataj de la "Trifamilia Vilaĝo".

En sia unua artikolo de *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan*, Deng Tuo elektis kiel sian ŝildon jenajn vortojn: okupi "La Trionon de la Vivo". Li diris, ke li volas "atentigi ĉiujn zorge ŝati la trionon de sia vivo kaj kun malpeza humoro prikoni utilajn antikvajn kaj modernajn sciojn post sia tuttaga laborado". "Triono" signifas laŭvorte "postlaboran" tempon. Sed tio, kion "Trifamilia Vilaĝo" postulis, estas kompreneble ne nur "triono". Ĝi ja volas renversi la tutan proletan diktaturon kaj efektivigi restarigon de kapitalismo. Tamen la "triono" povas esti utiligata ĝuste por ŝirmi okupadon de la ceteraj "du trionoj". La vortoj, ke oni legu *Noktajn Babilojn ĉe Janŝan* kun "malpeza humoro", ja celis paralizi ĉies revolucian singardemon. Ili volis degenerigi tiujn, kies revolucia starpunkto ne estas firma, komence de "la triono de la vivo" ĝis la tuto, ke tiuj fariĝu la organiza forto kaj socia bazo por varbado de rekrutoj kaj praktikado de la "paca evoluo" fare de "Trifamili-vilaĝa" kliko.

Noktaj Babiloj ĉe Janŝan multe uzas la formon de respondo al legantoj. Kaj Deng Tuo en siaj artikoloj tre ofte babiladis, kiel li akceptis junulojn, kiel li ricevis "inspirojn" kaj "proponojn" de "samlokanoj", "kamaradoj", "amikoj", "knaboj", "redaktoroj", "lernantoj", "kulturaj instruistoj"... eĉ de fakaj laborantoj, kiuj "laboras" en diversaj brancoj, aŭ respondis al iliaj "demandoj". Oni povas vidi de tio, kiel vaste ili aktivadas. La propagando de la kontraŭsocialisma ideologio estas kombinita kun la vasta aktivado. Aron da personoj ili venenas, kaj alian aron ili al si altiras. Ili sub la ŝirmo de "sciencaj konoj" tutforte klopodas allogi junulojn al la rondo de la granda nigra gastejo "Trifamilia Vilaĝo". Estos sufiĉe preni nur du ekzemplojn: En sia artikolo "Homoj Malriĉaj, Sed Ilia Volo Ne", Deng Tuo diris: "Antaŭhieraŭ iu juna lernanto min vizitis". Li "volis traduki parton el *Biografioj de la Malriĉaj Kleruloj* kompilita de Huang Giŝuj de Ming-dinastio en la parolan stilon, kaj demandis, ĉu mi tion aprobas". La libro celis eternigi per biografioj ruiniĝintajn elementojn de la bienula klaso. Ĝi pledis precipe por la t. n. "spirito de nefleksebleco" de la bienula klaso kaj estas ege koruptema al la popolo nuntempa. La lernanto estas serioze koruptita de la burĝa ideologio, sed li ankoraŭ ne decidis. Veninte en la manojn de Deng Tuo, li fariĝis kvazaŭ trezoro. Deng Tuo ne nur laŭdis la penson de la lernanto kiel "tre bonan", sed ankaŭ tuj elverŝis multon pri politika teorio, kunligante la tradukadon de *Biografioj de la Malriĉaj Kleruloj* kun "respekto" al la bienula klaso kaj lernado de "nobla spirito" de tiu ĉi klaso, kaj aludis, ke ĝi povos esti "modelo" por iuj homoj kiuj "eventuale renkontos neantaŭviditan malriĉecon en la estonto". Ĉu tio ne estas evidente puŝi homon en puton kaj poste sur lin ĵeti ŝtonon? Ĉu tio ne estas utiligi la junulon por servi al la nuntempaj "malriĉaj kleruloj" t. e. al la kontraŭsocialismaj elementoj? "Iu studento de la Pekina Radiodisaŭdiga Instituto alsendis leteron", ankaŭ tiu "studento" estas regita de la burĝa ideologio, en lia kapo sidas trivialaj interesoj. "En aŭtobuso" li atentas nur pri kiom longaj estas la "haroj" de iu "virino", kaj li petis opinion de Deng Tuo, "kian inspiron ni povas trovi de tiaj longaj haroj". Kaj Deng Tuo tuj skribis putran artikolon tipan por la dekadenca klaso. Li ne nur subtenis la "studenton", sed ankaŭ el la kortega vivo de la plej dibocaj imperiestroj en la historio elprenis priskribon de "longaj haroj" de diversaj "belulinoj" por vaste reklami. Ĉu tio ne estas konduki tiujn homojn koruptitajn de la burĝa ideologio pliapaŝe al putrado, degenerado kaj transformiĝo al novaj burĝaj elementoj? Ĉiuj junuloj venenitaj kaj altiritaj de la "Trifamilia Vilaĝo" devas leviĝi por akuzi ilin pri tiuj krimagoj!

Se oni legas laŭ tiu ĉi vidpunkto tiujn verkojn, kiuj predikas la reakcian ideologion, tiam ilia politika celo estos tre klara:

Ili plenforte disvastigas la reakcian edukan linion de burĝa klaso kun celo prepari la organizan forton por restarigo de kapitalismo. Ili prenas burĝan teorion pri homeco kiel bazon de edukado, dirante, ke oni "devas ĝenerale aprobi la opinion de Meng Zi ke 'homo posedas bonan naturon' ", kaj oponas la uzon de klasa vidpunkto en analizado kaj en edukado de la juna generacio por kovri siajn krimagojn pri venenado al junuloj. Ili eĉ distrumpetas, ke "la tuta metodo de la tradicia por-aktora instruado konformas al la principo de pedagogio", kaj proponas ke "la tuta socio plene apliku tiun metodon". Ili pledas por elimini la klasan linion per la t. n. "enoficigo laŭ kapablo" kaj "laŭplane" kulturi amason da daŭrigantoj de la bienula kaj burĝa klasoj. Ili tutforte klopodas rekomendi al junularo "la vojon kunligi memstudon kun la familia konoheredo", fariĝi "fama instruitulo" per "peniga studo" kaj "meti bazon" per "ellego de ĉiuj materialoj"... Ĉio ĉi tio ne sole estas problemo pri fariĝo de famulo kaj fakulo laŭ burĝa ideo, sed ĉefe tio, ke ili volas per tiu rimedo korupti kaj altiri al si grupon da personoj kaj kolekti ĉirkaŭ si grupon da disĉiploj de la "Trifamilia Vilaĝo" por ke la lastaj fariĝu disvastigantoj de ilia kontraŭkomunisma babilaĵo, kaj ke iuj junuloj fariĝu instrumentoj de la "Trifamilia Vilaĝo" por restarigo de kapitalismo. Ili uzis la titolojn "instruitulo" kaj "famulo" kiel allogilon. Iliaj vortoj estas ege dolĉaj, sed ilia koro ege venena.

Ili persistis ĉe la reakcia linio de scienca studo de la burĝaro, por prepari spiritajn kondiĉojn por restarigo de kapitalismo. Ili elmetis la sloganon "Plimulte lerni kaj malplimulte kritiki", dirante: "Oni devas plimulte lerni pri ĉiuj aferoj kaj malplimulte kritiki ilin", kaj ili malice sarkasme atakis tiujn, kiuj alte tenas la revolucian standardon, ke ili "estas ĉikanemaj", "ĉiam ion moke kritikas" kaj "nepre suferos grandan malagrablaĵon". Kion signifas "Plimulte lerni kaj malplimulte kritiki"? Tio signifas nur permesi al ili malbeni la penson de Maŭ Zedong kaj distrumpeti la kulturon de la bienula kaj burĝa klasoj, nur permesi al ili servi al restarigo de kapitalismo per "sciencoj", sed malpermesi al ni kritiki la kulturon de la burĝa kaj bienula klasoj, kaj signifas nuligi al ĉiuj revoluciuloj la rajton kritiki ilin. Tio estas, ke oni devas akcepti la tutan kulturon de ekspluatanta klaso kaj rigardi ĝin kiel imperiestran edikton, kaj neniun ĝian hareton oni rajtas tuŝi. Bati la proletaron, subteni la burĝaron, firmigi la regpovon de la nigra gastejo al diversaj sciencaj institutoj kaj subteni tute liberan amasan aperon de ĉiuj venenherboj, inkluzive tiujn grandajn venenherbojn de "Trifamilia Vilaĝo", jen estas la kerno de ilia reakcia linio de scienca studo.

La sama stato estas en la sfero de literaturo kaj arto. Same kiel "Plimulte lerni kaj malplimulte kritiki", ili fabrikis la t. n. sloganon "trakti egale", nome "Ĉiuj teatraĵoj estas egalaj, ĉu la modernajn, ĉu la tradiciajn ni devas trakti egale". En la klasa socio ne troviĝas superklasa "egaleco", kaj tute ne ekzistas "egaleco" inter la proletaro kaj burĝaro, sed ekzistas nur la problemo — kiu venkos kiun. Se vi subtenas la modernan teatraĵon kun revolucia temo de la proletaro, vi nepre devas kritiki la antikvan de la bienula kaj burĝa klasoj; se vi distrumpetas, ke en la "teatraj heredaĵoj" "troviĝas bonaj teatraĵoj tute konformaj al nuntempa bezono", vi do nepre devas bati kaj subpremi la modernan revolucian teatraĵon. "Egale trakti" ja signifas trafi du aglojn per unu sago t. e. doni baton al ĉiu ajn ago subtenanta tutforte la modernan revolucian teatraĵon, kaj altigi la valoron de grandamaso da venenherboj kaj protekti ilin kontraŭ kritikado, por servi al ilia agado kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma.

Ili persistas ĉe la reakcia moralo de la bienula kaj burĝa klasoj intencante restarigi ekde la socia interrilato la regadon de la ekspluatantaj klasoj. Ili rekomendas la t. n. "nefleksebIan spiriton", "senambiciecon kaj memamecon", "nekonfuzeblan anim-trankvilecon" kaj "mongajnon" de la bienula kaj burĝa klasoj... la ĝisoste putrintan filozofion de vivo kaj pledas ke oni lernu — anim-trankvilecon de la reakcia filozofo Ĝu Hi, la "rezistan spiriton" de "malestimo al laboro" de Ĝang Ŝi kaj "sinregon

kaj revenon al feŭda moralo" de Konfucio... Ili eĉ plenforte distrumpetis restarigi la etiketon "saluti per kunigitaj manoj" de la bienula klaso! Tio estas malkaŝa postulo al ni por retroiri al la malnova Ĉinio de feŭdismo kaj kapitalismo! Kamaradoj, vi nur imagu: Se efektiviĝus ilia tuta celo, ĉu la nova moro kaj nova moralo de komunismo ne estus tute dispremitaj? ĉu nia socio ne fariĝus la malluma mondo kun feŭdisma ordo kiel ĝia normo? Se oni devas saluti kun "respekto" al la ekspluatantaj elementoj ĉe renkontiĝo kun ili, ĉu tio ne estus kontraŭrevolucia restariĝo? ĉu la vastaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj ne suferus denove kruelan subpremon de tiuj "sinjoroj" kun "nefleksebla spirito", t. e. de obstinaj elementoj de la ekspluatantaj klasoj?

Ili kiel lojale filecaj idoj de la bienula klaso, malkaŝe postulis eternigi la bienulan klason per biografioj. Bonvolu legi jenan paragrafon de Deng Tuo: "En la pasinteco, antaŭ kompilado de loka historio en diversaj lokoj, oni laŭkutime proponis unue nomliston de t. n. 'lokaj eminentuloj', kaj poste kolektis materialon kaj verkis por ili biografiojn respektive. Kaj nun, se ni volas kompili historion de Pekino, evidente ni devas konsideri doni decan lokon al la granda Mi kaj malgranda Mi (t. e. Mi Vanĝong kaj Mi Hanven, la burokratoj de Ming- kaj King-dinastioj) de Vanping-gubernio." "La pasinteco" signifas feŭdisman epokon kaj epokon de kuomintanga reakciularo; "laŭ-kutime" signifas "laŭ" la "kutimo" de la bienuloj kaj grandaj sinjoroj, precipe de la tiranaj bienuloj, la naŭze adoritaj kiel "lokaj eminentuloj" estas senescepte elstaraj reprezentantoj de la bienula klaso. La propono, ke "nun ni" eternigu tiujn "lokajn eminentulojn" per biografioj, signifas denove surpodiigi la faligitajn ekde la agrara reformo bienulojn, lokajn tiranojn kaj ties prapatrajn nomtabulojn kaj lasi la vastan amason de malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj fali denove en la staton de bovoj kaj ĉevaloj de la "lokaj eminentuloj"! Ĉu tio ne estas aroganteco spitanta eĉ leĝon kaj la ĉielon? Responde al la alvoko de la ĉefgeneralo, *Notoj de Trifamilia Vilaĝo* multfoje elmetis tiun ĉi problemon, postulante eternigi per biografioj militaristojn, burokratojn, bienulojn kaj "negativajn personojn". Tio estas aktivado por restarigo de kapitalismo en ties plej profunda signifo. Tio celas ja pliigi politikan kapitalon de la bienula kaj burĝa klasoj kaj krei al ili novajn kondiĉojn por denove regi la ĉinan popolon! Tian kriman aktivadon la vasta amaso de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj neniam permesos sukcesi!

La suprecititaj estas nur parteto el la tuta materialo. Oni povas vidi, ke sub la ŝildo de "instruoj" kaj "scioj", la diversaj propagandoj koncentriĝas al jena punkto: oponi la penson de Maŭ Zedong, nei ĉion de socialismo, klopodi multmaniere degenerigi funkciulojn kaj junulojn, plene efektivigi restarigon de kapitalismo de kapo ĝis piedo.

Kamarado Maŭ Zedong diris: "La proletaro volas transformi la mondon laŭ sia mondkoncepto, dum la burĝaro ankaŭ volas transformi la mondon laŭ sia mondkoncepto." (*Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo*) Ĉiuj putraj reakciaj aferoj gustoplene priskribitaj de "Trifamilia Vilaĝo" estas la manifestaĵo de ilia reakcia mondkoncepto. Oni povas travidi el tio la putran animon de la generaloj kaj soldatoj de "Trifamilia Vilaĝo". Estis "fama diro" de Vu Han: "La postlabora tempo estas libera tereno por galopado de la unua intereso". Tiu ĉi diro malkaŝis ke iliaj kunvenado, laborado kaj raportoj... ktp. faritaj ĉiutage sub la mantelo de komunistoj estas senescepte nur ŝajnigoj, nevolaj kaj ne la "unua intereso"; nur kiam venas la "postlabora tempo", kaj en "Trifamilia Vilaĝo", ilia vera vizaĝo — la "unua intereso" malkaŝiĝas senskrupule. Krom komploti kontraŭ la Partio kaj socialismo, ili dibočas en frandado, drinkado, ludado kaj amuziĝo, babilado pri katoj kaj hundoj, adorado al bienuloj, kolektado de antikvaj kuriozaĵoj, *maĝang*-ludado, negocado, ĉasado de la tuta vivmaniero de la reviziismaj intelektuloj en Sovetunio, kaj ili povas fari ĉiajn putrajn agadojn, de eksento de "acido en la koro" pro malsobra deklamo de versoj de Du Fu: *Al dandoj malsato ne ĝenas, sed ĉiam suferas kleruloj*, ĝis ĝuo de dolĉeco en la animo pro inspiro de la "miraklo de longaj haroj" de "belulinoj"... Ili estas duvizaĝuloj kaj hipokrituloj. Parto el iliaj agoj estas esprimita en vortoj por putrigi la popolon kaj nian Partion.

Ĉu vi volas scii, kio estas "paca evoluo"? Vi do rigardu tiun ĉi vivan specimenon, la "Trifamilian Vilaĝon". Iliaj abomenaj babilaĉoj, ilia maniero de agado kaj la rezulto, kiun ili volas atingi, estas praktikado de la "paca evoluo" en ties plej preciza senco. De tiuj ĉi harstarigaj negativaj ekzemploj ni povas ricevi profundajn instruojn de klasbatalo.

STRATEGIO DUM RETIRIĜO

En septembro de 1962, okazis la Deka Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio. En la sesio kamarado Maŭ Zedong faris al la tuta partio kaj la tuta popolo grandan alvokon nepre ne forgesi klasbatalon. La sesio alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, sonore sonigis la batalan klarionon por decidema batalo kontraŭ la kapitalisma kaj feŭdisma fortoj intencantaj restariĝi kaj montris: "Tia klasa batalo respeguliĝos neeviteble en la Partio." Ĉiaj diabloj kaj demonoj tremis pro teruro kaj estis forte skuitaj. "Trifamilia Vilaĝo" trovis sin en malfavora situacio kaj komencis sin retiri. La ĉefgeneralo retiriĝis la unua. Tuj en oktobro, 1962, Deng Tuo skribis en "Al la Legantoj" en la kvina kolekto de *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan*: "Mi jam ne verkis *Noktajn Babilojn ĉe Janŝan*, ĉar mia atento de la amatora agado lasttempe turniĝis al aliaj flankoj."

La lasta artikolo de *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* estis "Tridek Ses Artifikoj" aperigita je la 2-a de septembro. Laŭ la populara esprimo "retiriĝo — la plejsaĝa el la tridek ses artifikoj", do la artikolo aludis ke li pretas forgliti. Anstataŭ meti tiun artikolon je la lasta laŭ ordo de la apera tempo, la aŭtoro singardeme ĝin metis meze inter la aliaj, kiam li kompilis la kolekton, por ke oni ne rimarku la spurojn de "forglitado". La artikolo signifoplene diris: "La artifiko, kiun aplikis tiam Tan Daŭgi, estis ne nur la 'retiriĝo — la plejsaĝa'. Se ne estus aliaj artifikoj, li ne povis retiriĝi kvankam li volis. Tamen li alprenis plurajn kunordigitajn artifikojn kiaj erariga armelokado, incito de reciproka malkonfido inter la malamikoj... kaj nur tiel li sukcesis retiriĝi sekure." Post la Deka Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio, "Trifamilia Vilaĝo", krom daŭrigi sian atakon, ja alprenis "plurajn kunordigitajn artifikojn" por ke ĝi povu "retiriĝi sekure" kiam la revolucia popolo ĝin rebatos. Tial estis luditaj de ili ne malmulte da "brilaj prezentadoj". Jen estas iliaj "artifikoj":

1. En la kvina kolekto de *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* la aŭtoro hipokrite "anoncis": "Antaŭe mi estis devigita surĉeviĝi por verki *Noktajn Babilojn*. Nun mi deĉeviĝis, tio celas ankaŭ eviti mian konstantan malkontenton al mi mem. Estos ne malfrue ekpreni la plumon en la estonto, kiam estos vere ia inspiro, kiu malebligos la silenton." Per tiuj vortoj unuflanke li sin senkulpigis, ke la atakado ne estis konscia, kaj la "surĉeviĝo" kaj la "deĉeviĝo" estis devigitaj; aliflanke li aludis, ke iam "en la estonto" en favora situacio li denove "prenos la plumon" kaj ion faros.
2. Daŭre tenante la pozicion de *Notoj de Trifamilia Vilaĝo*, ili unuflanke daŭre lanĉis atakojn kaj, aliflanke, por ŝirmi la retiriĝon, publikigis ankaŭ iajn artikolojn kia "Odo pri Petrolo" esprimantajn aprobon al "la politiko 'sinapogi sur la propraj fortoj', difinita de kamarado Maŭ Zedong".
3. Ili kuraĝigis al diverslokaj ĵurnaloj, ke la lastaj "longdaŭre persistu en la ese-rubrikoj" iniciatitaj laŭ *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan*, por ke estu tenataj pli multe da pozicioj.
4. En 1963-1964, disvolviĝis kritikado al la artikolo de Liaŭ Moŝa "Fantomoj en Literaturaĵoj Ne Malutilas". Kaj en julio 1964, ili deprenis la ŝildon de *Notoj de Trifamilia Vilaĝo* por eviti malkaŝon de la tuta "Trifamilia Vilaĝo" pro Liaŭ Moŝa.
5. Elpaŝis Liaŭ Moŝa por fari hipokritan memkritikon, dirante ke "la eraro estis kaŭzita" de "la burĝa mondkoncepto" "kiu ankoraŭ okupas regantan lokon en mia kapo", kaj ke li "forgesis tion, ke en nia socialisma socio ankoraŭ ekzistas klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasa batalo". Bonvolu atenti: la vortoj estas preskaŭ samaj kun tiuj de Vu Han en sia "memkritiko" iom poste! Li diris ankaŭ, ke li "ne konscie fariĝis helpanto de la burĝaro kaj feŭdaj fortoj en ilia senbrida kontraŭ-

partia, kontraŭsocialisma atakado." Liaŭ Moŝa estis ja nur "helpanto" de Meng Ĉaŭ, oni certe ne esploros pro tio la "Trifamilian Vilaĝon". Ja ne estas neruza tiu ĉi artifiko.

6. Post komenco de la kritikado al la dramo *Deoficigo de Haj Ĵuj*, Hiang Jangŝeng t. e. Deng Tuo ankaŭ urĝeme skribis "kritikan" artikolon, dirante ke "la gvida penso" kaj "ideologia bazo" de la dramo estas "predikado de la moralo de feŭda reganta klaso", kaj nur "predikis historian ideismon". Per tio li unuflanke provis kovri la politikajn celon kaj reakcian karakteron de la dramo, ĵetis al Vu Han savzonon kaj intencis konduki la diskutadon al senelirejo; kaj aliflanke esprimis ke ne ekzistas "Trifamilia Vilaĝo", kaj ke li jam "rompis la rilaton" kun Vu Han. Ĉe la fino li aldonis: "Se kamarado Vu Han havas ion por diri, mi esperas ankaŭ ke li skribos plue artikolojn", por "fari laŭfakte analizon kaj esploron". Per tio li indikis al Vu Han kiel meti la sekvantan ŝakpecon.

7. Vu Han tuj respondis la alvokon, li plurfoje skribis artikolojn por esprimi sian "dankemon" al Hiang Jangŝeng, daŭre faris senbridan atakadon en la nomo de "memkritiko", fanfaronis sentime pro la apogo kaj prenis el la "memkritiko" de Liaŭ Moŝa la talismanojn, kiaj "la ĝusta ideologio ne fiksiĝis sur reganta loko en la kapo", "unuvorte, mi forgesis klasan batalon!" kaj diris, ke post la "kritikado" fare de Hiang Jangŝeng, "mi ekkonis la eraron." Ŝajne li povos forgliti per tia superruzo.

8. Fine, trovinte la situacion malfavora, ili subite "kritikis" Deng Tuo en la nomo de la redakcioj. Ili plene uzis la artifikon de cikadoj: postlasi la ŝelon por protekti sian retiriĝon.

Per tiom da "kunordigitaj" "artifikoj" alprenitaj, ili ja povis "retiriĝi sekure", ĉu ne?! Tiom da ruzaĵoj ili ludis! Ilia friponado al la popolo estas troa! Tamen ili tro subtaksis la distingan kapablon de la revolucia popolo! Ili tro subtaksis la revolucian decidemon de la proletaro! Ĉu ili povus sin kaŝi? Ĉu ili povus forgliti? Sub la gvido kaj eduko de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj kamarado Maŭ Zedong, la vasta revolucia popolamaso decidis komplete elfosi la nigran linion kontraŭpartian kaj kontraŭsocialisman. Ili opiniis sin tre saĝaj en tiuj diversaj artifikoj. Sed fakte ili faris stultaĵojn, kaj tio ja ilin mem perfidis. Ili havis ne nur "komunan reakcian politikan ideon", sed ankaŭ komunan agad-planon. Ili estas kontraŭpartia, kontraŭpopola kaj kontraŭsocialisma kliko konsistanta el manpleno da personoj. Ĉu tio ne estas jam evidenta?

En marto, 1962, ĝuste kiam la senbrida atakado de "Trifamilia Vilaĝo" atingis kulminon, sur *Pekina Vesperĵurnalo* Deng Tuo publikigis poemon kun titolo "Nigra Cigno", i. a. estas jenaj versoj: "La printempa vento songon lulas. Tra la lagaj ondoj varm' alkuras. Nur mi sola tion antaŭscias." Kiel kontente li fanfaronis kiel sagaca "antaŭscianto"! Sed en tiu ĉi fojo, la "antaŭscianto" ne plu estas fidinda. La vera antaŭscianto estas la revolucia popolo kiu posedas la penson de Maŭ Zedong. Rigardu, ĉu la interna intrigo de la "Trifamilia Vilaĝo" ne estas pli kaj pli malkaŝita de la vasta popolamaso?

ĜISFUNDE ELFOSI LA RADIKON DE "TRIFAMILIA VILAĜO" KAJ KOMPLETE ELIMINI ĜIAN VENENAN INFLUON

Oni ne povas ne demandi: Kio estas la kialo, ke "Trifamilia Vilaĝo" entreprenis kontraŭpartian kaj kontraŭsocialisman agadon tiel senbride, tiel dentgrince, tiel senskrupule kaj tiel longe eĉ en la daŭro de kelkaj jaroj? Ĉu ĝi povus esti nur "nemeto de la proleta politiko en la komando"? Se ne "la proleta politiko komandas", do kio komandas?

Ekde la kritikado al *Deoficigo de Haj Ĵuj* oni malkaŝis la reakcian esencon de la dramo kaj ĝian politikan celon subteni la dekstrajn oportunistojn, kaj ankaŭ la fian kontraŭkompartian, kontraŭpopolan kaj kontraŭrevolucian historion de Vu Han. Sed oni povas elfosi ĝian plej profundan radikon, ĝisradike forigi tiun ĉi tufon da grandaj venenaj herboj kaj detrui tiun ĉi grandan nigran gastejon, nur kiam oni ekzamenas la dramon *Deoficigo de Haj Ĵuj* laŭ la tuta agado de la "Trifamilia Vilaĝo" kaj klare konas kian rolon ludis la tuta "Trifamilia Vilaĝo" en la akra klasbatalo dum la lastaj jaroj.

Kamarado Maŭ Zedong diris: "Ĉio reakcia ja ne falos, se vi ĝin ne faligas." (*La Aktuala Situacio kaj Nia Politiko post la Venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito*) Tiun ĉi universalan veron ankoraŭfoje pruvis la strategio, kaj batali kaj retiriĝi kaj fari bastionon ĉiupaŝe, uzata de la kliko de "Trifamilia Vilaĝo" ekde kritikado al *Deoficigo de Haj Ĵuj*. Reakciaj klasoj kaj ĝiaj reprezentantoj neniam memvole sin retiras de la historia scenejo. La proletaro povas reakiri iom post iom la poziciojn el manoj de tiuj "diverssciuloj", nur post kiam leviĝas la vastaj amasoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj tra paŝopostpaŝa malfacila batalado.

Al nemalmultaj institucioj etendiĝis la palpiloj de la kliko de "Trifamilia Vilaĝo". La *Noktaj Babiloj ĉe Jansan* disvastigis fian influon en la tuta lando. Pro ŝildo de "konoriĉo" kaj "bela stilo", ĝi sukcese altiris al si parton da personoj, al kiuj mankas kapablo de politika distingo, kaj trovis admirantojn kaj sekvantojn en la ĵurnalisma, eduka, literatura, arta kaj akademia rondoj. Deng Tuo mem ankaŭ distrumpetis: "la vidpunktoj kaj argumentoj en multaj artikoloj estas aprobitaj de amikoj", "venas pli kaj pli multe da leteroj de malproksimaj legantoj", "por kontentigi postulojn de la legantoj, kelkaj ĵurnaloj en aliaj lokoj alprenis ankaŭ la saman formon aperigi eseojn pri diversaj konoj en fiksita rubriko". Troviĝis ankaŭ artikoloj kiuj "resonis" kelkajn argumentojn de la *Noktaj Babiloj*. Plie, *Pekina Vesperĵurnalo* je la 9-a de septembro, 1961, ankaŭ faris brue per grandaj literoj reklamon pri la eldonado de *Noktaj Babiloj ĉe Jansan* en broŝurformo fanfaronante ke "la aŭtoro kaptis siajn temojn el la aktualaj problemoj", ke "ĝi estas kaj instrua ideologie kaj riĉiga de diversaj konoj", kaj uzis ĉiujn rimedojn por disvastigi ĝian venenan influon en la popolo. Serioza estis ĝia degeneriga influo kaj vasta estis la venenigo. Por plene forigi ilian fian influon estas necese, ke la vastaj amasoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj leviĝu komplete malkaŝu de ĉiuj flankoj la malutilon de *Noktaj Babiloj ĉe Jansan* kaj *Notoj de Trifamilia Vilaĝo* kaj faru pli profundan kritikadon.

La procezo de kritikado al *Deoficigo de Haj Ĵuj* ĝis tiu al "Trifamilia Vilaĝo" estas animoskua klasbatalo kaj granda revolucio en la sferoj de politiko, ideologio kaj kulturo. Fronte al tia malfacila batal-tasko, ni nepre devas kuraĝi revolucii.

Kamarado Maŭ Zedong tiel nin kuraĝigis: " 'Se oni spitas torturon de korpo-distranĉo, eĉ imperiestron li kuraĝas deĉevaligi', ni devas posedi tian grandan sentiman spiriton dum la luktado por socialismo kaj komunismo." (*Parolado en la Tutlanda Konferenco pri Propaganda Laboro de la Komunista Partio de Ĉinio*) Kiel estas necese por ni nun disvolvi tian principan kaj kritikan spiriton elire el la komunisma afero! Ĉiujn, kiuj oponas kontraŭ la penso de Maŭ Zedong, malhelpas la antaŭenmarŝon de la socialisma revolucio kaj kontraŭstaras al la interesoj de la revoluciaj popoloj de Ĉinio kaj la tuta mondo, ni malkaŝu, kritiku kaj piedfaligu, tute egale, ĉu ili estas "majstroj" aŭ "aŭtoritatuloj", ĉu trifamilia vilaĝo aŭ kvarfamilia vilaĝo, kiom famkonataj ili estas, kian altan postenon ili okupas, de kiuj ajn ili estas instigataj kaj subtenataj, kaj de kiom ajn da homoj ili estas distrumpete prilaŭdataj. En principaj problemoj, povas esti nur: aŭ la okcidenta vento superu la orientan, aŭ la orienta vento superu la okcidentan. Por socialisma revolucio, por defendo de la penso de Maŭ Zedong kaj por komunisma afero, oni devas kuraĝi pensi, kuraĝi paroli, kuraĝi vojon elhaki, kuraĝi agi kaj kuraĝi revolucii!

La Ora Simio eklevas kolere l' masivan bastonon,
La jadsimila firmamento klariĝas de polva nebulo.

Kiom ajn da venena nebulo kaj densa polvo la "Trifamilia Vilaĝo" disŝutis, ili estos certe komplete elpurigitaj, kiam miloj kaj milionoj da laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kiuj tenas en la manoj "masivan bastonon" — la penson de Maŭ Zedong, leviĝas por lukti. La helega brilo de la penso de Maŭ Zedong trapenetros tiujn mallumajn anguletojn, tiel ke ĉiuj diabloj kaj demonoj malkaŝiĝos en siaj propraj formoj!

(La originalo aperis en la ŝanhajaj ĵurnaloj *Jiefang Ribao* kaj *Wen Hui Bao* en 10-a majo 1966)

Ĉinio en Alta Tajdo de Gran

DE la lastaj monatoj, sub la granda alvoko de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, alta tajdo de granda proleta kultura revolucio arde disvolviĝas tra la tuta Ĉinio. Ĝi estas granda revolucia movado por firmigi la proletan diktaturon kaj antaŭenpuŝi la socialisman aferon.

Centmilionoj da laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj vastaj amasoj de revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj kun la penso de Maŭ Zedong kiel armilo verkas artikolojn, diskutas en kunsidoj kaj skribas opiniafiŝojn por forbalai demonojn kaj diablojn, kiuj okupas ideologiajn kaj kulturajn batalpoziciojn, plene starigi la proletan ideologion kaj plene elimini la burĝan ideologion. Vicoj kaj vicoj da papagoj de la imperiistoj kaj reakciaj "specialistoj", "instruituloj" kaj "aŭtoritatuloj" de la burĝa klaso estas tretitaj surteren, tiel ke ilia prestiĝo estas plene debatita en polvon. La reakciaj citadeloj okupitaj de la anoj de nigra bando kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma estas konkeritaj unu post alia. La grandeco de la skalo, forteco de la impeteco, imponeco de la atmosfero kaj forteco de la potenco de tiu granda proleta kultura revolucio estas senprecedencaj en la homa historio. En la tuta Ĉinio aperas bolanta revolucia sceno.

Prezidanto Maŭ konstante instruas al nia popolo, ke ne sufiĉas socialisma revolucio sur la ekonomia kaj politika frontoj, kaj estas necese konduki ĝisfundan socialisman revolucion ankaŭ sur ideologia kaj kultura frontoj. Prezidanto Maŭ montris, ke kun la profundiĝo de la socialisma revolucio de nia lando nepre elstariĝos la problemo de proleta kultura revolucio. La proleta revolucio postulas ĝisfunde detrui la putran malnovan kulturon de la burĝa kaj feŭda klasoj kaj krei tute novan socialisman kulturon, kiu servas al la proleta politiko kaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Sed la renversitaj burĝaro kaj aliaj ekspluataj klasoj obstine okupas la ideologian kaj kulturan batalpozicion kaj disvastigas kulturajn venenaĵojn de kapitalismo kaj feŭdismo por servi al la burĝa politiko, pavimi la vojon al restarigo de kapitalismo kaj krei publikan opinion por renversi la proletan regpotencon. Tiel, la klasbatalo inter la proletaro kaj burĝaro en la ideologia kaj kultura kampoj fariĝas neevitebla kaj iafoje eĉ tre intensa.

Nelonge post kiam la socialisma transformo de posedsistemo de produktaj rimedoj estis ĝenerale plenumita en 1956, jam aperis en 1957 la atako de la dekstruloj de la burĝaro, aperis intensa klasbatalo. Sub la gvido de la Komunista Partio, la tutlanda popolo retrobatis tiun atakon.

Dum la periodo de 1959 ĝis 1962, kiam la ekonomio de nia lando alfrontis provizorajn malfacilojn kaŭzitajn de la subfosado de Ĥruŝĉov-reviziistoj kaj seriozaj naturaj katastrofoj en la lando, imperiismo kaj moderna reviziismo levis kontraŭĉinan tajdon. Profitante la okazon, la reakciaj fortoj de la enlanda burĝaro disvolvis furiozan atakon kontraŭ la proletaro en kunordigo kun imperiismo kaj moderna reviziismo. La burĝaj reprezentaj personoj, okupantaj lokojn en akademiaj, edukaj, ĵurnalismaj, literaturaj kaj artaj, eldonaj kaj aliaj kulturaj rondoj, furioze atakis la proletan diktaturon kaj la socialisman sistemon kaj atakis la gvidadon de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ.

da Proleta Kultura Revolucio

Tiuj kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj krimaj agadoj de la burĝaro jam delonge vekis fortan indignon ĉe la vastaj laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj kaj ĉe la revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj. La revoluciaj amasoj senĉese batalas kontraŭ ili. La 10-an de novembro lastajare, la ŝanhaja ĵurnalo *Wen Hui Bao* aperigis la artikolon verkitan de Jaŭ Venjuan "Kritiko pri la Nove Verkita Historia Dramo *Deoficigo de Haj Ĵuj*". Per tio estis donita la signalo de granda reatako de la proletaro kontraŭ la reakcia burĝaro kaj malfermita la prologo de la alta tajdo de tiu ĉi granda kultura revolucio.

De la apero de la artikolo de Jaŭ Venjuan en novembro lastajare ĝis aprilo ĉijare, estis kritikitaj kaj malkovritaj ĉefe la kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj krimagoj de Vu Han. Vu Han estas kultura sklavulo de la usona imperiismo kaj edukita de komence de la reakcia politikistaĉo Hu Ŝi. Li senŝanĝe adoras la usonan imperiismon kaj estas pro Ĉiang Kajŝek kaj kontraŭ komunismo. En la antaŭvespero de la Liberiĝo de la tuta lando, Vu Han enŝteliĝis en la vicojn de la revolucio kaj poste estis enoficigita kiel vicurbestro de Pekino. Sub la ŝildo de revolucia kadro, li faras kontraŭrevoluciajn aferojn kaj fakte estas lakeo de la usona imperiismo.

De 1959 Vu Han skribis serion da reakciaj artikoloj kaj dramoj por ataki la Komunistan Partion, la socialisman sistemon kaj la proletan diktaturon. En siaj dramoj kaj artikoloj pri Haj Ĵuj, li skribis pri la deoficigo de Haj Ĵuj, feŭda burokrato el Ming-dinastio antaŭ 400 jaroj, distordante la historian fakton kaj aludante al la nuno per cito de antikvaĵoj, por pledi por la dekstraj oportunistoj kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj, "deoficigitaj" de la ĉina popolo en 1959, kiel maljuste traktitaj kaj instigi ilin al restarigo de siaj pozicioj.

La artikolo de Jaŭ Venjuan aperigita en novembro lastajare kaj la artikoloj "La Reakcia Esenco de 'Haj Ĵuj Insultas Imperiestron' kaj *Deoficigo de Haj Ĵuj*" verkita de Ki Benju kaj " 'Haj Ĵuj Insultas Imperiestron' kaj *Deoficigo de Haj Ĵuj* Estas Du Venenaj Herbegoj Kontraŭpartiaj kaj Kontraŭsocialismaj" verkita de Guan Feng kaj Lin Gie, ambaŭ aperigitaj en la komenco de aprilo ĉijare, malkovris la reakcian politikan naturon de Vu Han kaj levis la batalon de kritiko pri Vu Han sur la nivelon de klasbatalo inter la proletaro kaj burĝaro kaj inter la du vojoj de socialismo kaj kapitalismo. La plejparto de la ĵurnaloj kaj revuoj de la tuta lando amase aperigis artikolojn por plue kritiki Vu Han. La historia fizionomio de Vu Han, kiu estas kontraŭ komunismo kaj la popolo kaj estas sklavulo de la usona imperiismo, estas pli klare malkovrita.

De la komenco ĝis la fino de majo ĉijare, la sekreto de la "Trifamilia Vilaĝo" estis plue malkaŝita. La "Trifamilia Vilaĝo" kiu inkluzivas Deng Tuo, Vu Han, Liaŭ Moŝa k. a., estas kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma kliko. Deng Tuo estas renegato enŝteliĝinta en la Partion kaj dekstrulo elgliti-ĝinta el reto en 1957. En la lastaj jaroj li ŝtelis al si la oficon de sekretario de la sekretariejo de la Pekina Urba Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Liaŭ Moŝa estas reprezenta persono de la burĝaro enŝteliĝinta en la Partion. En la lastaj jaroj li ŝtelis al si la oficon de estro de Unuecfronta Departemento de la Pekina Urba Komitato. Uzante la revuon *La Fronto* kaj la taggazetojn *Pekina*

Ĵurnalo kaj *Pekina Vesperĵurnalo* de la Pekina Urba Komitato kiel instrumentojn, Deng Tuo, Vu Han, Liaŭ Moŝa kaj aliaj aperigis grandan kvanton da eseoj ekde 1959, elpafante serion da venenaj sagoj kontraŭ la Partio kaj socialismo por krei publikan opinion por restarigo de kapitalismo.

La 8-an de majo, la ĵurnalo *Liberiga Armeo* publikigis la artikolon verkitan de Gaŭ Gju "Pafu kontraŭ la Kontraŭpartia kaj Kontraŭsocialisma Nigra Linio" kaj la ĵurnalo *Guangming Ribao* aperigis la artikolon verkitan de He Ming "Akrigi la Vidon kaj Distingi Veron disde Malvero". Ambaŭ artikoloj malkovris la intrigon de falsa kritiko por vera kovro kaj de falsa batalo por vera ŝirmo kontraŭ la kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma agado de Deng Tuo, faritan de *La Fronto* kaj *Pekina Ĵurnalo*. Samtempe tiuj du gazetoj publikigis serion da materialoj sub la titolo "*Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* de Deng Tuo Estas Kontraŭpartiaj kaj Kontraŭsocialismaj Nigraj Paroloj".

La 10-an de majo, la ŝanhajaj ĵurnaloj *Jiefang Ribao* kaj *Wen Hui Bao* publikigis la artikolon verkitan de Jaŭ Venjuan "Pri 'Trifamilia Vilaĝo' " (vidu p.198). Tiu artikolo faras kontraŭ la nigra bando de "Trifamilia Vilaĝo" sistemajn kaj plenampleksajn malkovron kaj kritikon, donante al ĝi mortigan baton. La artikolo montras:

> *La procezo de kritikado al* Deoficigo de Haj Ĵuj *ĝis tiu al "Trifamilia Vilaĝo" estas animoskua klasbatalo kaj granda revolucio en la sferoj de politiko, ideologio kaj kulturo. Fronte al tia malfacila bataltasko, ni nepre devas kuraĝi revolucii.*

La artikolo diras:

> *Ĉiujn, kiuj oponas kontraŭ la penso de Maŭ Zedong, malhelpas la antaŭenmarŝon de la socialisma revolucio kaj kontraŭstaras al la interesoj de la revoluciaj popoloj de Ĉinio kaj la tuta mondo, ni malkaŝu, kritiku kaj piedfaligu, tute egale, ĉu ili estas "majstroj" aŭ "aŭtoritatuloj", ĉu trifamilia vilaĝo aŭ kvarfamilia vilaĝo, kiom famkonataj ili estas, kian altan postenon ili okupas, de kiuj ajn ili estas instigataj kaj subtenataj, kaj de kiom ajn da homoj ili estas distrumpete prilaŭdataj.*

La 11-an de majo, la gazeto *Ruĝa Flago* publikigis la artikolon de Ki Benju "Pri la Burĝa Pozicio de *La Fronto* kaj *Pekina Ĵurnalo*", malkaŝantan ke dum sufiĉe longa tempo, ili kaj *Pekina Vesperĵurnalo* mem estas instrumentoj de Deng Tuo, Vu Han, Liaŭ Moŝa k. a. por fari furiozan atakon kontraŭ la Partio kaj socialismo.

La 14-an de majo, la *Popola Ĵurnalo* (*Renmin Ribao*) publikigis la artikolon de Lin Gie "Senmaskigi la Kontraŭpartian kaj Kontraŭsocialisman Vizaĝon de Deng Tuo", montrantan ke trakuras nigra linio kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma ĉe Deng Tuo k. a., kiuj aktive agadas por restarigi kapitalismon.

Post la malkaŝo de la nigra gastejo "Trifamilia Vilaĝo", la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj la revoluciaj kadroj kaj intelektuloj ĉie amase kunvenas por diskuti kaj verkas artikolojn, kondamnante kun indigno la krimajn agadojn de la areto da kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj elementoj de la "Trifamilia Vilaĝo".

De la komenco de junio ĉijare ĝis nun, oni plue malkaŝis ke la radiko de tiu nigra bando de "Trifamilia Vilaĝo" troviĝas en nenio alia ol la antaŭa Pekina Urba Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.

Ekde la 1-a de junio, en la *Popola Ĵurnalo* aperis sinsekve serio da ĉefartikoloj, nome, "Forbalai Ĉiuspecajn Demonojn kaj Diablojn", "Granda Revolucio Kiu Tuŝas Homan Animon", "Ekpreni la Batalpozicion en la Kampo de Historiaj Studoj Okupitan de la Burĝaro", "Forŝiri la Burĝan Maskon de 'Libereco, Egaleco kaj Frateco' ", "Fariĝi Proletaj Revoluciuloj aŭ Burĝaj Rojalistoj?" k. a., kiuj analizas la nuntempan situacion de la granda kultura revolucio, refutas la absurdajn argumentojn de la reakcia burĝaro rezistantajn la proletan kulturan revolucion, kaj elmetas la batal-taskon por plue profunde disvolvi la grandan kulturan revolucion.

La ĉefartikolo "Forbalai Ĉiuspecajn Demonojn kaj Diablojn" montras ke tiu ĉi granda proleta kultura revolucio celas ĝisfunde malkaŝi la nigran linion kiu kuras tra ĉiuj kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj "Trifamiliaj Vilaĝoj", grandaj kaj malgrandaj, "ĝisfunde frakasi ĉiujn malnovajn

ideologion kaj kulturon, malnovajn morojn kaj kutimojn, kiujn la ekspluataj klasoj kreis por veneni la popolon dum jarmiloj, kaj krei kaj formi inter la vastaj popolamasoj tute novajn ideologion kaj kulturon, novajn morojn kaj kutimojn de la proletaro.

La 1-an de junio, estis disaŭdigita per radio la opiniafiŝo skribita de Nie Juanzi kaj ses aliaj kamaradoj en la Pekina Universitato, kiu malkaŝis la intrigon de anoj de la nigra bando de "Trifamilia Vilaĝo" kiuj superregis la universitaton kaj provis obstine rezisti ĉe sia lasta tranĉeo. La 2-an tagon, la *Popola Ĵurnalo* aperigis la artikolon de komentisto titolitan "Aklami la Opiniafiŝon en la Pekina Universitato", alvokantan proletajn revoluciulojn sin levi por ĝisfunde konduki revolucion kaj frakasi ĉiujn nigrajn bandojn, nigrajn organizojn kaj nigrajn disciplinojn kontraŭpartiajn kaj kontraŭsocialismajn.

Levante la nigran flagon de "libereco, egaleco kaj frateco", anoj de kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj nigraj bandoj kontraŭas la linion de proleta kultura revolucio difinitan de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ. La ĉefartikolo de la *Popola Ĵurnalo* titolita "Forŝiri la Burĝan Maskon de 'Libereco, Egaleco kaj Frateco' " sisteme kritikis la trompan, hipokritan kaj reakcian naturon de tiu burĝa slogano kaj malkaŝis la esencon de tiuj anoj de nigraj bandoj, kiu estas oponi la proletan diktaturon kaj praktiki la burĝan diktaturon.

En la 3-a tago estis publikigitaj du informoj: La Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio decidis reorganizi la Pekinan Urban Komitaton kaj enoficigi novajn sekretariojn de la Urba Komitato; kaj la nova Urba Komitato decidis reorganizi la partikomitaton de la Pekina Universitato. La 4-an tagon, la *Popola Ĵurnalo* publikigis ĉefartikolon titolitan "Nova Venko de la Penso de Maŭ Zedong" montrantan ke en la antaŭa Pekina Urba Komitato troviĝis la radiko de la kontraŭrevolucia kliko de "Trifamilia Vilaĝo", kaj ke ĝi, ĉe kiu trakuras kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma nigra linio, ne estis instrumento de la proletaro por praktiki diktaturon super la burĝaro, sed instrumento de la burĝaro por praktiki diktaturon super la proletaro. La decido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio reorganizi la Pekinan Urban Komitaton estas venko kun historia signifo en la granda proleta kultura revolucio en nia lando kaj nova venko de la granda penso de Maŭ Zedong.

En Pekino kaj aliaj lokoj tra la tuta lando, amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj, plenaj de revolucia pasio, ĝojo kaj inspiro, subtenas fervore la decidon de la Centra Komitato de la Partio pri reorganizo de la Pekina Urba Komitato kaj varme aklamas la novan venkon.

Nun tiu ĉi granda proleta kultura revolucio enprofundiĝas tavolo post tavolo kaj kun nerezistebla forto kaj impeteco de lavango disvolviĝas antaŭen, forte skuante ĉiujn dekadencajn ideologiajn kaj kulturajn batalpoziciojn ĝis nun konservatajn de la burĝaro kaj postrestantaj feŭdaj fortoj kaj forte forbalaante la influojn de la reakcia ideologio kaj dekadenca kulturo de imperiismo.

La granda proleta kultura revolucio estas kondukata rekte sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ. La kvar brilaj verkoj de Prezidanto Maŭ *Pri Nov-demokratio, Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an, Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo* kaj *Parolado en la Tutlanda Konferenco pri Propaganda Laboro de la Komunista Partio de Ĉinio* estas grava konsistiga parto de la granda penso de Maŭ Zedong, prezentas la plej altan pinton de la nuntempaj marksism-leninismaj mondkoncepto kaj teorioj pri literaturo kaj arto kaj formas la plej altan instrukcion de la granda kultura revolucio en nia lando.

La laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj kaj revoluciaj kadroj armitaj per la penso de Maŭ Zedong jam fariĝis ĉefaj fortoj por sturmi kaj frakasi la malnovan burĝan kulturon. En la tutlanda gazetaro aperis amaso da bonaj artikoloj skribitaj de laboristoj, kamparanoj, lernantoj kaj kadroj. En la batalo, la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj plene montris sian talenton kaj saĝon, la juna generacio de marksist-leninistoj estas kreskantaj. La historia epoko, en kiu la burĝaj "instruituloj", "specialistoj" kaj "aŭtoritatuloj" monopolis la kulturon, jam forpasis kaj neniam revenos.

(*daŭrigo sur p. 223*)

Albana Partia kaj Registara Delegacio en Ĉinio

Kamarado Maŭ Zedong intime manpremas kun kamarado Mehmet Shehu.






Kamarado Maŭ Zedong intervidiĝas kun kamaradoj Mehmet Shehu (dekstre), Hysni Kapo (maldekstre).


Kamarado Maŭ Zedong intervidiĝas kun kamarado Mehmet Shehu kaj la de li estrata Partia kaj Registara Delegacio de Albanio. En la fronto de la foto (de dekstre): Hysni Kapo, Mehmet Shehu, Maŭ Zedong, Deng Hiaŭping, Ĝoŭ Enlaj kaj Lin Biaŭ





Kamarado Liu Ŝaŭki varme salutas en la aerodromo kamaradon Mehmet Shehu, membron de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj Prezidanton de la Konsilantaro de Ministroj de Albanio.

Kamarado Mehmet Shehu estas varme aklamata de la pekina popolamaso, kiam li akompanata de kamarado Ĝoŭ Enlaj pasas en aŭto preter Tian-anmen-placo.



(*daŭrigo de p. 219*)

En la batalo por plene frakasi la burĝan kulturon, rapide kreskas la proleta revolucia kulturo. En la lastaj jaroj, la ĉina antikva pekina opero, tiu plej obstina fortikaĵo, estis konkerita, kaj sursceniĝis pekinaj operoj kun revoluciaj, modernaj temoj kiaj *La Ruĝa Signal-lanterno*, *Ŝagiabang*, *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*, *Surprizatako kontraŭ la Blank-Tigra Regimento* k. a. La fremdaj klasikaj artformoj kiaj baledo, simfonio kaj skulptarto ricevis revolucian transformon, kaj aperis la baledo *Ruĝa Virina Taĉmento*, simfonio *Ŝagiabang*, argil-skulptaĵo *Farmpaga Kolektejo* k. c. Ĉiuj ĉi tiuj bonaj verkoj jam ricevis sankcion de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj grandegan aplaŭdon de la spektantoj en- kaj fremd-landaj. Kun la profundiĝo kaj disvolviĝo de la granda proleta kultura revolucio, certe aperos nova fizionomio en ĉiuj branĉoj de kultura kampo en nia lando, certe aperos pli kaj pli multaj verkoj kun alta kvalito en ideologia enhavo kaj arta formo kaj pli kaj pli multaj disertaĵoj alte sciencaj kaj revoluciaj.

Esence, la granda proleta kultura revolucio celas defendi la diktaturon de la proletaro. Imperiismo kaj moderna reviziismo, krom uzi la rimedon de armitaj fortoj, uzas ankaŭ la rimedon de kultura enfiltriĝo kaj ideologia venenado por renversi la diktaturon de la proletaro. Ĉiu ajn kontraŭrevolucia restarigo senescepte komenciĝas per laborado pri ideologio kaj kreo de publika opinio. Tiel okazis la uzurpo de la gvidanteco de la Partio kaj ŝtato en Sovetunio fare de la Ĥruŝĉov-reviziisma kliko, kiel okazis la kontraŭrevolucia ribelo en Hungario en la jaro 1956. La granda venko akirita de nia granda kultura revolucio estas, samtempe, granda venko en la lukto por dehaki la malicajn ungegojn de imperiismo, elfosi la radikon de reviziismo kaj preventi la restarigon de kapitalismo.

Al la grandaj venkoj de la granda kultura revolucio en nia lando, la revoluciaj popoloj de la tuta mondo montras sian profundan kaj atenteman zorgon kaj varme aklamas. Sed manpleno da imperiistoj, modernaj reviziistoj kaj diverslandaj reakciuloj estas teruritaj kaj konsternitaj kaj babilaĉas pri ĝi per sensencaĵoj.

Iuj reakciaj uloj malice opinias ke la proleta regado en Ĉinio estas iel ne en ordo, kaj ke ili ŝajne povus ion profiti el tio. Sed, la iluzioj de tiuj sinjoraj moŝtoj tre rapide frakasiĝis antaŭ la fakto. Per forbalaado de ĉiuj demonoj kaj diabloj ni ĝuste elfosas la socian bazon de imperiismo kaj moderna reviziismo troviĝantan interne de nia lando. Pli firma ol antaŭe ja estas la regado de la proletaro.

Iuj reakciaj uloj kalumnias nin pri "detruo de kulturo". Ni ne nur devas detrui sed eĉ neniigi la dekadencan kulturon de imperiismo kaj moderna reviziismo. Nur per detruo kaj neniigo de tiaj fiaĵoj, oni povas vere alsorbi la bonan kulturon kreitan en la homa historio, kaj la nova kulturo de la proletaro povas tiam sin disvolvi en plena prospero.

Iuj reakciaj uloj kalumnias ankaŭ ke nia batalo "sin direktas al ĉiuj intelektuloj". Tio ĉi estas absurda babilaĉo. La lancpinto de la batalo de nia granda proleta kultura revolucio direktiĝas nur kontraŭ manpleno da fiuloj kiuj oponas komunismon sub la ŝildo de komunismo kaj manpleno da kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj kaj kontraŭrevoluciaj intelektuloj de la burĝa klaso. Al la vasta amaso de intelektuloj el la malnova socio, la Komunista Partio praktikas la politikon unuiĝi kun ili, eduki kaj remuldi ilin. En la granda kultura revolucio, la vicoj de proleta intelektularo ĉiam pli kreskas.

Estas bonega situacio en Ĉinio. Nia nacia ekonomio prosperas en ĉiuj sferoj, kaj la alta tajdo de nia ekonomia konstruado daŭre kaj sane disvolviĝas. Pere de la granda kultura revolucio, la penso de Maŭ Zedong pliprofundiĝis en la koro de la popolo, kaj la revolucia spirito de la popolamasoj disvolviĝas en alta grado, la gvidanteco de la Partio kaj la diktaturo de la proletaro estas plue firmigitaj kaj plifortigitaj. Tiu ĉi granda kultura revolucio garantios la venkan antaŭenmarŝon de la ĉina popolo laŭ la vojo de socialismo kaj komunismo.

La senprecedence granda revolucia ŝanĝiĝo, okazanta sur la ĉina tero enloĝata de kvarono de la monda loĝantaro, certe estigos en monda skalo netakseblan, profundan influon en la homa historio. (Hinhua Novaĵagentejo, 11 junio)

KOMUNA DE ĈINIO KAJ

LAŬ la invito de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko, la Albana Partia kaj Registara Delegacio estrata de kamarado Mehmet Shehu, Membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj Prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj de la Popola Respubliko de Albanio, faris amikan viziton al la Ĉina Popola Respubliko de la 26-a de aprilo ĝis la 11-a de majo, 1966.

Dum sia restado en Ĉinio, la Albana Partia kaj Registara Delegacio vojaĝis al Pekino, Ŝanhajo, Harbino, Kunming kaj Hangĝoŭ, vizitis industriajn entreprenojn, popolajn komunumojn kaj kulturajn instituciojn, renkontis popolanojn el diversaj rondoj de Ĉinio, informiĝis pri la grandaj atingoj kaj alta batalspirito de la ĉina popolo en socialisma konstruado kaj ĉie ricevis varman bonvenon kaj plej koran kaj fratan akcepton de la ĉina popolo. Tio estis viva esprimo de la granda amikeco kaj batalanta solidareco inter la du Partioj, la du landoj kaj la du popoloj de Ĉinio kaj Albanio.

Kamarado Maŭ Zedong, Prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, renkontis ĉiujn kamaradojn de la Albana Partia kaj Registara Delegacio kaj havis plej koran, amikan konversacion kun ili.

Dum la vizito, interparoloj okazis inter la Ĉina Partia kaj Registara Delegacio estrata de kamarado Liu Ŝaŭki, Vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko kaj kamarado Ĝoŭ Enlaj, Vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, kaj la Albana Partia kaj Registara Delegacio estrata de kamarado Mehmet Shehu pri gravaj problemoj koncernantaj la nuntempan internacian situacion kaj la internacian komunisman movadon, pri la sperto de la du landoj en socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj pri la problemo de plua solidigo kaj disvolvo de la unuiĝo, la amikeco kaj la rilatoj de reciproka helpo kaj kunlaborado inter la du Partioj kaj la du landoj. La interparoloj iris en atmosfero de la plej granda sincereco kaj amikeco. Ambaŭ flankoj estas komplete akordaj pri siaj star- kaj vid-punktoj rilate la problemojn kiuj estis diskutitaj.

En la interparoloj partoprenis:

Ĉe la ĉina flanko:

Kamarado Ĝu De, Vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj de la Ĉina Popola Respubliko,

Kamarado Deng Hiaŭping, Ĝenerala Sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko,

Kamarado Ĉen Ji, Membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro kaj Ministro de Eksterlandaj Aferoj de la Ĉina Popola Respubliko,

Kamaradoj Li Fuĉun kaj Tan Ĝenlin, Membroj de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Vicĉefministroj de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko,

KLARO DE ALBANIO

Kamarado Kang Ŝeng, Alterna Membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj de la Ĉina Popola Respubliko,

Kamarado Bo Jibo, Alterna Membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko,

Kamaradoj Je Gianjing kaj Vu Hiukjuan, Membroj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio,

Kamarado Vang Bingnan, Vicministro de Eksterlandaj Aferoj de la Ĉina Popola Respubliko,

Kamarado Hju Gianguo, Ambasadoro Eksterordinara kaj Plenrajta de la Ĉina Popola Respubliko al la Popola Respubliko de Albanio, kaj aliaj kamaradoj;

Ĉe la albana flanko:

Kamarado Hysni Kapo, Membro de la Politika Buroo kaj Sekretario de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro,

Kamarado Abdyl Kellezi, Membro de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj Prezidanto de la Albania-Ĉinia Amikeca Asocio,

Kamarado Nesti Nase, Alterna Membro de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj Ministro de Eksterlandaj Aferoj de la Popola Respubliko de Albanio,

Kamarado Vasil Nathanaili, Ambasadoro Eksterordinara kaj Plenrajta de la Popola Respubliko de Albanio al la Ĉina Popola Respubliko, kaj aliaj kamaradoj.

En la interparoloj, ambaŭ flankoj montras kun granda kontento, ke la revolucia amikeco inter Ĉinio kaj Albanio, forĝita de la Komunista Partio de Ĉinio estrata de kamarado Maŭ Zedong kaj la Albana Partio de Laboro estrata de kamarado Enver Hoxha, havis grandegan kaj ĉiuflankan disvolviĝon en la lastaj jaroj. En la komuna batalo kontraŭ imperiismo estrata de Usono, kontraŭ la reakciuloj de diversaj landoj kaj kontraŭ moderna reviziismo kies centro estas la gvidanta kliko de KPSU kaj en la komuna batalo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la du landoj, la du Partioj, la du landoj kaj la du popoloj de Ĉinio kaj Albanio konstante fortigis sian amikecon, solidarecon kaj sinceran reciprokan helpon kaj kunlaboron. La granda amikeco kaj batalanta unuiĝo inter la du Partioj, la du landoj kaj la du popoloj de Ĉinio kaj Albanio estas bazitaj tute sur marksism-leninismo kaj proleta internaciismo; ili eltenis ĉiujn provojn kaj estas nerompeblaj. La konstanta firmigo kaj kresko de la amikeco kaj unuiĝo inter Ĉinio kaj Albanio konformas al la fundamentaj interesoj de la du popoloj kaj al la interesoj de la internacia komunisma movado kaj la popolo de la tuta mondo. Ambaŭ flankoj decidis klopodi por la plua fortigo de la amikeco kaj unuiĝo inter la du Partioj, la du landoj kaj la du popoloj de Ĉinio kaj Albanio kaj subteni, helpi, kuraĝigi kaj lerni unu la alian kaj marŝi antaŭen ŝultro ĉe ŝultro en la lukto por la komuna afero.

La ĉina flanko varme aklamas la brilajn venkojn kaj grandegajn atingojn akiritajn de la heroa albana popolo, kun pioĉo en unu mano kaj pafilo en la alia, en socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj en la lukto kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo. Ĝi alte taksas la revoluciigajn rimedojn lastatempe alprenitajn de la Albana Partio de Laboro kaj la Registaro de la Popola Respubliko de Albanio sur la politika, ekonomia, milita, kultura kaj aliaj frontoj. Tiuj rimedoj pruvas la marksism-leninisman longvidon de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro estrata de

kamarado Enver Hoxha, la revolucian spiriton de la albana popolo en konstruado de socialismo per sinapogo sur la propraj fortoj kaj strebado al prosperiĝo kaj potenciĝo kaj ilian neŝanceleblan decidemon konduki la socialisman revolucion ĝis la fino. Ili estas novaj brilaj ekzemploj de la kreiva kombino de la universala vero de marksism-leninismo kun la konkreta praktiko de Albanio fare de la Albana Partio de Laboro.

La ĉina flanko opinias ke tiuj rimedoj havas grandan teorian kaj praktikan signifon, kaj ke ili ne nur forte antaŭen puŝos socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon de Albanio, sed ankaŭ riĉigos la sperton de la proleta diktaturo kaj tiel estigos profundan kaj malproksimatingan internacian influon.

La ĉina flanko opinias, ke la Albana Partio de Laboro, la Registaro de la Popola Respubliko de Albanio kaj la albana popolo, alte tenante la revolucian standardon de marksism-leninismo kaj proleta internaciismo, ĉiam firme oponas imperiismon estratan de Usono kaj ĝiajn lakeojn, konstante staras en la plejfronto de la lukto kontraŭ moderna reviziismo kies centro estas la gvidanta kliko de KPSU kaj faras elstarajn kontribuojn en defendo de la pureco de marksism-leninismo, en subteno kaj helpo al la revoluciaj luktoj de ĉiuj popoloj kaj en defendo de mondpaco.

La ĉina flanko opinias, ke en la lukto kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo, la Albana Partio de Laboro, la Popola Respubliko de Albanio kaj la albana popolo starigis por ĉiuj marksist-leninistoj kaj revoluciaj popoloj de la mondo brilan ekzemplon de sentima rezisto kontraŭ la minacoj kaj malamikaj aktivadoj de la imperiistoj, la reviziistoj kaj ĉiuj reakciaj fortoj, brave venkante ĉiuspecajn malfacilojn kaj persistante en revolucia linio. Venkoj kaj atingoj de Albanio en ĉiuj kampoj de vivo estas rezulto de la ĝusta gvidado de la Albana Partio de Laboro estrata de kamarado Enver Hoxha, la amata gvidanto de la albana popolo.

La ĉina flanko opinias ke la Albana Partio de Laboro, alte tenante la revolucian standardon de marksism-leninismo en Eŭropo, kie imperiismo kaj moderna reviziismo baraktas en sia morta lito, iluminas la vojon sur kiu antaŭen marŝas la revolucia popolo. La eŭropa proletaro kaj la revolucia popolo de la tuta mondo por ĉiam memoros historiajn kontribuojn de la socialisma Albanio.

En la interparoloj, la ĉina flanko esprimis sian sinceran dankon al la Albana Partio de Laboro, la Registaro de la Popola Respubliko de Albanio kaj la albana popolo pro ilia grava subteno al Ĉinio en ĝia socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj en ĝia lukto kontraŭ imperiismo, diverslandaj reakciuloj kaj moderna reviziismo.

Kia ajn ŝtormo leviĝos en la mondo, la Komunista Partio de Ĉinio, la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la ĉina popolo firme staros en la flanko de la Albana Partio de Laboro, la Registaro de la Popola Respubliko de Albanio kaj la albana popolo kiuj persistas ĉe la linio de batalo kontraŭ imperiismo estrata de Usono, kontraŭ moderna reviziismo kies centro estas la gvidanta kliko de KPSU kaj kontraŭ diverslandaj reakciuloj, kaj donos al ili ĉiujn eblajn subtenojn kaj helpojn.

La albana flanko multe ĝojas pri la brilaj venkoj atingitaj de la ĉina popolo en ĝia socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. La venko de la granda ĉina revolucio skuis mondan imperiismon kaj koloniismon ĝis ilia fundamento kaj estigis fundamentan ŝanĝon en la ekvilibro de mondaj fortoj favore al socialismo.


Sub la saĝa gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, la brava kaj laborema ĉina popolo, alte tenante la ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj persistante ĉe la ĝusta linio de marksism-leninismo, fidele sekvas la revolucian vojon de sinapogo sur la propraj fortoj, daŭre disvolvas socialisman agrokulturon kiel la fundamenton de la nacia ekonomio kaj socialisman industrion kiel ties gvidantan faktoron, firme kaj senŝanceliĝe batalas kontraŭ la burĝaj starkaj vid-punktoj kaj ideoj en la ideologia kampo, disvolvas la tri grandajn revoluciajn movadojn de klasbatalo, la batalo por produkto kaj scienca eksperimento, kaj atingis brilajn sukcesojn.

La Albana Partio de Laboro, la Registaro de la Popola Respubliko de Albanio kaj la tuta albana popolo varme gratulas la fratan ĉinan popolon, ĝian Partion kaj ĝian Registaron pri la plena sukceso

La Vojo de Hiadinggia-anoj

La montregiono en konstruado





Hiadinggia-brigado troviĝanta en montregiono de la gubernio Huanghian, Ŝandong-provinco, estas unu el produktaj brigadoj sub Daljugia-komunumo. Antaŭe, tie troviĝis ok kalvaj montoj de varia grandeco, inkluzive Fenghuang-monton, kaj dekkelkaj profundaj interplektitaj ravinoj. La tero estis sterila kaj sub ĝia supra tavoleto plejparte estis plena de ŝtonetoj. Dum pluva sezono, la akvo torentis de sur la montoj kaj distrancis la teron en pecojn en spaco kun perimetro de dekkvin kilometroj. Pro la malfavoraj naturaj kondiĉoj la agrokultura produkto tie estis tre malgranda kaj la vivo de la popolo tre mizera.

Tamen la popolo de Hiadinggia apogis sin sur la propraj fortoj de la kolektivo kaj penegis malfacile por komenci sian entreprenon. Ĝi luktis kontraŭ la montoj sterilaj kaj

Draŝejo en orflavo



akvo malica. Dum sep jaroj ĝi hakis la montojn kaj reformis la teron, tiel ke sur multaj montoj arboj estas plantitaj kaj fruktoĝardenoj starigitaj kaj ke en ravinoj estas konstruitaj akvokonservejoj, kaj formiĝis irigacia sistemo de "tri niveloj" el rivero kaj kanaloj ĉirkaŭ montotalio kaj sur montoŝultro. Irigaciebla agro atingis 60% de la tuta kulturata tero. Kaj grandparto de la agroj jam transformiĝis en stabilajn altproduktajn kampojn irigacieblajn kaj dreneblajn. Ŝanĝiĝis fine ĝia tuta fizionomio. Tiu ĉi produkta brigado jam fariĝis unu el la progresintaj altproduktaj agrokulturaj unuoj de "Daĝaj-tipo" en la lando. Nun ĝi luktas por realigi ankoraŭ pli grandiozan projekton por pli malproksima estonteco.



Akvokonservejo en Ljugoŭ (*maldekstre*)

En sezono kiam fruktoj maturiĝas (*malsupre*)





de ĉina tria nuklea eksplodo, kiu estas viva atesto de la alta nivelo de scienco kaj teknologio kaj la kreiva povo de la granda ĉina popolo, estas plej grava pozitiva faktoro subtenanta ĉiujn popolojn en opono al la nuklea monopolo, nuklea minaco kaj komuna komploto de la usonaj imperiistoj kaj la Ĥruŝĉov-reviziistoj, kaj estas potenca faktoro favora al internacia paco kaj sekureco.

La albana flanko opinias ke la neskuebla marksism-leninisma politiko sekvata de la Ĉina Popola Respubliko en opono al imperiismo, antaŭ ĉio al usona imperiismo, kaj en pinto-al-pinta batalo kontraŭ ĝi, akordas maksimume kun la fundamentaj interesoj de la popoloj de la socialisma tendaro kaj kun tiuj de la kontraŭimperiisma kaj kontraŭkoloniisma batalo de ĉiuj popoloj luktantaj por libero, nacia sendependiĝo, demokratio, socialismo kaj mondpaco. La albana popolo tute subtenas la longvidan, marksism-leninisman kaj pacaman eksteran politikon de la Ĉina Popola Respubliko.

La albana flanko ripetas ke per sia konstanta luktado en defendo de la pureco de marksism-leninismo kaj kontraŭ moderna reviziismo, kaj antaŭ ĉio kontraŭ la sovetia reviziisma gvidanta kliko, la Komunista Partio de Ĉinio faris kaj faras la plej valorajn kontribuojn por la internacia komunisma movado kaj la laborista movado. Hodiaŭ, la Komunista Partio de Ĉinio estas la ĉefa forto en la batalo kontraŭ la moderna reviziismo kiu estas agento de imperiismo interne de la komunisma movado; ĝi estas forta subtenanto de la revolucia batalo de ĉiuj komunistoj de la mondo por la venko de socialismo kaj komunismo. La Albana Partio de Laboro tute subtenas la marksism-leninisman pozicion prenitan de la Komunista Partio de Ĉinio estrata de kamarado Maŭ Zedong kaj decidis, kune kun la Komunista Partio de Ĉinio kaj la aliaj marksism-leninismaj partioj, konduki ĝis la fino la batalon kontraŭ moderna reviziismo kun la Ĥruŝĉov-reviziistoj kiel ĝia centro.

La albana flanko montras ke la ĝusta marksism-leninisma linio de la glora Komunista Partio de Ĉinio kaj la granda teorio kaj penso de kamarado Maŭ Zedong estas la fonto de ĉiuj grandaj venkoj kaj atingoj de la Ĉina Popola Respubliko en socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj en la batalo por oponi kontraŭ imperiismo, reakcio kaj moderna reviziismo kaj subteni kaj helpi ĉiujn subprematajn popolojn kaj naciojn. La teorio kaj penso de kamarado Maŭ Zedong estas la kreiva kombino de la universala vero de marksism-leninismo kun la praktiko de la ĉina revolucio kaj ĉina socialisma konstruado, kaj estas la plua disvolviĝo de la teorio de marksism-leninismo en la nuna epoko.

La albana flanko esprimas koran dankon al la granda ĉina popolo, la glora Komunista Partio de Ĉinio kaj la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko pro la frata internaciisma helpo kiun ili donis kaj donas al la Popola Respubliko de Albanio.

Ambaŭ flankoj interŝanĝis la sperton de la du landoj en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Ambaŭ flankoj montras, ke marksist-leninistoj de la tuta mondo devas ĉerpi gravan instruon el la uzurpado de la gvidanteco de la partio kaj ŝtato fare de la Ĥruŝĉov-reviziisma kliko en Sovetunio, kiu estas la hejmloko de la Granda Oktobra Revolucio kaj havas kelkdekjaran historion de socialisma konstruado, tiel ke Sovetunio suriras la vojon de restarigo de kapitalismo.

Ambaŭ flankoj opinias, ke dum la tuta historia periodo de socialisma socio, en socialismaj landoj ekzistas klasbatalo, ekzistas la batalo inter la vojo de socialismo kaj la vojo de kapitalismo kaj ekzistas la danĝero de naskiĝo de reviziismo kaj restariĝo de kapitalismo. Por preventi uzurpadon de la gvidanteco de partio kaj ŝtato kaj restarigon de kapitalismo fare de reviziistoj, por firmigi kaj disvolvi socialismon, kaj por garantii la estontan transiron al komunismo, oni devas persisti ĉe la revolucia linio de marksism-leninismo kaj la proleta diktaturo, konduki la socialisman revolucion ĝis la fino sur la frontoj de ekonomio, politiko, milito, ideologio kaj kulturo, kaj kulturi kaj eduki daŭrigantojn de la proleta revolucia afero, fidelajn al marksism-leninismo.

Ambaŭ flankoj opinias, ke en socialisma socio ekzistas du specoj de sociaj kontraŭdiroj de malsama naturo, t. e. kontraŭdiroj interne de popolo kaj tiuj inter la malamiko kaj ni. Ĝustaj konado

kaj traktado pri tiuj du specoj de sociaj kontraŭdiroj havas gravan signifon por firmigi la proletan diktaturon kaj disvolvi la socialisman socion.

Ambaŭ flankoj opinias, ke por defendi kaj disvolvi la socialisman aferon socialismaj landoj devas senĉese gardi kaj plifortigi la proletan diktaturon gvidatan de la laborista klaso kaj bazitan sur la alianco inter la laboristoj kaj kamparanoj. Ili devas praktiki diktaturon super la renversitaj ekspluataj klasoj, reakciuloj kaj diversaj aliaj malamikoj, kiuj rezistas kontraŭ socialisma revolucio kaj subfosas socialisman konstruadon, kaj samtempe praktiki popolan demokration inter la laboristoj, kamparanoj, revoluciaj intelektuloj kaj aliaj laborantaj popolanoj, laŭ la principo de la demokratia centralizismo. Ili devas meti grandan atenton sur la konstantan firmigon kaj plifortigon de nacia defendo, organizadon kaj trejnadon de la vastaj popolamasoj milite, kaj efektivigon de la sistemo "fari ĉiun popolanon soldato" en la tempo de plifortigo de la moderniga konstruado de regula armeo, por esti ĉiam preta frakasi iun ajn eblan armitan agreson de imperiismo kaj ĝiaj lakeoj.

Ambaŭ flankoj opinias, ke por venke konstrui socialismon en niaj du landoj estas necese disvolvi senĉese la produktajn fortojn, meti speciale grandan atenton sur la disvolvon de agrikulturo kaj ankaŭ disvolvi industrion. Ambaŭ flankoj montras, ke en socialisma konstruado niaj du socialismaj landoj praktikas la politikon de sinapogo sur la propraj fortoj. En la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado ni persistas ĉe la amasa linio, efike nin apogas sur la popolamasoj kaj disvolvas revoluciajn amasmovadojn.

Historia sperto montras, ke konduki en la Partio kaj inter la popolamasoj edukadon pri marksismleninismo, dialektika materiismo kaj historia materiismo, edukadon pri klasbatalo, revolucia tradicio kaj komunismo, reliefigi la proletan politikon kaj akceli la revoluciigon de la homa penso estas necesaj kaj bazaj kondiĉoj por antaŭenmarŝi laŭ la socialisma vojo. Tuj kiam la homa politika konscio estas levita kaj la teorio de marksism-leninismo estas ekposedita de la popolamaso, ĝi fariĝos potenca materia forto por transformi la socion kaj mondon.

Ambaŭ flankoj opinias, ke estas necese, tra senĉesa revolucio sur la kultura fronto, ĝisfunde elimini la burĝajn star- kaj vid-punktojn en ĉiuj kampoj de kulturo, plifortigi la vicojn de intelektuloj de la laborista klaso servantaj la socialismon kaj disvolvi novan socialisman kulturon en servo al la laborantaj amasoj.

Konstruado de socialismo celas la transiron al komunismo. Tial, en la socialisma etapo, krom maksimume disvolvi la socialismajn produktajn fortojn kaj senĉese altigi la komunismajn konscion kaj moralon de homoj, ambaŭ Partioj opinias ankaŭ necese alpreni revoluciigajn rimedojn, laŭ la teorio de marksism-leninismo kaj konforme al la konkretaj historiaj kondiĉoj kaj karakterizaĵoj de la propra lando, por ĝuste disvolvi la socialismajn produktajn rilatojn, iom post iom redukti la diferencojn inter laboristoj kaj kamparanoj, inter urboj kaj vilaĝoj kaj inter la korpa laboro kaj mensa laboro, kaj tiel krei kondiĉojn por transiri paŝon post paŝo al komunismo.

Ambaŭ flankoj montras, ke la komunista partio kiel la avangardo de la proletaro devas nepre ekzisti kune kun la proleta diktaturo. Ambaŭ partioj sekvas la principon, ke en ĉiuj laboroj de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado estas necese nepre plifortigi la partian gvidadon, praktiki demokration en la Partio, apliki kritikon kaj memkritikon, intimigi la ligiĝon de la partio kun la vastaj popolamasoj kaj persiste kombini la universalan veron de marksism-leninismo kun la konkreta praktiko de la propra lando.

Ambaŭ flankoj montras, ke en la socialismaj landoj ankoraŭ ne estas kreita kompleta sistemigita sperto por preventi la naskiĝon de reviziismo kaj restariĝon de kapitalismo kaj certigi paŝopostpaŝan transiron al komunismo. La historia tasko de kreo de tiu sperto estas ŝarĝita sur la ŝultrojn de la nuntempaj veraj marksist-leninistoj. En tiu ĉi rilato, la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Albana Partio de Laboro jam aplikis gravajn revoluciigajn rimedojn laŭ la konkretaj kondiĉoj de sia propra lando kaj decidis kontinue fari siajn kontribuojn.

Ambaŭ flankoj montras, ke en la rilato de eksterlanda politiko la Ĉina Popola Respubliko kaj Popola Respubliko de Albanio persistas ĉe proleta internaciismo, decideme oponas kontraŭ imperiismo kaj reakciuloj de ĉiuj landoj, firme subtenas la revoluciajn batalojn de la subprematajn popoloj kaj nacioj de la tuta mondo, kaj decideme kontraŭas grandregnan ŝovinismon kaj nacian egoismon. Ambaŭ flankoj opinias, ke la rilatoj inter socialismaj landoj devas esti bazitaj sur la principoj de sendependeco, kompleta egaleco kaj proletaj internaciismaj intersubteno kaj interhelpo.

Ambaŭ flankoj unuanime montras, ke nuntempe la revoluciaj popoloj de la tuta mondo entreprenas grandan intensan luktadon kontraŭ usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Pli kaj pli akriĝas diversspecaj kontraŭdiroj de la mondo. La tuta mondo sin trovas nun en la procezo de granda skuiĝo, granda dividiĝo kaj granda reorganiziĝo. Tio estas neevitebla rezulto de la profundiĝo de la popolaj revoluciaj bataloj.

Ambaŭ flankoj montras, ke la nacia liberiga movado de diverslandaj popoloj, la internacia komunisma movado kaj la batalo de la proletaro en la kapitalismaj landoj kaŭzas sinsekvajn malsukcesojn al imperiismo. La tendenco de disvolviĝo de la internacia situacio favoras al socialismo kaj revoluciaj bataloj de diverslandaj popoloj, sed malfavoras al imperiismo, reviziismo kaj la reakciuloj de ĉiuj landoj. La socialismaj landoj, kiuj persistas pri la revolucia linio de marksism-leninismo, tagon post tago potenciĝas. Daŭre leviĝas la nacia-demokratia movado en Azio, Afriko kaj Latinameriko. Vaste disvolviĝas la batalo de la laborista klaso kaj aliaj laborantaj popolanoj de la kapitalismaj landoj en Okcidenta Eŭropo, Norda Ameriko kaj Oceanio kontraŭ usona imperiismo kaj la monopola kapitalo en siaj propraj landoj. Ondiĝas unu post alia la luktoj de la usona popolo kontraŭ la agresado al Vjetnamio fare de Johnson-registaro kaj la luktoj de la usonaj negroj kontraŭ rasdiferencigo. La indigna kontraŭ-usona tajdo de la tutmonda popolo leviĝas ĉiam pli alte. La revoluciaj fortoj de la popolo de la tuta mondo ĉiam pli fortiĝas. Senĉese grandiĝas la vicoj de marksist-leninistoj, dum la kliko de moderna reviziismo senĉese malfortiĝas. La kontraŭdiroj inter imperiismaj landoj jam atingis la intensecon senprecedencan post la Dua Mondmilito. Usona imperiismo neniam sin trovis en tia izola kaj malfacila stato kiel nun. Ĉiuj signoj antaŭvidigas, ke baldaŭ venos nova granda revolucia ŝtormo kontraŭ usona imperiismo. Usona imperiismo kaj la diverslandaj reakciuloj freneze reatakas la popolojn de diversaj landoj kaj levas kontraŭrevolucian kontraŭfluon. Sed, tio estas nur provizora fenomeno, kaj neniel montras ilian potencon, male nur ilian malfortecon. Iliaj antaŭmortaj baraktadoj absolute ne povas ŝanĝi la direkton de historia disvolviĝo sed nur stimulos la revolucian luktadon de la monda popolo al pli impeta disvolviĝo.

Ambaŭ flankoj montras, ke la batalo de la vjetnama popolo por savi sian patrion kontraŭ usona imperiismo estas la fokuso de la lukto de la monda popolo kontraŭ usona imperiismo en la nuna tempo. Tie la strategio de popola milito venkas la tuttergloban strategion de imperiismo. La venkoj de la vjetnama popolo frakasis la miton de la nevenkebleco de usona imperiismo kaj refoje pruvas, ke usona imperiismo estas papera tigro kun aspekto potenca sed interno malforta. La luktado de la vjetnama popolo kontraŭ usona agresado efike retenas kaj malfortigas la agresajn fortojn de usona imperiismo kaj multe subtenas kaj helpas la revoluciajn luktojn de diverslandaj popoloj en la mondo.

Ambaŭ flankoj montras, ke usona imperiismo nun plenenergie uzas kontraŭrevolucian duoblan taktikon por savi sin el sia ĝisfunda malvenko en Vjetnamio. Unuflanke ĝi akcelas la militan eskaladon intencante ĝin etendi rekte al la Demokratia Respubliko de Vjetnamio kaj al la tuta Hindoĉinio kaj Ĉinio; aliflanke, ĝi plenenergie kolportas sian trompan "pacan intertraktadon", vane intencante akiri kion ĝi ne povas gajni en la batalkampo.

Ambaŭ flankoj alvokas al la tutmonda popolo ke ĝi devas nepre teni altan singardemon kontraŭ la intrigo de disetendo de la agresa milito kontraŭ Vjetnamio fare de usona imperiismo kaj senĉese malkaŝi decideme la intrigon de "paca intertraktado" de la registaro de usona imperiismo, subtenatan de Ĥruŝĉov-reviziistoj. Ambaŭ flankoj refoje deklaras sian firman subtenon al kvarpunkta pozi-

cio de la Registaro de la Demokrauia Respubliko de Vjetnamio kaj la kvinpunktan deklaron de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio. Usono devas nepre ĉesigi sian agresadon al la tuta Vjetnamio. Usono devas nepre retiri ĉiujn siajn armitajn fortojn el suda Vjetnamio. Usono devas nepre rekoni, ke la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio estas la sola vera reprezentanto de la popolo de suda Vjetnamio. Ambaŭ flankoj plenforte subtenas kaj helpas ĝis la fina venko la justan kaj heroan lukton de la vjetnama popolo por venki usonan imperiismon, liberigi la sudon, defendi la nordon kaj tiel unuigi sian patrion. Ambaŭ flankoj montras, ke la sinteno al la luktado de la vjetnama popolo estas akvodivida montkresto inter la kontraŭimperiismaj batalantoj kaj la komplicoj de imperiismo, inter la subtenantoj de la liberiga luktado de diverslandaj popoloj kaj ĝiaj subfosantoj, kaj inter la batalantoj por revolucio kaj la socialisma afero kaj la perfiduloj de revolucio kaj socialismo. Estas necese ĝisfunde malkaŝi la sintenon de Ĥruŝĉov-reviziistoj, kiuj buŝe ŝajnigas sin amikoj kaj subtenantoj de la vjetnama popolo, sed konspiras en siaj agadoj kun la usonaj imperiismaj agresantoj, la murdantoj de la vjetnama popolo.

Ambaŭ flankoj forte kondamnas usonan imperiismon pro ĝia senĉesa disvastigo de siaj atakoj kontraŭ la liberigitaj regionoj de Laoso kaj firme subtenas la patriotan kaj justan batalon kontraŭ usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kondukatan de la Neo Lao Haksat de Laoso kaj la laosa popolo.

Ambaŭ flankoj forte kondamnas usonan imperiismon kiu instigas la reakciulojn de Tajlando kaj la pupojn de suda Vjetnamio al agresaj kaj provokaj agadoj kontraŭ Reĝolando de Kamboĝo, kaj firme subtenas la kamboĝan popolon en ĝia justa batalo kontraŭ agreso por defendo de sia teritorio kaj suvereneco kaj subtenas la pacan kaj neŭtralan politikon praktikatan de Kamboĝo.

Ambaŭ flankoj firme subtenas la korean popolon en ĝia justa batalo kontraŭ la perforta okupado de suda Koreio fare de usona imperiismo por postuli la retiriĝon de usona armeo kaj por la reunuiĝo de ĝia patrolando, kaj firme subtenas la justan starpunkton de la korea popolo kontraŭ la "Traktato inter Japanio kaj Suda Koreio".

Ambaŭ flankoj firme subtenas la bravan batalon de la japana popolo kontraŭ la Japan-Usona Sekura Traktato kaj la "Traktato inter Japanio kaj Suda Koreio", por postuli la forigon de la usonaj militbazoj kaj kontraŭ la postenado de usonaj nukleaj submaraj ŝipoj en Japanio, kaj firme subtenas la justan batalon de la japana popolo kontraŭ la komploto de la japana monopola kapitalo kun usona imperiismo en revivigo de la japana militarismo.

Ambaŭ flankoj forte kondamnas la faŝistajn kruelaĵojn de la kliko de indoneziaj dekstraj generaloj, kiu uzurpis la regpotencon de Indonezio kaj sange masakras indoneziajn komunistojn kaj progresemulojn, kaj forte kondamnas la barbarajn agadojn de la indoneziaj dekstraj fortoj en ilia freneza oponado kontraŭ Ĉinio kaj persekutado al ĉinaj elmigrintoj. Ambaŭ flankoj esprimas profundan zorgon pri kaj firman subtenon al la indoneziaj komunistoj, revolucia popolo kaj progresemuloj, kiuj persistas en batalo sub blanka teroro. Ambaŭ flankoj firme kredas, ke la indonezia popolo havanta gloran revolucian tradicion certe akiros finan venkon sub la ĝusta gvidado de la Indonezia Komunista Partio.

Ambaŭ flankoj firme subtenas la justan batalon de la pakistana popolo en ĝia defendo de sia nacia sendependeco kaj ŝtata suvereneco. Ambaŭ flankoj opinias, ke la kaŝmira problemo devas esti solvita laŭ la deziro de la kaŝmira popolo. Ambaŭ flankoj refoje deklaras sian subtenon al la batalo de la kaŝmira popolo por sia rajto de memdecido.

Ambaŭ flankoj unuanime subtenas la batalon de la popoloj de arabaj landoj kontraŭ imperiisma agreso kaj subpremado por akiri kaj defendi sian nacian sendependecon kaj subtenas la araban popolon de Palestino en reakiro de siaj legitimaj rajtoj.

Ambaŭ flankoj firme subtenas la batalon de la popoloj de Kongolando (Leopoldville), "Portugala" Gvineo, Mozambiko, Angolo kaj Suda Rodezio.

Ambaŭ flankoj firme subtenas la justan batalon de la popoloj de Gvineo, Malio, Tanzanio kaj Kongolando (Brazzaville) kontraŭ imperiisma renversa intrigo kaj por defendo de sia ŝtata suvereneco kaj sendependeco.

Ambaŭ flankoj firme subtenas la armitan batalon de la popoloj de Dominiko, Peruo, Kolombio, Gvatemalo kaj Venezuelo por sia nacia liberigo.

Ambaŭ flankoj unuanime subtenas la justan batalon de aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj kontraŭ imperiismo, malnova koloniismo kaj nova koloniismo por akiri kaj defendi sian nacian sendependecon.

Ambaŭ flankoj unuanime opinias, ke la revivigo de la venĝista militarismo de okcidenta Germanio kaj la ekspansiisma politiko de la Bonn-registaro estas serioza minaco kontraŭ la paco kaj sekureco de Eŭropo.

Ambaŭ flankoj forte kondamnas usonan imperiismon, kiu fervore nutras la okcidentgermanan militarismon, intencas transdoni nukleajn armilojn al la okcidentgermanaj venĝistoj, intence preterlasas kaj subtenas la krimajn agojn de la okcidentgermana militarismo por aneksi la Germanan Demokratian Respublikon. Ambaŭ flankoj firme oponas ĉian ajn agon perfidan al la interesoj de la Germana Demokratia Respubliko. Ambaŭ flankoj refoje deklaras sian subtenadon al la justa batalo de la Germana Demokratia Respubliko kontraŭ okcidentgermana militarismo por defendi sian ŝtatan suverenecon, kaj opinias, ke packontrakto kun Germanio devas esti subskribita kiel eble plej rapide kaj, sur la bazo de ĝi, solvi la problemon de okcidenta Berlino.

Ambaŭ flankoj firme subtenas la batalon de la usona popolo kontraŭ la agreso al Vjetnamio fare de la Johnson-registaro, kaj firme subtenas la batalon de la usonaj negroj kontraŭ rasdiferencigo kaj por libereco kaj rajto de egaleco.

Ambaŭ flankoj unuanime subtenas la batalon de la laborista klaso kaj aliaj laborantaj popolanoj de la kapitalismaj landoj en Okcidenta Eŭropo, Norda Ameriko kaj Oceanio kontraŭ usona imperiismo kaj enlanda monopola kapitalo kaj por ŝtata suvereneco, pli bonaj vivkondiĉoj, demokratiaj rajtoj kaj socia progreso.

Ambaŭ flankoj montras, ke la negoco nun farata inter Usono kaj Sovetunio en Ĝeneva Senarmiga Konferenco pri la problemo de "prevento de nuklea disvastigo", estas granda intrigo celanta solidigi ilian pozicion de nuklea monopolo kaj senigi la aliajn landojn je la rajto de disvolvo de nukleaj armiloj por sindefendo. Ĉiuj pacamaj landoj kaj popoloj en la mondo devas firme tion oponi. Ambaŭ flankoj refoje deklaras, ke estas nepre necese komplete malpermesi kaj plene detrui nukleajn armilojn, kaj antaŭ ĉio malpermesi la uzadon de nukleaj armiloj. La albana flanko refoje deklaras, ke ĝi plene subtenas la proponon de la Ĉina Registaro pri okazigo de konferenco de la registaraj ĉefoj de ĉiuj landoj en la mondo por diskuti la problemon de kompleta malpermeso kaj plena detruo de nukleaj armiloj.

Ambaŭ flankoj montras, ke spite al la oponado de Albanio kaj serio da aliaj pacamaj landoj usona imperiismo turnas la Unuiĝintajn Naciojn pli kaj pli en instrumenton por antaŭenpuŝi sian agresan politikon; dume la reviziisma gvidanta kliko de Sovetio, por efektivigi sian sonĝon de "kunlaboro inter Sovetio kaj Usono por superregi la mondon", ĉiam pli turnas la Unuiĝintajn Naciojn en politikan negocejon de Sovetio kaj Usono. Ambaŭ flankoj opinias, ke la situacio de superrego de la Unuiĝintaj Nacioj fare de malmultaj grandaj potencoj devas esti likvidita kaj ke la Unuiĝintaj Nacioj devas korekti siajn erarojn kaj esti ĝisfunde reorganizita.

Ambaŭ flankoj unuanime montras, ke en la nuna internacia komunisma movado, la batalo de marksism-leninismo kontraŭ moderna reviziismo kun la gvidanta kliko de KPSU kiel ĝia centro estas triumfe disvolviĝanta. La falo de Ĥruŝĉov estas granda venko de la marksist-leninistoj de la tuta mondo kaj markas la grandan bankroton kaj fiaskon de moderna reviziismo.

Ambaŭ flankoj montras, ke la gvidanta kliko de KPSU praktikas Ĥruŝĉov-reviziismon sen Ĥruŝĉov. En restarigo de kapitalismo, kapitulaco al usona imperiismo, praktiko de skismismo kaj grandregna ŝovinismo kontraŭ frataj landoj kaj frataj partioj, ĝi iris eĉ pli malproksimen ol Ĥruŝĉov. Por helpi usonan imperiismon, ĝi energie klopodas estingi la revolucian flamon de la vjetnama popolo. Kunordigite kun usona imperiismo, ĝi klopodas formi ĉirkaŭringon kontraŭ Ĉinio. En kolu-

zio kun usona imperiismo ĝi elvendas la revoluciajn interesojn de la popoloj de aziaj, afrikaj, latinamerikaj kaj aliaj landoj de la mondo. Konforme al la bezonoj de usona imperiismo ĝi okazigis en 1965 la Moskvan Martan Kunvenon publike splitigante la internacian komunisman movadon. Ĝi subtenas renegatojn de ĉiuj specoj, subfosante kaj minacante marksism-leninismajn fratajn partiojn kaj revoluciajn grupojn de diversaj landoj. La gvidanta kliko de KPSU jam degeneris en grupon de renegatoj de marksism-leninismo kaj komplicoj de usona imperiismo.

Ambaŭ flankoj montras, ke la 23-a Kongreso de KPSU okazigita lasttempe manifestas, ke tiu, kiun praktikas la gvidanta kliko de KPSU, restas la sama reviziisma ĝenerala linio formita dum la tempo de la 20-a ĝis la 22-a Kongreso de KPSU. En la plej lasta kongreso ĝi plenenergie faris duvizaĝan artifikaĵon, evitis ĉiujn gravajn problemojn kaj kovris ĉiajn kontraŭdirojn. Tio signas ke la nova gvidantaro de KPSU estas pli malforta ol Ĥruŝĉov. La gvidanta kliko de KPSU estas nun en situacio plena de diversaj kontraŭdiroj kaj de eksteraj kaj internaj malfaciloj. Ĝiaj tagoj fariĝas ĉiam pli malfacilaj.

Ambaŭ flankoj opinias, ke marksist-leninistoj en la tuta mondo devas ĉiam pli intense daŭrigi la persekutadon en venkoj kaj konduki ĝisfine la batalon kontraŭ moderna reviziismo kun la gvidanta kliko de KPSU kiel ĝia centro, kaj absolute ne lasi al ĝi ŝancon regajni la spiron. Kontraŭ tiuj renegatoj de marksism-leninismo, estas necese fari senkompromisan laŭprincipan batalon, sed absolute ne montri al ili ian flekseblecon; estas necese daŭre kaj firme fari kontraŭ ili ĝisfundan malkaŝon kaj kritikon, sed absolute ne "ĉesigi publikan polemikon" kun ili; estas necese daŭre kaj plene subteni la batalon de ĉiulandaj marksist-leninistoj kontraŭ moderna reviziismo, sed absolute ne konsenti al ili pri la tiel nomata de ili "ĉesigo de sektaj agadoj"; estas necese fari klaran dividlinion inter ni kaj ili politike, ideologie kaj organize, sed absolute ne fari kun ili ian "unuigitan agadon".

Ambaŭ flankoj montras, ke veraj marksist-leninistoj kaj radikalaj proletaj revoluciaj batalantoj estas sentimaj. La modernaj reviziistoj atakas la Komunistan Partion de Ĉinio, la Albanan Partion de Laboro kaj aliajn marksist-leninistojn kiel "dogmistojn", "aventuristojn", "sektistojn", sed fakte tio, kion ili atakas, estas nenio alia ol marksism-leninismo mem.

Alta principeco kaj sentima kuraĝo estas nepre necesaj kondiĉoj por venke entrepreni revolucion; dume oportunisma kaj pragmatisma sinteno nepre serioze malutilos al la revolucia afero kaj kondukos la revolucian aferon al fiasko. La fina venko povas esti atingita, nur se oni neniam ŝanceliĝos sub kia ajn situacio.

La Komunista Partio de Ĉinio kaj la Albana Partio de Laboro refoje deklaras ke, kiam oni faras firman, senkompromisan batalon kontraŭ Ĥruŝĉov-reviziisma kliko kiu estas la centro de internacia moderna reviziismo, oni devas nepre fari firman batalon kontraŭ la reviziisma renegata Tito-kliko de Jugoslavio. La renegata Tito-kliko estas la reviziisma kliko plej frue aperinta en socialisma lando. Ĝi kaŭzas la degeneron de la jugoslavaj partio kaj ŝtato kaj plenan restarigon de kapitalismo. Ĝi estas speciala taĉmento de usona imperiismo, kaj ludas la rolon de subfosanto kontraŭ la nacia demokratia revolucia movado en aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj.

Ambaŭ flankoj refoje deklaras, ke la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Albana Partio de Laboro rigardas ĝisfundan malkovron de la perfidaj agoj de la sovetiaj modernaj reviziistoj por tiel helpi al la frata sovetia popolo kiel sian noblan internaciisman devon. La Komunista Partio de Ĉinio kaj la Albana Partio de Laboro firme kredas, ke la regado de la reviziismaj renegatoj en Sovetio estas provizora fenomeno, kaj ke la granda sovetia popolo havas neelĉerpeblan revolucian forton. La popoloj de Ĉinio kaj Albanio, same kiel antaŭe, gardas la grandan nerompeblan batalamikecon inter ili kaj la sovetia popolo.

Ambaŭ flankoj emfazas, ke en la nuna situacio favora al revolucio, por maksimume izoli kaj bati usonan imperiismon, la popoloj de la tuta mondo devas nepre starigi unu plej vastan sed ne mallarĝan, plej veran sed ne falsan internacian unuecfronton kontraŭ usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Tiu unuecfronto devas esti bazita sur kontraŭimperiisma revolucia solidareco de la tutmondaj po-

poloj kaj inkludi ĉiujn landojn kaj popolojn, kiuj oponas kontraŭ la agreso, superrego, interveno aŭ tiranado de usona imperiismo, sed absolute ne inkludi ĝiajn lakeojn kaj komplicojn. Moderna reviziismo kun la gvidanta kliko de KPSU kiel ĝia centro jam delonge estas en koluzio kun usona imperiismo, jam delonge starigis sin kontraŭ la tutmonda popolo kaj jam delonge ekskludis sin el la internacia unuecfronto kontraŭ usona imperiismo. Batalo kontraŭ imperiismo estrata de Usono kaj ĝiaj lakeoj kaj batalo kontraŭ moderna reviziismo kun la gvidanta kliko de KPSU kiel ĝia centro estas du nedisigeblaj taskoj. Oni povas venke batali kontraŭ usona imperiismo, nur se ili firme batalas kontraŭ moderna reviziismo kun la gvidanta kliko de KPSU kiel ĝia centro.

Ambaŭ flankoj firme kredas, ke la popolamaso, inkluzive la usonan popolon, okupanta absolutan plimulton de la homaro volas revolucion kaj volas oponi kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, kaj ke la absoluta plimulto de la komunistoj en la internacia komunisma movado volas antaŭenmarŝi laŭ la vojo de marksism-leninismo. La revoluciaj popoloj de la tuta mondo kaj la granda internacia komunisma movado fine forbalaos ĉiujn obstaklojn kaj pli intime unuiĝos sur la bazo de marksismleninismo kaj proleta internaciismo. La estonteco de la monda revolucia afero estas senlime luma. Imperiismo, moderna reviziismo kaj la reakciuloj de ĉiuj landoj pereos senescepte en la fino. Socialismo kaj komunismo nepre akiros finan venkon tra la tuta mondo.

Ambaŭ flankoj opinias, ke la vizito de la Albana Partia kaj Registara Delegacio estrata de kamarado Mehmet Shehu al la Ĉina Popola Respubliko kaj la intimaj konversacioj inter la gvidantoj de la du Partioj kaj la du landoj faris gravan kontribuon al plua firmigo de la solidareco, amikeco kaj interrilatoj en reciproka helpado kaj kunlaborado inter la du Partioj, la du registaroj kaj la du popoloj, kaj ke ili havas gravan signifon en la rilato al la antaŭenpuŝo de la unueco kaj kresko de la tutmondaj marksist-leninistaj vicoj kaj al la granda batalo de la tutmondaj revoluciaj popoloj kontraŭ usona imperiismo, moderna reviziismo kaj la diverslandaj reakciuloj kaj por mondpaco, naciliberigo, popoldemokratio kaj socialismo.

Pekino, la 11-an de Majo, 1966

(*Subskribo*)

ĜOŬ ENLAJ

Vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko

(*Subskribo*)

MEHMET SHEHU

Membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj Prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj de la Popola Respubliko de Albanio

La Komuna Deklaro de la Partiaj kaj Registaraj Delegacioj de Ĉinio kaj Albanio estas subskribata en Pekino.



Prezidanto Liu Vizitis Najbarajn Landojn

DE la 26-a de marto ĝis la 19-a de aprilo ĉijare, la Prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko kamarado Liu Ŝaŭki, en la akompano de Vicĉefministro kaj Ministro de Eksterlandaj Aferoj kamarado Ĉen Ji, faris vizitojn al la najbaraj landoj: Pakistano, Afganio kaj Birmo. De ties registaroj kaj popoloj ili ricevis solenajn bonvenigojn.

Pakistano, Afganio kaj Birmo estas amikaj najbaraj landoj de Ĉinio. Jam delonge ekzistas profunda amikeco inter la popoloj de la tri landoj kaj la popolo de Ĉinio. La vizitoj de Prezidanto Liu ankoraŭ pli fortigis la rilatojn de amikeca kunlaborado inter Ĉinio kaj la najbaroj, pliigis la amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj aziaj landoj, kaj donos profundan influon sur la aferon de firmigo kaj disvolvo de unuiĝo de Azio kontraŭ imperiismo kaj sur la defendon de la paco en Azio kaj en la tuta mondo.


Dum sia vizito al Pakistano, Prezidanto Liu Ŝaŭki estas feste bonvenigata de Prezidanto Ajub Khan kaj aliaj ŝtatoficistoj kaj la popolo de Ravalpindi.



La solenaj bonvenigoj de la registaroj kaj popoloj de tiuj tri landoj ankaŭ montriĝis grava venko de la paca diplomatia politiko de Ĉinio. Kvankam la socisistemo de Ĉinio diferencas de tiu de la naciismaj landoj en Azio kaj Afriko, tamen ili havis la saman sperton kaj travivaĵon kaj havas la komunan deziron kaj postulon sin unuigi por kontraŭi imperiismon. Pro tio Ĉinio tute povas solidare kunlabori kaj amike vivi kun ili, escepte la tre mal-

Amikajn

FANG LIN



Prezidanto Liu Ŝaŭki kaj Generalo Ne Vin, Prezidanto de la Revolucia Komitato de la Unio de Birmo



Prezidanto Liu Ŝaŭki varme manpremas kun Mohammed Zahir Shah, Reĝo de Afganio.

multajn landojn regatajn de reakciaj naciistoj. La interrilatoj de Ĉinio kun Pakistano, Afganio kaj Birmo ja estas bona ekzemplo.

Nia paca diplomatia politiko firme insistas pri la jeno: ĉiuj landoj, grandaj kaj malgrandaj, estas egalaj, kaj oponenda estas grandregnismo de ĉia ajn formo; ne interveni en la internan aferon de, nek trudi sian opinion al aliaj; intersubteni unu la alian en batalo kontraŭ imperiisma agreso kaj en defendo de nacia sendependeco kaj suvereneco; Ĉinio rigardas subtenon al la justa batalo de la popoloj de aliaj landoj kiel sian plenumendan internacisman devon; kaj samtempe ĝi konsideras la justan batalon de diverslandaj popoloj kiel grandan subtenon al la ĉina popolo.

Dum la vizitado de Prezidanto Liu, la registaroj kaj la publika opinio de la popoloj de tiuj tri landoj alte taksas la pacan diplomatian politikon de Ĉinio. Tio montras, ke la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj la landoj de Azio kaj Afriko staras sur firma bazo.

La imperiismo estrata de Usono kaj ĉiuj reakciuloj delonge klopodas por rompi la amikecon inter la ĉina popolo kaj la popoloj de ĉiuj aziaj kaj afrikaj landoj intencante izoli Ĉinion. Sed la ĉina popolo kaj la popoloj de Azio kaj Afriko estas fratoj kiuj spiras komune kaj dividas inter si la sorton. La paca diplomatia politiko de Ĉinio estas konforma al la fundamentaj interesoj de la aziaj kaj afrikaj landoj kaj iliaj popoloj. La konspiro de la usona imperiismo por izoli Ĉinion ne nur ne povos sukcesi, sed tiuj, kiuj estas izolitaj de la popoloj de Azio kaj Afriko, estas ĝuste la usona imperiismo kaj ĝiaj komplicoj. La amikeco inter la ĉina popolo kaj la popoloj de Azio kaj Afriko kaj de aliaj landoj en la mondo certe ankoraŭ pli firmiĝos kaj disvolviĝos.

Amikeco inter Ĉina kaj Pakistana Popoloj Verdas Poreterne

PAROLANTE pri la vizito de Prezidanto Liu Ŝaŭki al la Okcidenta Pakistano, iu pakistana amiko diris: "Ni pakistanaj popolanoj bonvenigas Prezidanton Liu ne nur per freŝaj floroj kaj flagoj, sed ankaŭ per niaj tutaj koroj."

Ĉi tiuj vortoj esprimis la elkoran senton de pli ol du milionoj da bonvenigantoj en Ravalpindi, Lahor, Karaĉi kaj Daka kaj ankaŭ la profundan amikecon de la tuta pakistana popolo al la ĉina popolo.

Je la 26-a de marto Prezidanto Liu kaj lia akompanantaro atingis Ravalpindi, la provizoran ĉefurbon de Pakistano. Vidinte ke la aŭtomobiloj de la ĉinaj gastoj alproksimiĝas al la fervojo, la lokomotivisto tuj bremsis sian maŝinon. Dekoj da fervojistoj konkure grimpis supren sur ĝin, kaj energie svingante la manojn, ili kriis: "Vivu la amikeco inter Pakistano kaj Ĉinio!"

Nelonge antaŭ la alveno de la ĉinaj gastoj al Lahor, pli ol ok mil veturigistoj de motortricikloj kaj taksioj okazigis surstrate grandan paradon kun siaj bele ornamitaj veturiloj honore al la amikeco inter Pakistano kaj Ĉinio. Poste, ili senpage portis pasaĝerojn al la aerodromo por bonvenigi la ĉinajn gastojn en longa vico kvazaŭ procesio.

La florĝardenoj kaj florvendejoj en Lahor estis plenaj de homamasoj, kiuj aĉetis freŝajn florojn por saluti la ĉinajn gastojn. Kelkaj florkultivistoj simple malfermis la pordojn de siaj ĝardenoj kaj senpage disdonis freŝajn florojn al la amaso. Ili pensis, ke la floroj estos oferitaj al la Prezidanto de Ĉinio, kaj tio estos plej valora rekompenco por ilia diligenta laboro.

Torenta pluvo tramalsekigis la vestojn de centmiloj da bonvenigantoj sur la stratoj de Ravalpindi kaj forviŝis sennombrajn sloganojn kaj flagojn faritajn el koloraj paperoj. Sed oni tuj anstataŭigis ilin per novaj, kaj kiel antaŭe ĝoje atendis la ĉinajn gastojn. Iu dekjara knabino estis demandita, ĉu ŝi ne sentis sin malkomforta starante en malsekigita vesto. Jen la respondo: "Kio? Mi pretas stari en pluvo eĉ 24 horojn por saluti la Prezidanton de Ĉinio."

Iu blankhara maljunulino staris kun sia nepeto apud la strato kaj ripetade kriegis: "*Zindabad! Zindabad!*" (Vivu!). Al ĉiu ŝia krio eĥis centoble entuziasme la ĉirkaŭstarantoj. Laciĝinte de kriado, ŝi diris al sia nepeto: "Kriu anstataŭ mi! Kriu laŭte! Kriu laŭte al onklo Liu kaj aliaj ĉinaj gastoj!"

Kiam la speciala aeroplano, portanta Prezidanton Liu, aperis inter la nuboj super Lahor, emocio de la miliona amaso fariĝis neretenebla de eksplodo. Apenaŭ la aeroplano glite surteriĝis, homsvarmoj tuj kvazaŭ tajdo fluis al ĝi, poste al ĉiuj aŭtomobiloj, tiel ke la aŭtomobiloj neniel povis iri antaŭen. En aŭtojn oni etendis manojn, unu, du, tri... ĉiuj provis manpremi al ĉiuj ĉinoj en la aŭto. Larmoj montriĝis en la okuloj de iuj, kiam ili energie svingis al la gastoj tabuletojn sur kiuj estis skribita la slogano "*La Ĉina Popolo Estas Vera Amiko de la Pakistana Popolo!*"

Oni renkontis ĉie en Karaĉi, Taksila kaj Islamabad tian kortuŝan scenon. Apenaŭ la aŭtomobiloj de la ĉinaj gastoj aperis sur la stratoj, la homsvarmoj sur la trotuaroj, en la balkonoj aŭ en aŭtobusoj varme svingis la manojn por saluti. Kiam ili eldiris la vorton " ĉini " (ĝi signifas en la urdua lingvo ĉinon kaj ankaŭ enhavas la sencon "sukero"), iliaj okuloj disradiis intiman amikecon.

Kiam Prezidanto Liu atingis Daka, la ĉefurbon de Orienta Pakistano, preskaŭ ĉiuj loĝantoj en la urbo eliris bonvenigi lin, multaj aliaj alrapidis bonvenigi la ĉinajn gastojn eĉ el najbaraj distriktoj. Sur

la vojo ses kilometrojn longa de la aerodromo ĝis la prezidanta domo en Daka, svarmis bonvenigantoj. Informiĝinte pri la alveno de Prezidanto Liu en jakto, miloj kaj miloj da popolanoj ĉe la rivero Sitalakhja amasiĝis sur tegmentoj, la suproj de barĝoj, riverbordoj kaj kajoj, iuj eĉ naĝis en direkto al la jaktoj, ĉiu el ili varme salutis, aklamis kaj aplaŭdis al la ĉinaj gastoj.

La amikeco inter la pakistana kaj ĉina popoloj kreskis kaj estis provita en la batalo kontraŭ imperiismo kaj ekspansiismo. Tion emfazis multaj pakistanaj amikoj dum la vizito de la gastoj.

Kiam la ĉinaj gastoj veturis sur la stratoj, la entuziasmaj bonvenigantoj ofte ŝovis en la aŭtojn portretojn de Prezidanto Liu Ŝaŭki, kiujn ili mem pentris, florojn, poŝtukojn kaj aliajn. Estis ankaŭ flugfolio en kiu estis presita la jena poemo kun la titolo "Amiko kaj Malamiko":

Kiu en kriza momento nin subtenis?
Kiu en tempo de provo nin perfidis?
Kiu estas malamiko kaj kiu amiko?
Ne plu estas malfacile nun ilin distingi,
Amu la amikon, piedbatu l' malamikon.
Bonvenon, Ĉinio! kaj for la jankioj!

Iu pakistana amiko nomata Kalim diris al ĉinaj ĵurnalistoj: "Imperiismo kaj ĝiaj lakeoj ĉiam volas izoli Ĉinion kaj helpas al Hindio por ataki Pakistanon. Ili venu hodiaŭ al Lahor por rigardi! — rigardi, kiel la centmiliona pakistana popolo montras per sia agado, ke ĝi ĉiam staras ĉe la flanko de la ĉina popolo!"

La ĉina popolo subtenas la pakistanan popolon en ĝia batalo kontraŭ agreso. La pakistana popolo ankaŭ donas subtenon al la ĉinaj registaro kaj popolo en internaciaj aferoj. Kiam Vicĉefministro Ĉen Ji eldiris tiun veron en la akcepta kunveno en Lahor, kelkaj el la ĉeestantoj estis kortuŝitaj ĝis larmo.

En la koro de la ĉinaj gastoj engravuriĝis la heroeco de la pakistana popolo montrita en ĝia luktado kontraŭ la agreso de Hindio.

Venkis la heroa batalo de la pakistana popolo. Ŝalimarparko de Lahor, kiu alfrontis rektan minacon de la agresantoj, staras hodiaŭ en sia originala fizionomio.

Tamen, kiel diris la prezidantino de la Pakistana-Ĉina Amikeca Asocio en sia salutparolado, la milito finiĝis, sed la luktado kontraŭ imperiismo kaj ekspansiismo ne. Konstruante sian landon, la pakistana popolo vigle singardas kontraŭ la intrigo de la imperiistoj kaj ekspansiistoj.

Pli multaj domegoj estas konstruataj en Islamabad, la nova ĉefurbo. Kune kun la mastroj, la ĉinaj gastoj rigardis al la vigle laboranta konstruejo de sur monteto. Apud ili la folioj de la arbidoj, plantitaj de Prezidanto Liu en la nuna vizito kaj de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj antaŭ du jaroj, brilis sub la suno. En la momento ni ekpensis, ke nenia forto en la mondo povos bari la antaŭenmarŝon de la pakistana popolo kaj detrui la amikecon inter la ĉina kaj pakistana popoloj, kiu verdas poreterne.

La pakistana popolo varme bonvenigas Prezidanton Liu Ŝaŭki per kanto kaj danco.



Ĉinio Sukcesis en

Entenanta Termo

Hinhua-Novaĵagentejo publikigis la 9-an de majo jenan informan komunikon:

La 9-an de majo 1966, je la 16-a horo (pekina tempo), Ĉinio sukcese faris super sia okcidenta regiono nuklean eksplodigon kiu entenis termonuklean materialon.

Tiu eksperimenta nuklea eksplodigo estas nova granda sukceso akirita de la ĉina popolo en ĝia penado por plue plifortigi sian nacian defendon kaj gardi la sekurecon de sia patrolando kaj la pacon de la mondo.

La kompletan sukceson de tiu nuklea provo garantiis la Ĉina Popola Liberiga Armeo, sciencistoj, teknikistoj kaj vastaj laboristaj kaj oficistaj amasoj de Ĉinio, kiuj, sub la ĝusta gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio, pli alten tenante la grandan ruĝan flagon de la penso de Maŭ Zedong, reliefigis la politikon, restis firme fidelaj al la kvar unuaoj (t.e. la homa faktoro devas esti en la unua loko; la politika laboro devas esti en la unua loko; la ideologia laboro devas esti en la unua loko; kaj la vivantaj ideoj devas esti en la unua loko — *la Red.*), kreive studis kaj aplikis la verkojn de Prezidanto Maŭ, efektivigis la politikon de sinapogo sur la propraj fortoj kaj energia strebado al prosperiĝo difinitan de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, kaj malvolvis en siaj laboroj la spiriton utiligi kolektivan saĝon kaj kolektivan forton kaj kunlabori el la tuta koro per kombinado de la gvidantoj, specialistoj kaj amasoj kaj de edukado, esplorado kaj produktado. Tio estas granda venko de la Ĝenerala Linio de Socialisma Konstruado de la Partio. Tio estas granda venko de la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento. Tio estas granda venko de la penso de Maŭ Zedong.

La Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Ŝtata Konsilantaro kaj la Komisiono pri Militaj Aferoj de CK de KPĈ esprimas siajn varmajn salutojn al ĉiuj komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo, kiuj partoprenis en tiu nuklea provado, kaj al la laboristoj, inĝenieroj, teknikistoj, sciencistoj kaj ĉiuj laborantoj, kiuj faris kontribuon al la nuklea provado de nia lando, kaj esperas ke ili ankoraŭ duobligos sian penadon kaj atingos sen-

Nuklea Eksplodigo nuklean Materialon

ĉese novajn sukcesojn en la lukto por plua fortigo de la konstruado de nia nacia defendo kaj por ĝia modernigo.

La celo de Ĉinio en entreprenado de necesaj kaj limigitaj nukleaj provadoj kaj disvolvado de nukleaj armiloj estas oponi la nuklean ĉantaĝon kaj nuklean minacon de la usona imperiismo kaj ĝiaj kunlaborantoj kaj oponi la koluzion inter Usono kaj Sovetunio celantan teni nuklean monopolon kaj subfosi la revoluciajn batalojn de ĉiuj subpremataj popoloj kaj nacioj. Ke la ĉina popolo posedas nukleajn armilojn, tio estas granda kuraĝigo al la popoloj, kiuj luktas heroe por sia liberiĝo, kaj nova kontribuo al la defendo de mondpaco.

Kiam Ĉinio eksplodigis siajn unuan kaj duan atombombojn, la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko jam publikigis respektive deklarojn, klarigantajn la fundamentan starpunkton de Ĉinio pri la problemo de nukleaj armiloj, kaj konkrete proponis kunvokon de konferenco de ĉefoj de diversaj landoj en la mondo por diskuti pri kompleta malpermeso kaj plena detruo de nukleaj armiloj.

De tiu tempo, la usona imperiismo, spite al la deklaro de la ĉina registaro, ankoraŭ daŭre disvolvis kaj amasproduktis diversspecajn nukleajn armilojn, plue ekspansiigis siajn nukleajn bazojn tra la mondo kaj intensigis sian nuklean ĉantaĝon kaj nuklean minacon kontraŭ Ĉinio kaj la tuta mondo. La disvolvado de nukleaj armiloj de Ĉinio estas sole por sindefendo kaj ĝia fina celo estas elimini nukleajn armilojn mem. Ni solene deklaras ankoraŭfoje, ke en ĉiu ajn tempo kaj ĉiu ajn cirkonstanco, Ĉinio ne uzos la unua nukleajn armilojn. La ĉina popolo sincere esperas ke nuklea milito neniam okazos.

Ni profunde kredas ke nuklea milito estas preventebla, se ĉiuj pacamaj popoloj kaj landoj de la tuta mondo nur kune klopodas kaj persiste luktas. Same kiel antaŭe, la ĉina popolo kaj la ĉina registaro daŭre luktos senŝanceliĝe, kune kun ĉiuj pacamaj popoloj kaj landoj de la tuta mondo, por la nobla celo de kompleta malpermeso kaj plena detruo de la nukleaj armiloj.

Ĉefministro Ĝoŭ pri la Sukceso de la Tria Nuklea Provo de Ĉinio

En la adiaŭa bankedo aranĝita je la 10-a de majo de kamarado Mehmet Shehu, membro de la Politika Buroo de Centra Komitato de Albana Partio de Laboro kaj Prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj de Albanio, en lia vizito al Ĉinio, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj diris interalie jenon:

"Hieraŭ, nia lando sukcese faris la trian nuklean provon. Tio estas grava kontribuo al defendo de la sekureco de nia patrolando kaj al defendo de la mondpaco fare de la ĉina popolo, kiu alte tenas la grandan ruĝan flagon de la penso de Maŭ Zedong kaj, sinapogante sur la propraj fortoj, energie strebas al prosperiĝo. Ni disvolvas nukleajn armilojn sole por sindefendo kaj nia fina celo estas neniigi ilin. En la tempo, kiam Ĉinio eksplodigis sian unuan atombombon, la Ĉina Registaro jam klarigis sian bazan starpunkton pri nukleaj armiloj kaj konkrete proponis kunvokon de monda konferenco de ŝtatĉefoj de diversaj landoj por diskuti pri la demando de kompleta malpermeso kaj ĝisfunda detruo de nukleaj armiloj. Ĉinio cetere proponis al Usono ke ambaŭ landoj prenu sur sin la devon ne uzi la unua inter si nukleajn armilojn. Sed, la usona imperiismo rifuzis nian proponon, kaj ĝi daŭre disvolvas kaj grandakvante produktadas diversspecajn nukleajn armilojn, plue disvastigas siajn nukleajn bazojn en la tuta mondo, precipe tiujn ĉirkaŭ Ĉinio, kaj intensigas siajn nuklean ĉantaĝon kaj nuklean minacon kontraŭ Ĉinio kaj aliaj pacamaj landoj. En koluzio kun la usona imperiismo, la reviziisma gvidanta kliko de Sovetunio aktive klopodas pri la t. n. traktato pri 'prevento de nuklea disvastigo' por konservi ilian nuklean monopolan pozicion, timigi la subprematajn naciojn kaj subprematajn popolojn kaj strebi al efektivigo de sia sonĝo pri 'kunlaboro inter Sovetunio kaj Usono por superregi la mondon'. En tiuj ĉi cirkonstancoj Ĉinio ne povas ne fari necesajn kaj limigitajn nukleajn provojn por disvolvi nukleajn armilojn. La sukceso de la tria nuklea provo de Ĉinio estas sendube grandega kuraĝigo al diverslandaj popoloj, kiuj heroe luktas nun por sia liberiĝo.

"Blinde kredi je nukleaj armiloj estas unu el la gravaj trajtoj de la Ĥruŝĉov-reviziistoj. Dum ili mem submetiĝis al la nuklea ĉantaĝo de la usona imperiismo, ili ĉantaĝas kontraŭ aliaj per nukleaj armiloj. Ili opinias, ke dank' al posedo de nukleaj armiloj ĉiuj problemoj en la mondo povas esti solvitaj. Tio estas ekstreme erara kaj reakcia vidpunkto. Same kiel ĉiuj novaj armiloj en la historio, nukleaj armiloj estas nemonopoligeblaj. Ĉiuj reakciaj fortoj pereos, kiajn ajn novajn armilojn ili posedas. Nukleaj armiloj ne povas savi la vivon de la usona imperiismo, nek tiun de la reviziisma gvidanta kliko de Sovetunio.

"Ĉinio disvolvas nukleajn armilojn, sed absolute ne blinde kredas je ili. Ni absolute ne submetiĝos al la nuklea ĉantaĝo de ĉiu ajn, nek ĉantaĝos kontraŭ aliaj per nukleaj armiloj. Same kiel en la tempo de antaŭaj du nukleaj provoj, ĉifoje ni denove deklaras, ke Ĉinio ne uzos la unua nukleajn armilojn en ĉiu ajn tempo kaj ĉiu ajn cirkonstanco. Ni profunde kredas ke, se ĉiuj pacamaj popoloj kaj landoj de la tuta mondo nur kune klopodos kaj persiste batalados, nuklea milito povos esti preventita, kaj nukleaj armiloj tute povos esti malpermesitaj."

Kvar Frazoj pri la Politiko de Ĉinio kontraŭ Usono

Parolo de Ĉefministro Ĝoŭ en Intervjuo Donita al Raportisto de la Pakistana Ĵurnalo *Tagiĝo*

En intervjuo donita al s-ro Ejaz Husain, raportisto de la pakistana ĵurnalo "Tagiĝo", je la 10-a de aprilo, 1966, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj diris kvar frazojn pri la politiko de Ĉinio kontraŭ Usono. Sube estas la plena teksto:

(1) Ĉinio ne iniciate provokos militon kontraŭ Usono. Ĉinio ja ne sendis trupojn al Havajo; estas Usono, kiu okupas Tajvan-provincon, teritorion de Ĉinio. Malgraŭ tio Ĉinio ankoraŭ klopodas pere de intertraktado por postuli Usonon retiri ĉiujn siajn armitajn fortojn el Tajvan-provinco kaj Tajvan-markolo, kaj Ĉinio jam traktadis kun Usono pli ol dek jarojn, unue en Ĝenevo kaj poste en Varsovio, pri tiu ĉi absolute nekoncesiebla demando de principo. Ĉio ĉi tio estas tre bona pruvo.

(2) Kion la ĉinoj diras, ili plenumos. Alivorte, se iu ajn lando en Azio, Afriko aŭ aliloke en la mondo estos agresata de la imperiistoj estrataj de Usono, la Ĉina Registaro kaj ĉina popolo nepre donos al ĝi subtenon kaj helpon. Se tia justa ago elvokos usonan agreson kontraŭ Ĉinio, ni senhezite leviĝos por rezisti kaj batalos ĝis la fino.

(3) Ĉinio estas sinpreparinta. Se Usono trudos militon al Ĉinio, tio povas esti certigita, ke ĝi povos eniri, sed ne eliri, tute egale kiom da personoj ĝi alsendos kaj kiajn armilojn ĝi uzos, inkluzive la nukleajn. La dekkvarmiliona popolo de suda Vjetnamio kapablas kontraŭstari pli ol 200,000 usonajn armeanojn, do la 650-miliona ĉina popolo certe kapablos kontraŭstari 10 milionojn da usonaj armeanoj. Kiom ajn da usonaj agresantoj venos, ili estos certe ekstermitaj en Ĉinio.

(4) Kiam eksplodos la milito, ĝi ne havos limojn. Iuj usonaj strategiistoj volas bombadi Ĉinion, apogante sin sur sian superecon en maraj kaj aeraj fortoj, kaj eviti surteran militon. Tio estas laŭvola pensado. Kiam la milito komenciĝos per aera aŭ mara batalo, tiam ne Usono sola decidos, kiel kontinuos la milito. Se vi povas veni de la ĉielo, kial ni ne povas aliri sur la tero? Sekve ni diras, ke la milito ne plu havos limojn, kiam ĝi foje eksplodos.



Kamarado Giaŭ Julu

Mu Feng Ĝoŭ:

Modelo por Guberniaj Partisekretarioj

NOVE ALVENINTA GUBERNIA PARTISEKRETARIO

La vintro de 1962 estis la tempo kiam Lankaŭ-gubernio en la orienta parto de Henan-provinco suferis plej severe la tri malutilaĵojn: pluvinundo, sablovento kaj salalkalo. Ĝuste en tiu momento la Partio sendis Giaŭ Julu al la gubernio.

Lankaŭ-gubernio estis suferoplena loko en la historio. Dum la periodo de pli ol 400 jaroj de 1477 ĝis 1885, la Flava Rivero brečiĝis dudek naŭ fojojn en la teritorio de Lankaŭ, inundante sennombrajn vilaĝojn kaj kampojn. La multfoja fluej-ŝanĝiĝo kaj superakvegoj de la Flava Rivero en la pasinteco postlasis al Lankaŭ la malutilajojn de granda spaco da sablejo, salalkala tero kaj pluvinundo. Dum la reakcia regado de Kuomintango, la laborantaj popolanoj vivis en mizero kaj multaj el ili estis devigitaj forlasi la hejmlokon kaj vagi aliloken por almozpeti. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Komunista Partio la laboranta popolo seninterrompe entreprenis obstinan luktadon kontraŭ la "tri malutilaĵoj" kaj la fizionomio de la loko iom post iom ŝanĝiĝis. Sed ankoraŭ tre malgranda estis ilia kapablo kontraŭ la naturaj katastrofoj. En 1962, grandaj naturaj katastrofoj denove trafis la popolon de Lankaŭ.

Sennombraj malfaciloj pezis kvazaŭ ŝarĝego sur la ŝultroj de la nova sekretario de Gubernia Partikomitato. Sed Giaŭ Julu venis kun firma decido ŝanĝi la fizionomion de Lankaŭ. En la okuloj de tiu ĉi komunisto, ĉi tie sin trovas 360,000 laboremaj popolanoj kaj pli ol 900,000 muoj da tero liberigita de la martiroj kontraŭ ilia sango. Se nur la gvido de la Partio estos plifortigita, ĉia ajn grandega malfacilo povos esti finfine venkita.

La sekvintan tagon, kiam oni sciiĝis pri la alveno de la nova sekretario de la Gubernia Partikomitato, tiu jam iris al la kamparo.

NOVA DEIRPUNKTO DE LA GUBERNIA PARTIKOMITATO

Giaŭ Julu pensis: "La popolamasoj troviĝantaj en suferado turnas sian rigardon al la Gubernia Partikomitato. Por ŝanĝi la fizionomion de Lankaŭ, oni unue devas ŝanĝi la spiritan staton de la Gubernia Partikomitato."

Estis jam profunda nokto. Giaŭ turniĝadis en la lito ne povante endormiĝi. Li eksurmetis la vatitan veston kaj iris al la vicsekretario de la Gubernia Partikomitato Ĝang Kinli por elverŝi sian koron.

Aŭdinte frapadon ĉe la pordo en tia malfrua tempo, Ĝang surpriziĝis. Li bonvenigis Giaŭ Julu en la ĉambron kaj ripete demandis: "Kio okazis, Giaŭĉjo?"

"Mi volas interparoli kun vi," respondis Giaŭ. "Vi jam laboris en Lankaŭ pli ol dek jarojn kaj kompreneble konas la ĉitieajn cirkonstancojn pli bone ol mi. Nu, diru, kie kuŝas la ĉefa problemo en la transformo de la fizionomio de Lankaŭ?"

Post momento da meditado, Ĝang ekrespondis: "Ĝi troviĝas en la ŝanĝiĝo de la penso de la homoj."

"Prave," diris Giaŭ, "sed antaŭ la vorto 'homoj' oni aldonu la vorton 'gvidantaj'. Sen kuraĝaj kadroj kontraŭ katastrofoj ne troviĝas kuraĝaj popolamasoj."

Ili interparolis tre longe kaj tre profunde ĝis post noktomezo. Fine ili venis al komuna konkludo: por forigi la tri malutilaĵojn oni devas unue elradiki la malutilaĵojn en la homa penso, precipe fari kontraŭkatastrofan edukadon inter la kadroj de la Gubernia Partikomitato.

Post tio Giaŭ Julu kunvokis specialajn kunvenojn de la Gubernia Partikomitato kaj ĝia Konstanta Komitato, por diskuti pri la devoj de la Gubernia Partikomitato antaŭ la seriozaj naturaj katastrofoj kaj kune rememori la historion de revoluciaj luktoj en Lankaŭ-gubernio. En la jaroj de kruelegaj armitaj bataloj, iam en iu distrikto sinsekve oferis sian vivon al la revolucio naŭ distriktestroj en unu monato. Giaŭ diris: "Lankaŭ estas loko reprenita el la manoj de niaj malamikoj kontraŭ la sango de niaj kamaradoj. La martiroj ne forcedis ĝin al la malamikoj pro la malriĉeco kaj la severaj katastrofoj de la loko. Ĉu ni cedu ĝin al la naturaj katastrofoj?"

Sinsekva klaskonsciiga edukado kaj ideologiaj luktoj rektigis la talion de la kerna gvidantaro de la Gubernia Partikomitato antaŭ la seriozaj katastrofoj.

ELIRI EL REALECO

Giaŭ Julu bone sciis, ke por subigi la tri malutilaĵojn de pluvinundo, sablovento kaj salalkalo, oni devas fari serion da malfacilegaj kaj ekzaktaj laboroj kaj unue ekkoni, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, la situacion per enketo kaj esplorado por plene informiĝi pri la detaloj de la katastrofoj kaj kompreni iliajn devenojn kaj rezultojn kaj poste fari korektan juĝon kaj alpreni ĝustajn paŝojn.


Li decidis plenplene ekkoni la naturajn kondiĉojn de la tero de Lankaŭ-gubernio ampleksanta 1,800 km^2 kaj persone pesi kiom pezaj estas efektive la tri malutilaĵoj de Lankaŭ.

Laŭ tiu ĉi konsidero la Gubernia Partikomitato organizis esploran trupon pri la tri malutilaĵoj, konsistantan el 120 kadroj, veteranaj kamparanoj kaj teknikistoj. Tiel, grandskale disvolviĝis tra la tuta gubernio la esploraj laboroj pri la inunda fluo, la enblovejoj de ventegoj kaj la fluantaj sabloj.

Ĉiam kiam furiozis plej forte sablovento, por Giaŭ Julu estis ĝuste la tempo, dum kiu li gvidis la anojn de la esplora trupo por iri esplori la enblovejojn de la ventego kaj la fluantajn sablojn. Ĉiam kiam plej senbride falegis pluvego, por li estis ĝuste la tempo dum kiu li gvidis la esplortrupanojn por observi, vadante en la akvo sub la pluvego, la fluan direkton kaj evoluon de la inundo. Por klare koni iun grandan enblovejon de ventegoj aŭ la devenon kaj forfluon de iu ĉefa rivero, li ĉiam nelacigeble iris kun la trupanoj esplori la forirajn direktojn de sablovento kaj inundfluo, komencante de la antaŭa fluejo de la Flava Rivero kaj transirante gubernilimojn aŭ provinclimojn ĝis kie la sablo falis sur la teron aŭ la akvego fluis en riverliton. En tiu ĉi malfacilega luktado Giaŭ Julu kaj ĉiuj kamaradoj de la esplora trupo ĉiam manĝis sekajn manĝaĵojn en akvo ĝistalie profunda kaj iafoje ripozis kaŭrante en kota akvo dum la nokto . . .

Iun fojon, sur la revena vojo de Gujang-komunumo al la gubernia urbo, Giaŭ Julu renkontis pluvegon, kiu daŭris sep tagnoktojn. Multaj lokoj de la gubernio estis inunditaj sub akvego. Giaŭ pensis: Jen venas la plej bona ŝanco por studi la leĝojn de la inundo. Reveninte al la urbo, li tuj ekiris kun tri kamaradoj de la oficejo sen momento da halto. Antaŭ ili etendiĝis nur akvego.

La tablo kaj seĝo, kiujn uzis kamarado Giaŭ Julu





Kamarado Giaŭ Julu laboras en la kampo.

Kie estas trovebla la vojo? Ili antaŭeniris palpante per bastono en la mano kaj notis observitaĵojn dum la irado.

Starante en la inunda fluo sub la ombrelo portata de lia kamarado, li desegnis pecon post peco mapojn pri la fludirekto de la inundo. Kiam ili venis al Ginjing-brigado, la sekretario de la partiĉelo Li Guangĝi multe miris vidante ilin: "Kiamaniere vi venis ĉi tien, kiam ĉie estas akvego?" Svingante sian bastonon en la mano, Giaŭ respondis: "Mi venis sur tiu ĉi boato." Li Guangĝi petis lin iom ripozi, sed anstataŭe tiu montris al Li Guangĝi siajn skizojn kaj diris seninterrompe, ke laŭ la ĉitiea topografio kaj la direkto de la akvofluo, oni devas fosi kanalon de ĉi tie al tie, kaj branĉan kanaleton de tie al tie... tiel la tuta pluvinundo en la teritorioj de ĉi tieaj brigadoj povos esti tute defluigita. Aŭdinte liajn vortojn, Li Guangĝi estis treege emociita. Li tute ne atendis ke la laboro de k-do Giaŭ Julu kiel gvidanto estas tiel profunda kaj detala.

Monaton post monato la esplora trupo pasigis en vento, pluvo, sablejoj kaj torentoj kaj vagadis totale pli ol 2,500 km, tiel ke la Gubernia Partikomitato havigis al si senperajn materialojn pri la "tri malutilaĵoj" de Lankaŭ-gubernio. En la tuta gubernio sin trovis 84 ventoenblovejoj de diversa grandeco, kiujn la esplora trupo bone esploris kaj numeris kaj kies topografio estis desegnita, kaj 1,600 sablomontetoj de diversa grandeco, kiujn ili mezuris unun post alia, numeris kaj pridesegnis. Pri la riveroj kaj riveretoj, ŝlimŝtopitaj fluejoj, akvobaraj vojbazoj, subvojaj akvotrafluejoj... oni faris detalan esploradon kaj detala plano pri defluigo de pluvinundo kaj akvego estis desegnita.

SEKVADO DE AMASLINIO

La plano de luktado kontraŭ naturaj katastrofoj de la tuta gubernio nun estis klara por Giaŭ Julu. Kun serio da demandoj li komencis legi la artikolon de Prezidanto Maŭ "Kelkaj Problemoj Koncerne al Metodoj de Gvidaj Laboroj". Lia rigardo haltis ĉe la jenaj linioj:

> Sin trovas du metodoj kiujn ni komunistoj devas nepre uzi en kiu ajn laboro de ni entreprenata. Unu estas kombini la ĝeneralon kun la partikularo; la alia estas kombini la gvidantojn kun la amasoj.
>
> Por formi korektajn ideojn de la gvidantoj koncentru la ideojn de la amasoj kaj tiam iru al la amasoj por persiste efektivigi ilin — tio estas la baza metodo de gvidado.

Subite klariĝis al li la okuloj. Li decidis mobilizi la gvidantajn kamaradojn de la Gubernia Partikomitato iri al la malriĉkamparanoj* kaj malsuperaj mezkamparanoj*. Li mem kutime loĝis en la kabanoj de maljunaj malriĉkamparanoj aŭ kaŭris en bovostaloj, kaj kune manĝis kaj laboris kun la amaso. Inter la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj li prezentis demandojn, aŭskultis respondojn kaj faris observojn. Li aŭdis iliajn voĉojn kaj vidis la revolucian spiriton de multaj produktaj brigadoj kiuj kontraŭbatalis la tri malutilaĵojn, sin apogante sur la propraj fortoj, kaj energie strebis al prospero. De la amasoj li lernis multe da rimedoj por bridi la sablon, inundon kaj salalkalon. La saĝeco de la amasoj ege lin kuraĝigis kaj plifirmigis lian fidon pri la venko super la katastrofoj.

La produkta grupo de Hancun konsistis nur el 27 familioj. En la aŭtuno de 1962 ĝi suferis

---

**Temas pri klasa aparteno difinita dum la agrara reformo.*

ruinigan pluvinundon kaj ĉiu persono ricevis el la rikolto nur iom pli ol unu ĝinon da spikoj de sorgo. Sed la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la produkta grupo proponis, ke oni ne akceptu helpon de la ŝtato en formo de greno aŭ mono. Ili diris, ke ili estas jam ĉagrenitaj pro tio ke ili ne povas subteni la ŝtaton, kiel ili povas permesi al si ankoraŭ ĝin ŝarĝi. Kaj en la vintro de tiu jaro, ili falĉis 270,000 ĝinojn da furaĝo, kaj per la gajnita mono ili vivtenis la membrojn de sia grupo kaj 8 brutojn. Krome ili riparis agrikulturajn instrumentojn kaj aĉetis 7 ĉarojn.

Post kiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ĝaŭduoloŭ rikoltis preskaŭ nenion dum sep sinsekvaj sezonoj, ili fosis sub torenta pluvo kanalojn kaj defluajn fosaĵojn por kontraŭbatali la pluvinundon kaŭzitan de pluvego. En la aŭtuno de 1963, malgraŭ naŭtaga seninterrompa pluvego, ili akiris bonan rikolton kaj vendis al la ŝtato 80,000 ĝinojn da greno.

La revolucia spirito de sinapogo sur la propraj fortoj de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en Hancun kaj Ĝaŭduoloŭ, kaj krome ankaŭ de tiuj en Kinĝaj kaj Ŝuangjangŝu treege kortuŝis Giaŭ Julu. Li pensis, ke tio estas bonaj ekzemploj de la revolucia spirito de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kulturataj de la penso de Maŭ Zedong.

En septembro de 1963, la Gubernia Partikomitato okazigis grandiozan kunvenon de la kadroj de la produktaj brigadoj kaj grupoj de la tuta gubernio. En la kunveno Giaŭ Julu invitis la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn de Hancun, Kinĝaj, Ĝaŭduoloŭ kaj Ŝuangjangŝu sur la podion kaj solene laŭdis ilian revolucian spiriton antaŭ la publiko. Li resumis iliajn revoluciajn agojn per kvar frazoj: "la spirito de Hancun, la decidemo de Kinĝaj, la energio de Ĝaŭduoloŭ kaj la vojo de Ŝuangjangŝu." Li diris, ke tio estas la nova vojo de Lankaŭ-gubernio, vojo montrita de la penso de Maŭ Zedong. Li alvokis la popolanojn de la tuta gubernio lerni de tiuj kvar modeloj kaj disvolvi en la tuta gubernio heroan luktadon kontraŭ la katastrofoj de pluvinundo, sablovento kaj salalkalo.

KIAM LA AMASO ESTAS EN MALFACILO

Estis iu vintra nokto, dum kiu furiozis senĉese neĝoŝtormo ekstere, kaj ankaŭ brilis la elektra lampo en la ĉambro de Giaŭ Julu la tutan nokton.

Tuj kiam lumo ekpenetris tra la fenestropapero la sekvintan matenon, li vokis ĉiujn kamaradojn en la tuta domo al kunveno. " Rigardu, kamaradoj, " li diris, " ĉiam pli densiĝas la neĝo. Kiom da malfacilaĵoj ĝi alportas al la popolamasoj! En la tempo kiam neĝego baras la pordon, ni devas iri inter la popolamasojn anstataŭ sidi apud forno en la oficejo. Komunistoj devas aperi antaŭ la popolamasoj kiam ili troviĝas en malfacilo, kaj prizorgi kaj helpi ilin kiam la popolamasoj plej urĝe bezonas helpon."

La lakonaj frazoj entranĉis en la koron de ĉiuj kamaradoj kvazaŭ gravurilo. Ili tuj disiris kun greno kaj mono.

Dense falis la neĝo, kaj akre siblis la norda vento. La neĝtavolo dikiĝis duonan futon. Tiutage Giaŭ Julu iris kontraŭ la neĝoŝtormo al naŭ vilaĝoj kaj vizitis dekojn da familioj de maljunaj malriĉkamparanoj. En Hjuloŭ, li eniris tra malalta pordo en kabanon, kie loĝis maljuna paro senida. La avo kuŝis malsana en lito, dum la avino estis blinda. Enirinte en la ĉambron, Giaŭ sidiĝis ĉe la lito kaj demandis pri ilia farto. La avo demandis, kiu li estas. Li respondis: "Mi estas via filo." La maljunulo demandis, pro kio

La popolo de Lankaŭ aktive sinfetas al la lukto por transformado de la naturo.



li venas dum la neĝoŝtormo. Li respondis: "Prezidanto Maŭ sendis min ĉi tien por vin viziti." La avino estis tiel emociita ke ŝi ne sciis kion diri, kaj per tremantaj manoj ŝi palpadis Giaŭ Julu. Kun larme malsekaj okuloj la avo diris: "Antaŭ la Liberiĝo, kiam la neĝo baris la pordon, la bienulo venis por eldevigi terrenton kaj mi estis devigita fuĝi sub alies tegmentorandon aŭ loĝi en alies bovostalo." Giaŭ Julu lin konsolis, dirante: "Nun la potenco estas en niaj manoj. La fizionomio de Lankaŭ nun suferanta naturajn katastrofojn kaj malriĉecon nepre ŝanĝiĝos tre baldaŭ."

SINFORGESO PRO LA POPOLO

Giaŭ Julu naskiĝis en familio de malriĉkamparano en Zibo-gubernio, Ŝandong-provinco. Lia patro sin pendigis antaŭ la Liberiĝo sub la subpremo de la kuomintangaj reakciuloj. De sia infanaĝo Giaŭ Julu malŝatmigris, paŝtis bovojn por bienulo, laboris kiel dungito kaj eĉ estis kaptita de la japana agresa armeo kaj sendita al Nordorienta Ĉinio por fosi karbon. Kun familia kaj klasa malamo li aliĝis al la revoluciaj vicoj. Li laboris en la bazaj organizoj de la armeo, en kamparo kaj fabrikoj. De kiam li aliĝis al la revolucio, ĝis li fariĝis Gubernia Partisekretario, li ĉiam konservis sian originan karakteron de laborulo. Li ĉiam laboris honeste inter la popolamasoj kaj vivis tre simple kaj modeste.

En la printempo de 1964, kiam venke antaŭeniris la lukto kontraŭ la pluvinundo, sablo kaj salalkalo fare de la popolanoj de Lankaŭ sub la gvido de la Partio, la hepata malsano de Giaŭ Julu fariĝis pli kaj pli serioza. Multaj rimarkis, ke ĉu ĉeestante kunvenon ĉu farante raporton, li ĉiam metis la dekstran piedon sur seĝon por premi la korpoparton de hepato. Pri sia malsano li neniam zorgis. Demandite de kamaradoj, li respondis, ke kontraŭ la hepata malsano li elpensis metodon de sendolorigo per premado. Kiam la kamaradoj de la Gubernia Partikomitato konsilis lin iri al kuracisto, li diris ridante: "Malsano estas io, kio arogantas al molulo, sed timas malmolulon. Se vi subpremas ĝin, ĝi ne arogantas plu." Efektive Giaŭ Julu tutkore sin ĵetis en la luktadon por transformi la fizionomion de Lankaŭ.

En marto 1964, kiam la luktado de la Lankaŭanoj kontraŭ la "tri malutilaĵoj" atingis sian kulminon, ankaŭ la hepata malsano de Giaŭ Julu atingis sian krizan momenton. Kvankam li kuŝis en lito, lia koro, tamen, flugis al la transformata tero. Kun plenkora entuziasmo, li sidiĝis ĉe tablo por skribi artikolon, kies titolo estis "La Popolo de Lankaŭ Herovola Ja Kuraĝas Krei Mondon Novan". Li etendis antaŭ si paperon kaj alskribis kvar subtitolojn. En la heroeco de la Lankaŭanoj manifestata en ilia luktado kontraŭ la katastrofoj kaj en ilia agema spirito — ties ĉiu paŝo postlasas piedsignon — Giaŭ Julu, kun koro plena

La lankaŭ-a popolo okazigas grandan kunvenon funebre al k-do Giaŭ Julu.



de revolucia optimismo, jam antaŭvidis la belan perspektivon de nova Lankaŭ. Sed la artikolo estis apenaŭ komencita, kiam la malsano devigis lin demeti sian plumon. La Gubernia Partikomitato decidis sendi lin al hospitalo.

En kioma grado li ne volis forlasi Lankaŭ! El la 149 produktaj brigadoj de la tuta gubernio li jam rondvizitis pli ol 120 dum la mallonga tempo de pli ol unu jaro. Li dediĉis sian tutan korpon kaj koron al la amasoj de Lankaŭ kaj ilia luktado. Kiom li esperis, ke la hepata malsano estos tre baldaŭ kuracita por ke li povu denove reveni kun refreŝigita energio kaj batali kune kun la amasoj!

Kiu atendis, ke la malsano forrabis de li la vivon je la 14-a de majo 1964. Bedaŭrinde, forpasis k-do Giaŭ Julu jam en sia 42-a jaro.



Kun larmoj malriĉ-kamparano de Lankaŭ rakontas pri kamarado Giaŭ Julu al gejunuloj.

Post la morto de Giaŭ Julu, laŭ la projekto, kiun li iniciatis kaj difinis antaŭ sia morto por elimini la tri malutilaĵojn kaj transformi la naturan fizionomion de Lankaŭ, la kompartianoj kaj la popolo de Lankaŭ jam unuapaŝe ŝanĝis ĝian naturan fizionomion post peniga laboro. Tiu ĉi gubernio, al kiu ĉiam mankis en la pasinteco greno, jam fariĝis unuapaŝe memsufiĉa en grenprovizado en 1965, kaj multaj produktaj brigadoj ekhavis rezervitan grenon. Lankaŭ estis senpluva dum 68 tagoj en 1965 kaj tie blovis ventego 72 fojojn de la vintro de 1964 ĝis la printempo de 1965, sed okazis neniu katastrofo de sablovento ruiniga por plantaĵoj, ĉar centoj kaj centoj da forstozonoj jam komencis bridi la sabloventon. En la aŭtuno de 1965 daŭra pluvado falis en kvanto de 384 milimetroj, sed neniu brigado estis inundita.

La artikolo, kiun Giaŭ Julu ne finskribis antaŭ sia morto, estas finita de la 360,000 popolanoj de Lankaŭ sur la tero de la gubernio. Ĝi estas artikolo impona kaj ĝojoplena, artikolo pri la venko super la naturo fare de la popolo per kolektiva forto.



La popolo de Lankaŭ havas bonan rikolton de kotono post la reformo de la salalkala tero.

ĜANG KINGĈUN:

Batalo sur Sabla Sovaĝejo



Plantado de arbidoj por ŝirmi kampojn kontraŭ ventoj kaj fiksi la sablon

ANTAŬE en la areo administrata de la Ĉanghangoŭa Produkta Brigado de la Nacifesta Komunumo ĉe la urbo Baŭtoŭ de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, ĉie estis montdeklivoj kaj ravinoj. Tie vegetaĵoj ne kreskis dum sekeco, kaj kota akvo ĉie kaĉis en pluvaj tagoj.

Kaj nun? Sur la montdeklivoj kanaletoj sin interligas, kaj teraskampoj kuŝas ŝtupare unu super alia. Sur la kampoj fluas klara akvo kaj grenplantoj kreskas prospere kaj vivplene.

De kie do venis ĉi tiu akvo? Jen estas ĝia historio.

LERNI DE DAĜAJ

En printempo de 1964 la komunumanoj de Ĉanghangoŭa Produkta Brigado informiĝis pri la heroaĵoj de Daĝaj-anoj, kiuj venkis la naturon per transformo de montoj kaj jungo de akvo, firme plenumante la principon donitan de Prezidanto Maŭ lukti penege kaj apogi sin sur la propraj fortoj. Tio montris al Ĉanghangoŭaj komunumanoj ke, por venki trosekecon kaj batalakiri abundan rikolton, oni nepre devas obeigi la subteran akvon al la homa volo en servo al la surdeklivaj kampoj.

Sekve komenciĝis arda batalo por preni akvon el sub la tero sub la gvido de la partia filio. La komunumanoj de la Gianŝujkjua Produkta Grupo elektis lokon por fosi puton. Ili pioĉis forte kaj fosis profunde. En 90 tagoj ili plenumis la laboron, por kiu oni ordinare bezonis 120 tagojn: estis finfarita la unua maŝin-ekipita puto, kiu liveras akvon al la kampoj sur la montoj. Akvo ŝprucis el la tubo kaj fluis al teraskampoj laŭ kanaleto je pli ol 1,000 metroj longa, tiel ke pli ol 100 muoj da surmontaj kampoj estas irigaciataj. Tiujare la tuta grupo havis abundan rikolton, kaj la enspezo de ĝiaj komunumanoj kreskis je triono pli ol tiu de la lasta jaro.

NENIAM DEPRIMEBLAJ

La komunumanoj de Ĉanghangoŭa Produkta Brigado estas nedeprimeblaj antaŭ malsukcesoj kaj kuraĝas batali ĝisfine kontraŭ malfaciloj.

La Maŭhudonga Produkta Grupo sub ĉi tiu brigado penege luktis 13 jarojn por fosi sinsekve 17 putojn. Ili bataladis jaron post jaro kaj fosis puton post puto. Sed, kiam la putoj estis finfositaj, oni trovis en ili aŭ neniom aŭ nur tre malmulte da akvo, kiu elĉerpiĝis baldaŭ.

Origine la vorto *maŭhudong* en la mongola lingvo signifas "putaĉon sen akvo". Dum la 13 jaroj, kvankam eluziĝis multaj pioĉoj kaj korboj, kaj frotvundiĝis multaj ŝultroj, tamen, ĝuste kiel ĝia vicgrupestro maljuna malriĉ-

kamparano diris: "Niaj piedoj estas jam alnajlitaj al ĉi tiu loko; ni nepre venigos akvon el sub la tero."

En la spirito de Malsaĝa Avo, kiu translokigis montojn, kaj sub la gvido de la partia filio, ili resumis siajn spertojn kaj lecionojn, atente esploris kaj analizis ĉiujn montetojn kaj ravinojn, la topografion kaj terstrukturon de la regiono administrata de la grupo, kaj fine trovis ĝustan lokon por fosi puton.

Pli malmola ol ŝtalo estis la volo de la komunumanoj! Ili diris: "Montoj falos kaj la tero fendiĝos, se nur la homoj havos senliman pacienconkaj grandan energion."

Kun revoluciaj pacienco kaj energio la komunumanoj de Maŭhudong-grupo sukcese fosis sian dekokan puton. Kaj ĝuste per ĉi tiu puto ili trovis abundan subteran akvon en Maŭhudong, loko de "putaĉo sen akvo". Dank' al tio la grenaj plantidoj en la kampoj eklevis siajn kapojn kaj la revolucia laborenergio de la komunumanoj fariĝis ankoraŭ pli granda.

NENIAM MEMKONTENTAJ

La komunumanoj de Ĉanghangoŭa Produkta Brigado havas ankaŭ la spiriton konduki la revolucion ĝis la fino kaj neniam esti memkontentaj pro iaj malgrandaj atingoj.

Jam en la periodo de interhelpa grupo la Mez-Ĉanghangoŭa partia filio jam gvidis la amason konstrui kanaleton je 500 metroj longan, kiu formis duoncirklon ĉirkaŭ malgranda montpinto. Per ĉi tiu kanaleto oni irigaciis dekojn da muoj da kampoj. Nun la komunumanoj ekpensis, ĉu ne estos pli bone, se ili trahakos la monton por alkonduki akvon kaj ke la inundo ne difektu ĉiujare la kanaletojn kaj la riparadoj ne estu plu bezonataj.

Sed monthakado ja ne estas afero facila! Tamen la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj diris: "Se ni volas jungi la akvon, ni devas nepre jungi ĝin komplete!"

La batalo por monthakado kaj akvo-alkonduko gvidata de la partia filio altiris al si ĉiujn komunumanojn de la grupo. Kiel la maljunaj de sesdek aŭ sepdek jaroj tiel ankaŭ la junaj de dekok-deknaŭ jaroj ĉiuj senescepte jetis sin en la konstruadon. Kun entuziasmo ili okupiĝis pri truofarado kaj enmeto de eksplodaĵo kaj prajmoj. Kaj antaŭ ol la vintro finiĝis, ili jam faris laboron de 50,000 kubmetroj da tero kaj ŝtonoj, trahakis monton kaj finkonstruis akvokondukan tunelon longan je 130 metroj, kiu ebligas la fluon de akvo ĉirkaŭ la tuta monto, tiel ke la teraskampoj sur la monto estas tute irigaciataj.

La Ĉanghangoŭa Produkta Brigado, kiu antaŭe havis nur kampojn, sed neniom da akvo, kaj timis tiel trosekecon kiel pluvinundon, nun jam posedas 1,700 muojn da kampoj, kies stabila kaj alta produkto estas garantiata same dum trosekeco kaj pluvinundo; kaj rezulte de tio la grena produkto pliiĝas kun ĉiu jaro. Nun ĉi tiu brigado marŝas antaŭen en la direkto al konstruado de teraskampoj kaj kanalreto. El siaj propraj travivaĵoj la komunumanoj eltiris la jenan sperton: timinda ne estas la sterileco de la kampoj, sed la malkuraĝo de la homoj; kaj oni devas sin apogi ne al la naturo, sed al siaj propraj fortoj.



Plantado de herboj por fiksi la sablon




Sablejo antaŭe sed grenejo nuntempe

Sur sablejo aperis verda legomĝardeno.



Interna Mongolio en Prospero



Grasaj ŝafoj kaj bovoj sur la herboriĉa stepo

La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio fondiĝis en 1947. Dum la pasintaj deknaŭ jaroj, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, ĝia popolo akiris grandegajn sukcesojn en la demokratia revolucio, socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. En la pasinteco, "Interna Mongolio" estis vasta spaco de stepo en la imago de multaj, sed nun ĝi fariĝis jam ekonomie tre prospera regiono de nacimalplimulto. Ĝia brutbredado donis en sinsekvaj jaroj abundajn rikoltojn. Kaj grandan disvolvon havis ĝiaj akvoutiligaj konstruoj en kamparoj kaj paŝtejoj. Kelkaj branĉoj de moderna industrio, kiuj tute ne ekzistis antaŭe en la regiono, estas nun rapide disvolvitaj. Duonkultiva-duonler-








La ĝojo de liberigitaj paŝtistoj


naj kaj duonpaŝta-duonlernaj lernejoj estas ĉiam pli vaste starigataj en diversaj lokoj. La popolo de Interna Mongolio brave marŝas antaŭen sur la vojo de konstruado de socialisma Interna Mongolio.



Prezentado de vojaĝanta ensemblo por paŝtistoj



Okupateco post riĉa rikolto (ĉe produkta brigado de Dangpudi-komunumo, Ĉifeng-gubernio)





Baŭtoŭ-a Ferŝtala Uzino en Interna Mongolio



La rondira vendoĉaro venas al mongolaj tendodomoj

Subteno al la konstruo de la lando per ligno






Viandokombinumo sur stepo

La Suda Lago

ZIŠI

LA Suda Lago, fama pro sia bela pejzaĝo, estas unu el la pitoreskejoj en la sudo de Jangzi-rivero. Sed, ĝi tiras al si multe da vizitantoj precipe pro tio, ke ĝi estas memorinda loko de la ĉina popola revolucio, kie la Komunista Partio de Ĉinio okazigis sian Unuan Tutlandan Kongreson kaj oficiale deklaris sian fondiĝon.

La 1-an de julio 1921, estis kunvokita en Ŝanhajo la Unua Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio. Ĝin ĉeestis Maŭ Zedong, Dong Bivu, Ĉen Tankiu k. a., entute 12 kamaradoj, kiuj reprezentis pli ol 50 membrojn en Ĉinio. Dum la irado de la kunveno oni rimarkis malamikojn en ĉirkaŭaĵo de la kunvenejo. Por eviti ilin oni decidis iri al la Suda Lago kaj daŭrigis tie la kunvenon sur boato kaj fine plenumis la lastan punkton de la tuta tagordo — la fondiĝon de la Komunista Partio de Ĉinio. Kamarado Maŭ Zedong iam diris la faman frazon: "Malgrandaj fajreroj povas bruligi tutan stepon." La Suda Lago estas la loko, kie la ĉina popolo ekbruligis la revoluciajn fajrerojn. Elirinte de tie, la Komunista Partio de Ĉinio gvidis la ĉinan




La revolucio-memoriga boato (reproduktita laŭ tiu, en kiu okazis la Unua Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio) sur la Suda Lago

popolon entrepreni la grandan revolucion senprecedencan en la historio, fine faligis la malamikojn de la popolo, akiris la grandan venkon de la revolucio kaj fondis la Ĉinan Popolan Respublikon.


La Suda Lago situas sude de la urbo Giahing, Ĝegiang-provinco, kaj sin dividas en du partojn, la orientan kaj okcidentan, kun totala akvosurfaco de pli ol 5000 aroj. Jam en la deka jarcento estis konstruita ĉe ĝi la pavilono *Janju Loŭ*. Ĉirkaŭ ĝi estas longa surakva aleo. Tie kaj ĉi tie staras kioskoj. De *Janju Loŭ* oni povas okule ĉirkaŭpreni la tutan pejzaĝon de la lago, kie ankaŭ sin trovas multe da famaj kaj antikvaj vidindaĵoj. En *Janju Loŭ* sin trovas ankaŭ skribaĵo de D-ro Sun Jatsen, granda pioniro de la demokratia revolucio en la moderna historio de Ĉinio.

Post la Liberiĝo, la Suda Lago jam metis sur sin novan kostumon. Nun tie troviĝas nove fondita revolucia muzeo, en kiu estas ekspozataj revoluciaj memoraĵoj, kaj kopio de la boato, en kiu oni siatempe kunvenis, estas imite reproduktita laŭ la originalo kaj videbla sur la lago. La lokon vizitas ĉiujare multaj fremdlandaj amikoj kaj ankoraŭ pli ofte frekventas enlandaj vizitantoj el diversaj lokoj. Tie oni povas vidi ke kvankam la justa afero de la popola revolucio komenciĝas per malgrandaj "fajreroj", tamen ili fine bruligos la tutan stepon kaj akiros la finan venkon!



La interno de la boato

La pavilono Janju Loŭ




Historiaj Objektoj kaj Materialoj pri Pariza Komunumo Ekspoziciitaj en Ĉinio

KUN granda respekto ĉinaj popolanoj vizitis la Ekspozicion de Historiaj Objektoj kaj Materialoj pri Pariza Komunumo, kiu estis malfermita al publiko de la 30-a de marto ĝis 13-a de aprilo, ĉi-jare en la ĉefurbo.

La ekspozicion aranĝis la Ĉina Popola Asocio de Kulturaj Rilatoj kaj Amikeco kun Fremdaj Landoj.

Preskaŭ 400 eroj de historiaj objektoj kaj materialoj pri Pariza Komunumo estis ekspoziciataj en kvin fakoj, nome: "Armita Leviĝo"; "Diktaturo de la Proletaro"; "Sanga Batalo"; "Spirito de Internaciismo"; kaj "Vivu la Principoj de la Revolucio". En la antaŭparolo de la ekspozicio estis jenaj vortoj de Karl Marks: "La laborista Parizo kaj ĝia Komunumo estos por ĉiam respektataj kiel brila avangardo de la nova socio. La memoro pri ĝiaj martiroj jam gravuriĝis por ĉiam en la granda koro de la laboristaro".

La pentraĵoj en la ekspozicio altiris al si la atenton de vizitantoj. La pentristoj plenaj je entuziasmo laŭdis la sangan bataladon de la parizaj proletoj kontraŭ trupoj de Thiers, ĉefo de la tiama perfida registaro de Francio, post la armita leviĝo en la 18-a de marto 1871, kaj la kortuŝan scenon de aklamado al la fondiĝo de la unua proleta reĝimo en la homa historio fare de la batalantoj kun alte levitaj pafiloj. Oni vidis en la ekspozicio bronzan insignon kun skribo de *Republique des Communes* (Respubliko de Komunumo), arĝentajn



Ges-roj S. G. Hutchins kaj Ĉu Tunan, prezidanto de la Ĉina Popola Asocio de Kulturaj Rilatoj kaj Amikeco kun Fremdaj Landoj, en la Ekspozicio de Historiaj Objektoj kaj Materialoj pri Pariza Komunumo en Pekino

monerojn fabrikitajn post la fondiĝo de la Komunumo, sabron uzitan de komunumano, kontolibron de iu roto de la nacia gvardio kaj gazetojn kun informoj pri diversaj agadoj de la Komunumo ktp.

Estis pentraĵoj kaj bildoj kiuj prezentis la heroajn vivmortajn batalojn de la komunumaj batalantoj kontraŭ la versajlaj banditoj en la lasta semajno de la ekzistado de la Komunumo. Inter la ekspozaĵoj estis ankaŭ bildo de la fama "Muro de Komunumanoj", ĉe kiu la lasta taĉmento tiam decideme rezistis kaj heroe viktimiĝis senescepte. Oni turnis rigardon kun estimo al la portreto de Louise Michel, heroino de la Komunumo, kiu diris kun levita kapo al la juĝistoj post la falo de la Komunumo: "... Mi sentas min fiera pro tio ke mi partoprenis en la fondo de la Komunumo. Se vi lasos min viva, mi absolute ne ĉesos voki al venĝo!" Ĉiuj ĉi ekspozaĵoj faris sur la vizitantojn profundan impreson. Oni vidis tie la disvolviĝon de la Pariza Komunumo, plenan de vivmorta luktado inter la proletaro kaj burĝaro, revoluciuloj kaj kontraŭrevoluciuloj.

"La principoj de la Komunumo estas eternaj..." Tio estas la granda antaŭdiro farita de Karl Marks antaŭ 95 jaroj. En la ekspozejo montriĝis faksimilo de la protokolo pri lia parolado farita en 1871, en la Ĝenerala Komitato de la Unua Internacio. La supra diraĵo de Marks estas notita en la protokolo. Oni vidis tie ankaŭ faksimilon de la manuskripto de la muziko por la "Internacio" kaj multajn librojn, periodaĵojn, poŝtmarkojn ktp., per kiuj diverslandaj proletaj batalantoj salutis la naskiĝon de la Pariza Komunumo kaj prikantis ĝiajn principojn.



Kelkaj ĵurnaloj eldonataj dum la tempo de la Pariza Komunumo

La historiaj objektoj kaj materialoj ekspozitaj estas kolektitaj de niaj anglaj geamikoj S. G. Hutchins kaj lia edzino. Hutchins heredis de sia patro nombron da historiaj objektoj kaj materialoj pri la Komunumo kaj li mem komencis kolekti jam de la tempo kiam li estis 15-jara. Por kolekti pli multan materialon, la geedzoj Hutchins plurfoje vizitis Parizon. Ĉe la inaŭguro de la ekspozicio, ili estis invititaj al Ĉinio kaj ankaŭ vizitis la ekspozicion. Kiam la blankhara Hutchins vidis ke tiom da ĉinaj vizitantoj svarmas en la ekspoza halo, li estis ekstreme kortuŝita ĝis larmo.

* * *

Armitaj komunumanoj ĉe barikado



Pentraĵrecenzo per Sojgrajno

HONG LU

UZI sojgrajnon kiel voĉdonilon estas bona metodo aplikita de la popolo en tiamaj malnovaj liberigitaj regionoj por fari demokratian balotadon. "Sojgrajna baloto" estas simpla kaj facile aplikebla procedo, kiu povas sufiĉe bone speguli la volon de la amaso. Antaŭ nelonge, per tiu sama metodo, la Hebeja Filio de la Unio de Ĉinaj Artistoj petis la opiniojn de laboristoj kaj kamparanoj en Baŭding pri la nove verkitaj novjaraj bildoj de kelkaj pentristoj. Tie oni disdonis po du sojgrajnojn al la rigardantoj por ke ili balote elektu du plej ŝatatajn de si pentraĵojn.

La rezulto de la voĉdono estis ege surpriza por la pentristoj. "Floras la Heliantoj", kiu estis pentraĵo sufiĉe admirata de iuj pentristoj kiel verko bonstila kaj eleganta, ricevis neniun sojgrajnon por si ĉe la amaso. Male, la pentraĵo de la amatoro-kamparano Vang Zihong "Post Abunda Rikolto", kiun iuj pentristoj trovis tro vulgara, plaĉis al la popolamaso kaj ricevis plej multe da sojgrajnoj. La popolamaso diris: "Ĝi estas bonega, ĝi prezentas nian ĝojon pri abunda rikolto". Farinte dufojan rondrigardadon en la ekspozicio, maljuna bredisto donis siajn du sojgrajnojn por la pentraĵo "Post Abunda Rikolto".

Iu pentristo kreis pentraĵon titolitan: "La Partisekretario Akompanas Min Hejmen" kaj urĝeme sendis ĝin al la ekspozicio pensante, ke la popolamaso certe ĝin ŝatos. Sed, ĉar mankis al la pentristo la vivsperto de la amaso, la temo ne estis bone esprimita, rezulte, li gajnis nur unu grajnon. Poste li sin mokis ŝerce: "Pentraĵo mia valoras unu sojgrajnon."

La pentraĵrecenzo per "sojgrajna baloto" forte skuis la pentristojn en la penso. Hejmen reveninte ili foje kaj refoje cerbumis pri la problemo: Kial la popolamaso ne ŝatas la pentraĵojn, kiujn ili mem ŝatas? Kaj kial ili subtaksas la pentraĵon, kiun ŝatas la popolamaso? Iom post iom, ili trovis la artisman distancon inter ili mem kaj la laboristoj kaj kamparanoj kaj faris decidon en si ami kion la popolamaso amas kaj malami kion la popolamaso malamas.

KURANTAJ AFEROJ

En Konstruado

ALTEBENAĴAJ METEOROLOGIAJ STACIOJ — Sur la altebenaĵo de Kinghaj-Tibeto en Ĉinio, mankis antaŭ la Liberiĝo meteorologia stacio. Nun, en ĉiuj ses aŭtonomaj subprovincoj de Kinghaj establiĝis tiaj stacioj, kaj en ĉiuj gubernioj meteorologiaj observejoj, ĉu en la maldense loĝata stepo en norda Tibeto, ĉu en la monto-regiono de Himalajo. Kaj tiel oni plibonigis la laboron de veterinformado en la regiono de Kinghaj-Tibeto, kiu ludas gravan rolon en disvolvo de la loka agrokulturo kaj bestobredado.

* * *

12,000-TRUA ŜPRUCIGILO — Tiu grava maŝinparto por farado de artefarita kotono jam estas nun produktata en Ŝanhajo. Sur la ŝpruciga beko (el AuPt) kiu havas grandecon de ordinara taso-aperturo, devas esti alfaritaj 12,000 truoj. Ĉiu truo estas tiel eta ke eĉ haro ne estas traigebla. Ĝi estas sukcese farita de 17 junaj laboristinoj kun mezaĝo de malpli ol 22 jaroj.

* * *

25-TUNA MEMMALŜARĜANTA KAMIONO – Ĝi estas produktita de la Gigiang-a Dentrada Fabriko, Ĉongking, en kunlaboro kun pli ol 60 fabrikoj en Ŝanhajo kaj aliaj lokoj. Tiu ŝarĝaŭto portas la komercan nomon "Ruĝa Roko". Ĝi kuras pli rapide, sin turnas pli facile, kaj estas ŝarĝata kaj malŝarĝata pli glate, kaj konsumas oleon malpli multe ol aliaj samtipaj aŭtoj kiujn ni importis en la pasinteco.

* * *

VUĈANG-FIŜO — Tiu fiŝo vivanta en sensala akvo, latine nomata *megalobrama amblycephala*, ricevis sian nomon el tiu fakto, ke ĝi produktiĝis en la pasinteco nur en lagoj en Vuĉang kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Ĝi havas sufiĉe bongustan viandon kaj sin nutras per herboj. Oni povas ĝin facile bredi. Cetere ĝi maturiĝas rapide kaj estas tre vivipova. Ĝia bredperiodo estas mallonga. La fiŝidoj longaj je 3 aŭ 4 coloj povas atingi pezon de ĉ. duonkilogramo post dekmonata bredado. Por disvastigi ĝian bredadon, la Hidrobiologia Instituto de Ĉina Akademio de Sciencoj en Vuhan jam sukcesis en siaj studoj kaj eksperimentaj laboroj.

Heroaj Gefiloj de Suda Vjetnamio



La komandaj personoj de iu trupo de la Liberiga Armeo de suda Vjetnamio post la batalo de Bau Bang resumas sian batalan sperton.

de Delegacio de Ĉinaj Ĵurnalistoj

KIAM informoj pri venkoj akiritaj de la armeo kaj popolo de suda Vjetnamio atingis nin unu post alia, dum nia vizitado al la batalkampoj de suda Vjetnamio, ni ĝoje jubilis kaj festis kun ili tiujn venkojn. Ja ne facile estis gajnitaj tiuj venkoj, pro kiuj milionoj da heroaj gefiloj de suda Vjetnamio devis penege labori, oferi ŝviton kaj sangon kaj uzi siajn tutajn forton kaj saĝon.

Virina transporta taĉmento



TRIUMFOKANTO DE HEROAJ TRUPOJ

Dum la vizitado, ni pasigis multajn neforgeseblajn tagojn kun la batalantoj de la Liberiga Armeo de suda Vjetnamio. Ni aŭdis ilian revolucian heroismon kaj vidis ilian nevenkeblan kaj nerezisteblan forton.

Baldaŭ post kiam la Liberiga Armeo ekstermis en la regiono de Bau Bang pli ol du mil personojn de la Unua Infanteria Divizio de la usona agresa armeo je la 12-a de novembro en la pasinta jaro, ni rapidis al la kantonmento de unu el la heroaj trupoj partoprenintaj tiun ĉi batalon.

Apud rivereto en arbaro, la komandantoj kaj politikaj laborantoj de tiu trupo tiam ĝuste faris sablan modelon de la batalejo por resumi la sperton de la batalo de Bau Bang, en kiu ili ekstermis pli ol 2,000 personojn de la "atuta" trupo de Usono en tri mallongaj horoj. Montrante la modelon, la komandanto diris al ni: "Ĉifoja eksterma batalo estis plenumita de niaj homoj tre kuraĝe kaj tre sagace. La malamikoj tranoktis en kaŭĉukarbaro; eĉ en dormo ili ne songis, ke ni tiel rapide alvenus. En dekkelkaj minutoj post la ekatako, la malamika komandejo jam estis tute detruita. Niaj


batalantoj ĉiuj luktis kun granda kuraĝo kaj braveco, precipe la plotono, kiu la unua faris ofensivon, montris sin kaj firma kaj decidema."

Post la komenciĝo de la batalo, la pli ol dek malamikaj batalĉaroj gardantaj ĉirkaŭ la tranoktejo urĝeme almoviĝis por helpi kaj intense ekpafegis. Ankaŭ la usonaj infanterianoj vekiĝis kaj salte leviĝis por rezisti per ĉiuj disponataj armiloj. Sub la ŝirmo de kaŭĉukarboj niaj batalantoj detruis batalĉarojn de la malamiko kaj mortigis kaj vundis malamikojn per manminoj kaj mitraletoj. La kontraŭtanka kanonisto Go Lien detruis unu malamikan tankon, sed mem estis grave vundita de obusfragmento je la brusto, tamen li daŭre persistadis brave en intensa kanonado kontraŭ la malamikoj. La kanonfajro de la malamikoj ekbruligis la kaŭĉukarbojn kaj herbaron. En la fajra maro, niaj batalantoj firme tenis la malamikojn en intensa batalado ĝis la lasta minuto, kiam subite bruegis forta eksplodo post la dorso de la malamikoj. Jen frata trupo jam ensturmis en la malamikan komandejon. Ĉe tio la malamikoj ŝanceliĝis. La plotonestro Nguyen Ba, serioze vundita je la brusto, tuj levis la mitraleton, kriante: "Kamaradoj, firme retenu ilin, jam venas la tempo por fari meritan servon al la popolo!" Kaj li sturmis en la fronto al la malamikoj. Tiel lia plotono trabatis vojon al venko de la tuta batalo.

MERITOJ DE GERILA TAĈMENTESTRINO

En iu gubernio de la provinco Quang Nam, kiu situas apud maro en la meza parto, ni vizitis taĉmentestrinon Go Tam. Tiu famekonata gerila batalantino ja estas vilaĝa knabino en aĝo de pli ol dudek jaroj, kun malalta kaj maldika staturo kaj bruna haŭto. Kaŭrante sur la tero ŝi diskutis kun siaj gegerilanoj pri

La malgranda heroo Go Tap





Heroaj virinoj de suda Vjetnamio

la batal-plano kontraŭ la grenrabado farota de la malamiko. Ŝi diris: "Baldaŭ maturiĝos la rizo, vi ĉiuj devas tuj mobilizi la samlokanojn prepari sin por batalo kaj ne lasi la malamikon forrabi eĉ unu grajnon." Kiam ni vizitis ŝin, al ni ŝi rakontis pri brilaj venkoj de la gerilaj trupoj de la gubernio en la batalo kontraŭ la usonaj agresantoj kaj pri la konstanta disvastiĝo kaj firmiĝo de la liberigita regiono de tiu ĉi gubernio, disetendita rekte sub la nazon de la malamiko, tamen, ŝi ne rakontis pri siaj propraj heroaĵoj, kiuj estas plenaj de braveco kaj sagaco kaj vaste konataj inter la tieaj popolanoj. Post sia gerilaniĝo, ŝi jam partoprenis dekojn da bataloj kaj mortigis kaj vundis multe da malamikoj. Foje, ŝi embuskis apud ŝoseo kun kelkaj gerilaninoj. Baldaŭ poste venis de Da Nang unu usona ĵipo. Ŝi mortigis la veturigiston per unu pafo, kaj la du usonaj "konsilistoj" sur la ĵipo tuj levis siajn manojn kapitulace.

TRAVIVAĴO DE MALGRANDA HEROO

En apudmara fiŝista vilaĝo de la provinco Quang Ngai, en la meza parto, ni vizitis ankaŭ la heroeton Go Tap. Kiam ni trapasis la zonon de kaptfosaĵoj kaj minoj kaj eniris la batalvilaĝon, la vilaĝa respondeculo de la Naciliberiga Fronto montris la marbordon ekster la vilaĝo kaj diris intime: "Jen la etulo gardostaras tie." La heroeton ni trovis en unupersona ŝirmejo sub kokosarbo. Li ja estas graseta knabo 15-jara, kun usona karabeno sur sia dorso.

La knabo kreskis en sanga uragano de masakrado fare de la uson-pupa kliko. Lia patro estis vilaĝa funkciulo dum la Kontraŭfranca Rezistmilito kaj kruele murdita de la usonaj agresantoj kaj pupaj armeanoj. Kaj la patrino donis lin, 8-jaran knabon, al la gerilanoj. Go Tap kreskis sub ilia flegado, kaj en sia deka jaro li jam fariĝis lerta rekognoskisto*. Li ofte kondukis gerilanojn enpenetri en punktojn tenatajn de malamikoj kaj embuski apud ŝoseo, kaj portis leterojn por gerilanoj. Foje, li ŝtele

metis en kaldronon de la malamiko unu grenadon, kiu eksplodis kiam la malamiko demetis la kovrilon. Fininte la rakonton pri sia bravaĵo, la heroeto diris al ni en firma tono: "Ni nepre ekstermos la usonajn rabistojn por venĝi niajn gepatrojn kaj ankaŭ por venĝi la amiketojn en la mondo, kies gepatroj estis mortigitaj de la usonaj rabistoj."

MODELA VILAĜO EN SUBTENO AL LA FRONTO

Sur la ebenejo Thap Muoi ni vizitis la famekonatan modelan vilaĝon en subteno al la fronto. Proksimiĝinte al la vilaĝo, ni tuj vidis, ke ĉiuj vilaĝanoj energie kaj fervorege faras militajn preparojn por la venonta seka sezono. Ĉirkaŭ la vilaĝo multaj virinoj, maljunuloj kaj infanoj riparas tranĉeojn, ŝirmejojn kaj kaptfosaĵojn difektitajn dum la pluva sezono, enterigas minojn, kaj starigas bambuajn pikilojn por kontraŭbatali "balaajn manovrojn" de la malamiko. Sur libera placo multaj junuloj faras brankardojn kaj portvektojn, kiujn ili uzos sur la fronto por helpi la Liberigan Armeon.

En majo de la pasinta jaro, kiam pluva sezono jam komenciĝis kaj pluvego senĉese faladis, la rivero ŝvelis alte. Iunokte, eksonis abrupte densaj pafoj, kaj incendio alte leviĝis el la malamika fortikigita punkto en la proksimeco. Tiutempe, al la vilaĝo venis granda trupo da liberigaj armeanoj kiuj petis helpon de la vilaĝanoj por transpasi la riveron kaj bari la forkurantajn malamikojn. Sed, en la vilaĝo pramoj ne sufiĉis, do la transportado bezonus multe da tempo. Ĝuste en ĉi urĝa momento, sin ĵetis en la riveron multaj gejunuloj kaj eĉ kelkaj maljunuloj, kiuj kunligis sep pramojn en unu linion por formi naĝantan ponton. Spite al pluvego kaj torento, ili tenis la naĝantan ponton per siaj ŝultroj kaj korpoj. Tre emociite, la liberigaj armeanoj flugrapide trapasis la ponton kaj sturmis al la bruleganta malamika punkto.

La grandaj venkoj en bataloj por savi la patrion kontraŭ la usonaj agresantoj estas komune akiritaj de milionoj da heroaj sudvjetnamiaj gefiloj. Ili estas ankaŭ brilaj venkoj de la popola milito de suda Vjetnamio!

(mallongigite)

---

* *rekognoski — esplori kaj informiĝi militcele.*

La Usonaj Banditoj Ne Povas Nei Sian Krimon de Milit-provoko

LA 12-an de majo, je 17 minutoj post la 16a horo, kvin usonaj batalaviadiloj entrudiĝis en la aeran spacon de Ĉinio super la nordorienta parto de Maguan, Junnan-provinco, faris surprizatakon kaj faligis per misilo* unu ĉinan aviadilon estantan en trejnado. Tio estas militprovoko kontraŭ la ĉina popolo, longe intencita kaj laŭplane farita de la usona imperiismo. La ĉina popolo havas senkomparan indignon kontraŭ tiu krimago de la usonaj banditoj! Parolanto de la Ministerio de Nacia Defendo de Ĉinio tuj en la sama tago severe riproĉis en deklaro la senhontan krimagon de la usonaj banditoj kaj faris plej fortan proteston kontraŭ la usona registaro.


Lastatempe, dum la freneza plivastigo de sia agresa milito en Vjetnamio, la usona imperiismo malkaŝe deklaris Ĉinion kiel sian ĉefan malamikon, ege kriaĉante ke "ekzistas kompreneble riskoj de milito kontraŭ Ĉinio". Ĝuste en tiu tempo, okazis la serioza afero de entrudiĝo en la ĉinan teritorian aeron kaj surprizatako kontraŭ ĉina aviadilo fare de usonaj aviadiloj. Tio absolute ne estas hazarda aŭ izola afero, sed estas laŭplane kaj laŭcele farita de Johnson-registaro. Ĝi estas serioza paŝo, kiun la usona imperiismo faris por etendi plue sian agresan militon kontraŭ Vjetnamio en Ĉinion.

Post tiu serioza okazaĵo de milita provoko, la usonaj oficialaj rondoj en Vaŝingtono kaj Sajgono ne kuraĝis aŭdigi sian voĉon. Nur post kiam la Ĉina Registaro elmetis la fortan proteston, ili komencis elpaŝi en hasteco por publikigi parolojn kaj fabriki mensogojn por malkonfesi kaj forpuŝi sian respondecon de krimo. Sed,

fakto restas fakto. Tre multaj krimatestoj ekzistas kaj ne estas neigeblaj. Nun estas la tempo por la popolo de la mondo fari verdikton kontraŭ Vaŝingtono. La restaĵo de uzita misilo kaj sep helpaj oleujoj, kiujn forĵetis la usonaj aviadiloj dum sia ŝtelatako en la ĉina teritoria aero, ĉiuj falis en la nordorienta parto de Maguan, Junnan-provinco, Ĉinio. Kaj sur la oleujoj estas fabrikmarko kun la vortoj "Fabrikita de Sergent-Fletcher Kompanio, El Monte, Kalifornio". La fera fakto permesas nenian malkonfeson!

Kontraŭ la intrigo de la usona imperiismo plivastigi la agresan militon, la parolanto de la Ministerio de Nacia Defendo de Ĉinio jam serioze montris: "La ĉina popolo kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo estas jam delonge sinpreparintaj. La usona imperiismo nepre pagos pro sia sanga ŝuldo al la ĉina popolo". Kion la ĉina popolo diras, ĝi plenumos. Se la usona imperiismo aŭdacos trudi sian agresan militon al la ĉina popolo, la ĉina popolo certe batalos ĝis la fino. Kiam eksplodos la milito, ĝi ne havos limojn kaj la usonaj agresantoj ne povos eviti sian sorton esti ĝisfunde, senescepte kaj komplete ekstermitaj.

**Misilo — stirata ĵetarmilo.*



La restaĵo de la misilo elĵetita de la usona aviadilo (supre maldekstre)

La helpa oleujo defaligita de la usona aviadilo en la nordorienta parto de Maguan-gubernio, Junnan-provinco, Ĉinio (supre dekstre)

La fabrik-marko sur la oleujo de la usona batalaviadilo de tipo F-4C. Interalie estas indikite (en Esperanta traduko):

Fabrikita de Sergent-Fletcher Kompanio, El Monte, Kalifornio

Kapacito—370 galjonoj

Pezo malplena—294 funtoj



Heroaj gvardianoj gardas la limon de la patrolando en neĝo kaj glacio.

Ruĝa Landlima Gvardio sur Altebenaĵo

HIAŬ GING

INTER la glaciaj, neĝkovritaj Himalajaj montoj troviĝas monto nomata Ĉakala, kie kreskas prospere floroj, populare nomataj neĝ-lotusoj, kiuj sentime pompas en malvarmega vento, glacio kaj neĝo. Vidante ilin oni nature ekpensas pri la landlima gvardio de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, tie gardanta.

PRENI NEĜMONTON KIEL SIAN HEJMON

En 1961, landlima gvardio instaliĝis sur Ĉakala, kie regas malvarmego kaj serioze mankas oksigeno. Tiam domoj tute mankis sur ĉi tiu neĝmonto, alta je pli ol 5,000 metroj super la marnivelo, tial la gvardianoj povis loĝi nur en tendoj. Ĉu ili povos tie ekvivi kaj enradikiĝi, tio ja estis rigora provo por ili. Sed la batalantoj, armitaj per la penso de Maŭ Zedong, donis firman respondon: "Penado por ni — feliĉo por la popolo!" "Se ne ni gardos ĉi tie, kiuj do?"

Por fikse loĝi sur la neĝmonto, ili devis ŝanĝi la lokajn kondiĉojn. Ĉar akvo mankis sur la monto, la gvardianoj do ĉie ĝin serĉis kaj fine trovis fonteton en kavo tiel malgranda kiel pugno, el kiu akvo murmure elfluis. Ili hakis la monton kaj fosis la teron, kaj fine, post pluraj malvenkoj, sukcesis konstrui du akvokonservajn lagetojn. Pro manko de konstrumaterialoj por fortikaĵoj kaj kazerno, ili do iris de sur la monto por elbati (nebakitajn) terbrikojn. Ĉar la vetero estis tro malvarma, la ĵus akve miksita tero tuj glaciiĝis kiam frosta vento sur ĝin ekblovis. Sekve la gvardianoj demetis siajn ŝuojn kaj ŝtrumpetojn kaj komencis piede knedi la teron. Kaj baldaŭ poste sur ĉi tiu alta neĝmonto finfine aperis la unua vico da kavernoĉambroj, la unua loĝdomo, la unua manĝejo, la unua klubejo kaj plie eĉ la unua ludejo de korbopilko.

VIGLATENTE GARDI LA LANDLIMON

Fruprintempe, la gvardio unuafoje plenumis sian taskon de nokta gardstaro. La frosta vento trapenetris

la peltajn paltojn kaj botojn de la gardostarantoj. La rigora naturo estis provanta la batalantojn.

Prezidanto Maŭ diris: "Kio estas laboro? Laboro estas batalo. Estas lokoj, kie troviĝas malfaciloj kaj problemoj, kaj estas bezono ke ni iru solvi ilin. Ni ja iras tien labori kaj batali por solvi la malfacilojn. Nur tiuj, kiuj des pli preferas iri al la loko, kie troviĝas ju pli grandaj malfaciloj, estas bonaj kamaradoj." La batalantoj ĉiam studas la verkojn de Prezidanto Maŭ, sekvas liajn vortojn kaj laboras laŭ liaj instrukcioj por esti liaj bonaj batatantoj. Reveninte en siajn tendojn, ili diskutis kun la kadroj la demandon, kiel oni traktu la novajn malfacilojn. Ili parolis pri la batalantoj de la Ruĝa Armeo dum la Longa Marŝo, kiuj, siatempe, pro la afero de la liberigo de la ĉina popolo, transgrimpis neĝmontojn kaj trapasis marĉostepojn spite al malsato kaj malvarmo, kaj pri la kamaradoj, kiuj, siatempe, estis ĵetitaj en malliberejojn de la malamiko kaj maltimis la kruelegajn torturojn tute neflekseble. . . kaj ĉiuj eksentis kuraĝon en si kaj konkure petis plenumi la plej malfacilajn taskojn.

Antaŭ ĉio la superaj instancoj tre zorgis politike la batalantojn de la gvardio, elstarigante la politikon kaj levante ilian klasan konscion, krome ankaŭ tre



La landlimaj gvardianoj forigas neĝamasojn el la trancéo.

zorgis ilian vivon kaj sendis al ili generatoron, elektrajn lampojn, anaslanugajn litkovrilojn, ktp. Sed la batalantoj ne volis ŝarĝi ĉion al la superaj instancoj. En la spirito de Daĝaj*, ili ekuzis siajn proprajn manojn por utiligi la montajn kondiĉojn, farante ĉasadon kaj porkobredadon, tiel ke la vivo kaj sano de la gvardianoj pliboniĝis.

**Vidu EPĈ no. 2, 1965, p. 65.*

Ankaŭ la kultura vivo de la gvardianoj estas tre vigla. Ili amuzas sin per pilkludo kaj kantado. Ĉiumonate ili aranĝas vesperkunvenon. Ili mem verkas kaj ludas, deklamas kaj kantas. Dum la kvin jaroj ili okazigis 69 vesperkunvenojn kaj prezentis pli ol 600 programerojn, kiuj prikantis Lej Feng kaj Vang Gie, bonajn homojn kaj bonajn aferojn kaj levis ilian batalspiriton. Krome ili esprimis sian senton kaj volon ankaŭ per poemoj, ekzemple:

Ne sopirante al la belpejzaĝo en hejmloko,
Cent jarojn pretas ni kunvivi kun la neĝa monto.
Herooj estas la landlimaj gvardianoj ruĝaj,
Kiuj patrion gardas, kun zorgado pri la mondo.

TUTKORE POR LA REVOLUCIO

De jaroj la batalantoj de la Ĉakala-a Landlima Gvardio kreive lernas kaj praktikas instruojn el verkoj de Prezidanto Maŭ kaj armas sian kapon per la penso de Maŭ Zedong, tiel ke ili povis spite al neĝblovo kaj malvarmego venki malfacilojn post malfaciloj, farante Ĉakala-monton fornego por hardi daŭrigantojn de la proleta revolucio.

Malgraŭ sia malalta klereco, generatoristo Ning Hiaŭhua persiste studis verkojn de Prezidanto Maŭ kun la helpo de vortaro. Kiom li lernis, tiom li tuj praktikis. Jam kvin jarojn li servis ĉe la landlimo, dum kiuj li neniam forlasis la malvarmegan altan regionon, neniam forlasis sian vatitan uniformon kaj neniam vidis arbojn. Iuj el liaj kamaradoj, kiuj rekrutiĝis kune kun li, jam estas nun kadroj, sed li restas ankoraŭ generatoristo. Li diris: "La kadroj kaj batalantoj ja same servas al la popolo. Por la revolucio mi pretas turnadi la krankon de la generatoro dum la tuta vivo."

Iun fojon Pang Vanlun, batalanto kun kvin bonoj de la gvardio, enfalis en trancéon, kiu estis plenplena de amasiĝinta neĝo, kiam li iris por gardostari. Eniĝinta en la neĝon li persiste grimpis kaj grimpis, ĝis li fine venis al la posteno. Kiam iuj demandis al li, kiel li povis venki tian malfacilegon, li diris: "Ĉu tio ne estas tre signifoplena afero, ke mia gardostaro havigas al nia 650-miliona popolo pacan tempon por konstruado?"

Dum la pasintaj jaroj dekoj da kamaradoj forlasis Ĉakala-monton pro transposteniĝo aŭ demobiliziĝo. Sed neniu el ili povis ĝin forlasi facile, kaj multaj ĝin adiaŭis kun larmoj. Iuj petis, ke oni enskribu iliajn nomojn en la nomlibron de la gvardio, deklarante, ke ili tuj revenos al la neĝmonto, kiam la patrio vokos.

Printempo Ĉiam Regas la Hejmlandon

(*Ujgura Popolkanto*)

En la epoko de la Kompartio
Ekhavas ni povruloj apoganton.
Malsat' kaj malriĉeco malaperis
Printempo ĉiam regas la hejmlandon.

Ĉar bonodora estas la floraro,
Alaŭdoj kantas en ekstaz' kaj ĝojo;
Ĉar saĝa estas la partia gvido,
Ĉinio iras laŭ prospera vojo.


En kampojn de l' popola komunumo
Alfluas de la montoj akvo klara;
Kondukas nin al bela idealo
La granda Komparti' por ni plej kara.

El sabla tero de Gobi' senhoma
Fariĝis jam kamparo tre fekunda;
Okazas dank' al akvoutiligo
En la hejmlando ŝanĝo plej profunda.

La bril' de Prezidanto Maŭ amata
Tagnokte niajn korojn prilumigas.
Patrion grandan la ujguroj amas,
Kaj pro ĝojego dancas kaj muzikas.

Per nia granda fort', ni realigas
Socialismon nun en la hejmlando.
Kaj kio estas font' de nia forto?
La pens' de Maŭ Zedong, nia gvidanto!

Elstarigante la politikon en laboroj, la Ĉakala-a Landlima Gvardio bonege plenumis la gloran taskon gardi la landlimon de la patrio dum kvin jaroj kaj ĉiujare estis elektita kiel roto kun kvar bonoj. Ĝi estas rekonata kiel modelo de la rotoj kun kvar bonoj en la Tibeta Armea Regiono. Ĉi-jare en printempo la Ministerio de Nacia Defendo donis al ĝi la gloran titolon "Ruĝa Landlima Gvardio sur Altebenaĵo".



La domaro konstruita de la landlimaj gvardianoj sur la neĝomonto

Malgranda Heroo en Ekstermado de Usonaj Armeanoj

EN januaro ĉijare en la meza regiono de la meza parto de suda Vjetnamio estis kunvokita Kunveno de "Bravuloj en Ekstermado de Usonaj Armeanoj". La kunvenon partoprenis reprezentantoj de "bravuloj en ekstermado de usonaj armeanoj" de diversaj unuoj de la gerilaj taĉmentoj, lokaj trupoj, ĉeffortaj trupoj kaj reprezentantoj de aliaj departementoj el tiu ĉi regiono. Ili ĉiuj faris multajn brilajn meritplenajn heroaĵojn en la nacisava batalo kontraŭ la usona imperiismo. Inter la reprezentantoj estis malgranda "bravulo en ekstermado de usonaj armeanoj" Doan Van Luyen, kiu ĵus finis sian 13-an vivjaron kaj kies heroaĵojn oni vaste laŭdegis.

Doan Van Luyen, kune kun aliaj gerilanoj, frekventis ĉirkaŭaĵon de la usona militbazo ĉe Chu Lai por fari atakojn kontraŭ la malamikoj. Kvankam juna, tamen saĝa kaj brava, li per lertaj artifikoj ekstermis 14 usonajn banditojn, kaj kune kun 11-jara amiketo kaptis 40 mm. kanonon de la usonaj banditoj. Pro tio la samlokanoj laŭde titolis lin "malgranda heroo en ekstermado de usonaj armeanoj".

Oni precipe ŝatis aŭskulti, kiel li mortigis kaj vundigis dek usonajn banditojn per du mangrenadoj.

Iun matenon, portante du grenadojn militkaptitajn el la garnizonejo de la usona trupo antaŭ kelkaj tagoj, Doan Van Luyen rapidis al la ĉirkaŭaĵo de usona fortikigita punkto por rekognoski. Kiam li informiĝis ke la plejparto de la usonaj banditoj foriris al la najbaraj vilaĝoj por fari "balaadon", li tre ĝojis kaj opiniis, ke tio estas bona ŝanco por ekstermi malamikojn. Li rapide enterigis unu mangrenadon sur la revena vojo de la usonaj banditoj kaj bone ĝin kamuflis. Tiutempe, subite venis al li la penso: "Se la usonaj banditoj, kiuj revenos de "balaado", piedpremos la grenadon, la aliaj en la fortikigita punkto certe elvenos por forpreni la kadavrojn, mi devas ankaŭ ilin ekstermi!" Sekve li eltiris la alian grenadon kaj ĝin enterigis sur la vojo kondukanta al la punkto, je distanco de ĉirkaŭ dek metroj for de la unua. Kiam ĉio estis en ordo kaj li pretis foriri, subite venis al li en la kapon alia penso: "Eble la samlokanoj venos amase al la fortikigita punkto por fari politikan batalon, ĉu ne estos danĝere, se ili piedtuŝos la enterigitajn grenadojn?" Kion fari? Post pensado li decidis resti tie apude por gardi la lokon. Tamen, ĝis tagmezo ankoraŭ ne revenis la usonaj diabloj, kiuj iris "balai". Li iom malpacienciĝis kaj ekintencis elfosi la grenadojn kaj hejmeniri. Sed ekpensante pri la gerilanoj-gefratoj kiuj luktas ĉirkaŭ la usona militbazo ĉe Chu Lai, li trovis ne dece, se li laŭplaĉe irus for de sia batalposteno, kiam la komisiita bataltasko ankoraŭ ne estis plenumita.

La firma volo nepre mortigi la usonajn banditojn kuraĝigis lin venki la malsaton. Atendante ĝis post la 1-a horo posttagmeze, li vidis ke helikoptero alflugis kaj surteriĝis ne malproksime de la fortikigita punkto, kaj el kiu malsupreniris kvin usonaj diabloj. Kun senlima malamego al la usonaj banditoj Doan Van Luyen fiksis sian rigardon al ĉiu paŝo de la usonaj diabloj. Kiam la usonaj agresantoj alproksimiĝis al la loko de grenado, "pum!" — tuj eksplodis la grenado. Kiam malaperis la fumopolvo, Doan Van Luyen klare vidis ke kvar usonaj diabloj estas mortigitaj surloke, kaj la kvina kuŝas vundita, terure kriante kaj baraktante.

Tiam aŭdinte la eksplodon, la usonaj diabloj en la fortikigita punkto, panike alarmis, sencele pafadis kaj poste timeme elŝovis siajn kapojn. Efektive, kiel li antaŭkonjektis, kiam grupo da usonaj diabloj alvenis por forporti la kadavrojn kaj vunditon, iu surpaŝis la alian enterigitan grenadon, kaj kvin el la usonaj diabloj finis sian vivon tuj sur la loko.

POST LA KURSO

Vortoj kun "*" estas klarigitaj en "Nia Vortareto"

Batalrakonto de Vjetnamio

PUNI MALAMIKOJN PER BAMBU-VESPOJ

En Nguyen Si, suda Vjetnamio, troviĝas fortikig-ita punkto de la malamikoj. La usonaj agresantoj kaj pupaj* arme-anoj tie loĝantaj faris multajn sangajn fi-agojn al la vjetnama popolo en ĉirkaŭ-ejo per mort-igoj, pri-raboj, brul-igoj kaj per-fortoj.

Iun tagon, sub-leŭtenanto* de la usona agresa armeo de-nove iris al la vilaĝo M. kun sia trupo*. Tiam la maljunulo Bao Hung kaj la membroj de Armita Sin-defenda Trupo Viet Dung, Eta Khuu k. a. jam sin preparis por batalo. Ĉi-foje ili volis uzi armilon neniam antaŭe uzitan de aliaj por severe puni la malamikojn, kiuj uzas modernajn armilojn por amase mortigi la popolon de suda Vjetnamio. Ĉar en la loko troviĝas tre multe da sovaĝaj bambu-vespoj kun granda kapo, mal-dika lumbo* kaj longaj flugiloj. Ili flugas rapide kaj havas forte venenan* pik-ilon. Se ili estas incit-itaj, ili povas mortpiki eĉ grandan bovon. Maljunulo Bao Hung plej bone konis la kutimojn de la bambu-vespoj, kaj ĉifoje li intencis utiligi ilin kiel arm-ilon kontraŭ la malamikoj.

Kiam la malamikoj al-proksimiĝis, la sin-defendaj trup-anoj kiuj antaŭe alfrotis sur sin kontraŭ-vespan medicin-aĵon, re-tenis sian spir-adon por observi ilian moviĝon. La inter-spaco ĉiam pli mallong-iĝis: ducent metroj, cent metroj, kvindek metroj, tridek metroj.... Jen aŭd-iĝis de Viet Dung la krio, mal-laŭta sed forta: "El-lasu!" La maljunulo Bao Hung tuj ektiris la ŝnurojn, dek amasoj da sovaĝaj bambu-vespoj elflugis kaj dense ekatakis la malamikojn. Vidante tion la usonaj agresantoj kaj pupaj arme-anoj terure timiĝis kaj kuris returne kovr-ante sian kapon per la manoj.

Sed, la vespoj post-flugis la malamikojn, ne-volante ilin for-lasi, kaj pikis fervore ilin je la vizaĝoj kaj manoj. Tiuj aĉuloj, kiuj senkompate mortigis pacajn vilaĝanojn, nun kriis kaj terur-iĝis ,sin rul-ante* sur la tero.

La plej unuaj antaŭ-kur-antoj, kiuj opiniis sin el-kuri el la danĝero, baldaŭ trafis minon en la proksimeco. Kaj tiu fier-aĉa ekzekut-isto, la usona subleŭtenanto, falis en kapt-fos-aĵon*, kie liaj piedoj estis tra-pikitaj. Ne povante sin movi, li estis pik-mortigita de la bambu-vespoj.

Nia Vortareto

fos-i — fari mal-plen-aĵon el-tirante teron
leŭtenant-o — armea estro kun rango tuj sub kapitano
lumb-o — la loko inter supra kaj malsupra korpo-partoj
pup-o — homa figur-eto uzata kiel ludilo
rul-i — turni ion ĉirkaŭ ĝi mem
trup-o — aro da soldatoj
venen-o — mal-utila materio, tute aŭ parte de-tru-anta la funkciojn de la vivo



EL Popola ĈINIO

人民中國報道

Dumonata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio


N-ro 4 (99) 1966

Ĉefa Enhavo

Prezidanto Maŭ Zedong, la Granda Gvidanto de la Ĉina Popolo
Alte Tenu la Grandan Ruĝan Flagon de la Penso de Maŭ Zedong, Aktive Partoprenu en la Granda Socialisma Kultura Revolucio
Nepre Ne Forgesu Klasbatalon
Pri "Trifamilia Vilaĝo"
Ĉinio en Alta Tajdo de Granda Proleta Kultura Revolucio
Komuna Deklaro de Ĉinio kaj Albanio
Prezidanto Liu Vizitis Amikajn Najbarajn Landojn
Amikeco inter Ĉina kaj Pakistana Popoloj Verdas Poreterne
Ĉinio Sukcesis en Nuklea Eksplodigo Entenanta Termonuklean Materialon
Ĉefministro Ĝoŭ pri la Sukceso de la Tria Nuklea Provo de Ĉinio
Kvar Frazoj pri la Politiko de Ĉinio kontraŭ Usono
La Vojo de Hiadinggia-anoj (*bildpaĝoj*)
Modelo por Guberniaj Partisekretarioj
Interna Mongolio en Prospero (*bildpaĝoj*)
La Suda Lago
Historiaj Objektoj kaj Materialoj pri Pariza Komunumo Ekspoziciitaj en Ĉinio
Heroaj Gefiloj de Suda Vjetnamio
La Usonaj Banditoj Ne Povas Nei Sian Krimon de Milit-provoko
Ruĝa Landlima Gvardio sur Altebenaĵo
Sur la kovrilo — Kombino de Lerno kaj Apliko (Duonlaboraj kaj Duonlernaj Lernantinoj de Pejde-a Ŝtrumpo-fabriko, Ŝanhajo)
Sur la dorskovrilo — Kamparaj junaj intelektuloj esploras la staton de ovoj de la fiinsekto *schoenobius incertulus* en la kampo de rizplantidoj.

LOKAJ VIDAĴOJ

Kingtian situanta en la sudo de Ĝegiang-provinco estas loko kun bela pejzaĝo. La klara akvo de la rivero Oŭgiang fluas tra ĝi, kaj impone altaj montoj leviĝas ĉirkaŭe, kie produktiĝas la fama Kingtian-ŝtono, taŭga por fari skulptaĵon. Ĝi estas bonkvalita, diafana kaj diverskolora. Tieaj metiartistoj scias lerte fari diversajn skulptaĵojn laŭ la koloroj kaj formo de ŝtono. La ŝtonskulpta arto de Kingtian jam havas historion de ĉ. mil jaroj. Sed en la pasinteco, ĝi tre malmulte spegulis la vivon de laboruloj. Por pli bone disvolvi tiun ĉi arton, pluraj ŝtonskulptaj laborejoj estis establitaj tie post la Liberiĝo. La skulptistoj multe klopodis por krei novajn verojn. Disvolvante la malnovan tradician arton, ili jam multon atingis en tio.



Nova fizionomio de Kingtian (*maldekstre*)



Skulptaĵo laŭ la senco de la poemo de Prezidanto Maŭ Zedong "Umefloro" (*dekstre supre*)

Reveno kun plena ŝarĝo (*malsupre*)

